

***DISSEMITAJ FLOROJ***

***DE KÁLMÁN KALOCSAY***

***ORIGINALAJ POEMOJ KAJ TRADUKOJ  
EKSTERVOLUMAJ***

***ENBUKEDIGIS ADA CSISZÁR***

***BUDAPEST 2005***

DISSEMITAJ FLOROJ  
Ada Csiszár

© Ada Csiszár, Budapest

Respondeca eldonanto: Ada Csiszár  
KAL-ĈI Dokumentaro, Bdapest, 2005

## ENHAVO

ENHAVO.....	3
ANTAŬPAROLO.....	9
ORIGINALAJ POEMOJ .....	12
KARA LUDOVIKO!* .....	12
PROLOGO ANTAŬ LA TEATRA VESPERO* .....	13
AL LA LEGANTOJ .....	15
GIESSWEIN* .....	16
ŜI DORMAS .....	18
STELO SUPER LA WAWEL.....	19
LA KAPITAN' EL BERNO* .....	22
AL LA EŬKARISTIA KONGRESO* .....	24
SOLDATOJ MARŜAS.....	26
DEMANDO STRANGA .....	27
INTER RUINOJ .....	28
RETROVO .....	29
LA INTERNA IDEO .....	30
KONGRESA SALUTO .....	31
NEŬTRALECO.....	34
AL NEŬTRALULOJ.....	35
LA SUBTASOJ.....	36
DISCIPLINO.....	36
MARX.....	37
JES JA .....	38
ENGELS.....	39
LENIN.....	39
STALIN.....	40
OKTOBRA ODO AL LA TRIDEKJARA SOVJETUNIO* .....	41
BALADO PRI LA ATOMBOMBO* .....	44
LA BALADO DE GREKLANDO .....	45
LA BALADO DE FRANCO .....	46
LA VENKONTOJ.....	52
AL MARJORIE BOULTON.....	54
KALENDARO .....	56
LA PROVIDENCO* .....	70
DANKTRIBUTO* .....	71
CENTJARA ESTUS JAM LA KORO.....	72
WARINGHIEN.....	73
SALUTO* .....	77
TRADUKOJ EI LA MONDLITERATURO.....	79
EL LA ANGLA POEZIO .....	79

George Gordon Noël Byron (1788-1824).....	79
SONETO PRI CHILLON .....	79
William Shakespeare (1564-1616).....	80
SONETO (LXIII) .....	80
EL LA ĈINA POEZIO.....	81
Maŭ Zedong (1893-1976).....	81
VINTRA BILDO .....	81
EL LA FLANDRA POEZIO.....	82
DUM VINTRA PLUV'* .....	82
EL LA FRANCA POEZIO.....	83
Louis Aragon (1897-1982).....	83
LA POETO AL SIA PARTIO .....	83
Hervé (1825-1892) .....	84
MAM'ZELL NITOUCHE.....	84
Eugéne Pottier (1816-1887).....	85
LA INTERNACIO.....	85
EL LA GERMANA POEZIO .....	87
Johann Wolfgang Goethe (1749-1832).....	87
JAPANA VESPERKANTO (Alia).....	87
Georg Friedrich Händel (1685-1759) .....	88
MESSIAH* .....	88
Kürenberg von (trobadoro de la 12-a jc) .....	89
LA FALKO .....	89
Otto Roquette (1824-1896) .....	90
LUDE, PETOLE GAJAS LA KOR' .....	90
Johann Strauss (1825-1899).....	91
"ĈE LA BELA, BLUA DANUBO*" .....	91
Richard Wagner (1813-1883).....	94
AL LA VESPERA STELO* .....	94
LA RABITAJ KISOJ.....	95
EL LA MALNOVGREKA LITERATURO .....	96
Archilochos (7a jarcento).....	96
FRAGMENTOJ* .....	96
Euripido (480-406 a. K.) .....	98
PACO-ĤORO DE MALJUNULOJ .....	98
EL LA HUNGARA POEZIO .....	99
Endre Ady (1877-1919).....	99
LA LASTA RIDETO.....	99
LA RUĜA SUNO .....	99
SURFLUGIS LA PAVO .....	100
Lajos Áprily (1887-1967) .....	102

MARTO .....	102
János Arany (1817-1882) .....	103
KLARA ZÁCH.....	103
LASLO V. ....	106
POPOLKANTO .....	108
Mihály Babits (1883-1941) .....	109
MERCERIA .....	109
Károly Bari (1952- ) .....	110
MIGRAJ CIGANOJ.....	110
László Benjámín (1915-1986) .....	111
MI VOLIS FAJRON.....	111
László Beöthy (1873-1931) .....	112
DU PASEROJ .....	112
Sándor Csóri (1930- ).....	113
KE MALLUME NE ESTU .....	113
Viktoro Dalmady (1836-1916) .....	114
HUNGAROJ ESTU NI!.....	114
PATRINA LARMO.....	115
SENDEPENDO .....	116
Magda Donászy (1911-1988).....	117
LA GRILO KAJ LA FORMIKO* .....	117
Ákos Dutka (1881-1972) .....	120
ANTAŬ LA KRISTO-BILDO DE YPERN.....	120
Béla Endrődy (1886-1956) .....	121
HAJDE' .....	121
Milán Füst (1888-1967) .....	122
LETERO PRI LA MORTO DE EDIPO* .....	122
Gábor Garai (1929-1987) .....	124
MIA PLEZUR KAJ MIA TURMENTO, BUDAPEST* .....	124
Pál Gulyás (1899-1944) .....	125
LA KORO DE L' SOLDATO .....	125
Ernő Holló (1910-1983) .....	126
ANSEROJ .....	126
VIZAĜO SURSTRATE.....	127
Gyula Illyés (1902-1983) .....	128
DANKE .....	128
MONTRIĜAS .....	128
POETOJ INTER SI.....	129
TRANSFORMIĜINTA KNABINO .....	130
Károly Jobbágy (1921-1998) .....	131
SAMLINGVE .....	131

Jolán József (1899-1950)* .....	132
LA BAKISTO-LERNANTO KAJ ATTILA JÓZSEF .....	132
Lajos Kassák (1887-1967)* .....	133
AL ĜOJO.....	133
DEZIRO.....	134
EKVILIBRO .....	134
EN BONA HORO .....	135
LABORIST-PORTRETO .....	136
LA GARDANĜELO .....	137
LA REALAĴO DE NENIO .....	137
LA ZORGOJ DE SOLECA VIVO .....	138
Aladár Komját (1891-1937) .....	140
AMA POEMO .....	140
REKRUTIGO.....	141
Lajos Kónya (1914-1972) .....	143
KIE VI ESTAS ORIOLOJ? .....	143
LA RAJDARTISTINO*.....	143
LA ROMIANO* .....	144
NIMBO .....	145
Dezső Kosztolányi (1885-1936) .....	146
ADMONO POR LA RESPEKTO DE MALJUNULOJ .....	146
FLAGO .....	146
KIU HODIAŬ MORTIS.....	147
MALBONA POETO, KIEL KORTUŜA.....	148
VIRINOJ .....	148
Mihály Ladányi (1934-1986).....	150
ELEGIO* .....	150
KAJ FINFINE* .....	150
LI TRAIRIS INTER LA SOLULOJ DEL KAFEJO* .....	151
NUR RIMO KAJ RITMO.....	152
SEN EKSTAZO .....	152
Laky ( ? ).....	155
MI ESTAS POLICAN' .....	155
József Lengyel (1896-1975).....	156
EPITAFO.....	156
JEN MI ESTAS.....	156
LA SIMPLECO DE LA MOROJ LAO-CE .....	157
Karlo Lovászy (1887-1951) .....	158
LA HOMO.....	158
András Mezei (1930- ).....	159
EN ĈIUJ TEMPOJ.....	159

PRI L' MONDO PAROLU .....	159
Zsigmond Móricz (1879-1942) .....	161
PASEROJ-ALMOZULOJ .....	161
Anna Pardi (1945- ) .....	164
AMO .....	164
AMROMPO .....	164
INTERRILATOJ.....	164
TEZO.....	165
Sándor Petőfi (1823-1849) .....	166
LA MONUMENTO DEFALINTA.....	166
MIA PLEJ BELA POEMO .....	168
Gábor Rudnai (1946- ) .....	169
PUTO DE MARIA EN NAZARETO*, ** .....	169
SOLECA CEDRO*, ** .....	169
Sándor Sík: (1889-1963) .....	170
KANTO AL ĈIU HOMO .....	170
Gáborné Szabados (19 ? ) .....	172
JAM TAGIĜAS .....	172
Lőrinc Szabó (1900-1957) .....	173
NOKTO INTER MONTOJ .....	173
Margit Szécsi (1928-1990) .....	175
LA EKFLORINTAJ MANOJ* .....	175
Árpád Tóth (1886-1928) .....	177
APRILA CAPRICCIO .....	177
FLAMO .....	178
LA NOVA DIO* .....	179
Mihály Váci (1924-1970) .....	182
LUNO KAJ STELO POLUSA .....	182
SEN TIIOLO .....	182
Béla Vihar (1908-1978) .....	184
BUDAPEST: EŬROPO .....	184
Mihály Vörösmarty (1800-1855) .....	185
CSONGOR KAJ TÜNDE .....	185
HAR', BUŜ', OKUL' .....	189
SE LA ANIMON.....	190
EL LA JAPANA LITERATURO .....	191
(Anonime) .....	191
LA KUKULO KAJ LA TRI ŜTATVIROJ .....	191
LATINE VERKITA POEMO .....	192
Janus Pannonius/Johano Csezmicei (1434-1472).....	192
LI EKSKUZAS SIN, ĈAR LI NE MIKSIĜAS EN BATALOJN .....	192

EL RUSA POEZIO .....	193
Aleksandr Sergejevič Puškin (1799-1837) .....	193
AL LA DEKABRISTOJ EN SIBERIO* .....	193
ARION* .....	194
MIA MONUMENTO* .....	194
SOVAĜA PLEZURO* .....	195
VINTRA VESPERO* .....	195
EL VJETNAMIO .....	197
Nguyen Thi Ly ( ? ) .....	197
KANTO PRI AN KHANH .....	197
HUNGARAJ KANTOJ .....	199
Katrino Kádár .....	204
LISTO DE FONTOJ .....	206
ORIGINALAJ POEMOJ .....	206
TRADUKOJ .....	207
HUNGARAJ KANTOJ .....	211
UZITAJ MALLONGIGOJ .....	212



## ANTAŬPAROLO

Estas ĉagrena fakto, ke verkoj eĉ plej brilaj, ne gardataj en volumoj, baldaŭ dronos en la forgeso. En Esperanto-revuoj dissemintaj 171 poemoj kaj tradukoj de Kálmán Kalocsay nun elmergiĝis el la maro de literoj. Liajn plej valorajn poemtradukojn — ĉerpitajn jam el forpasintaj revuoj: *Norda Prismo*, *La Nica Literatura Revuo*, *Monda Kulturo* — pluvivigas *Tutmonda Sonoro* (1981).

La nuna kolekto enhavas kelkajn originalaĵojn (verkitajn en 1947) pri kiuj Kalocsay hodiaŭ certe ne fanfaronus: *Marx; Engels; Lenin, Stalin; Oktobra Odo al la tridekjara Sovjetunio*, estas tiuj "kon-damnitaj" poemoj (kun kruceto ĉe la aperdato), kiuj bezonas iom da klarigo. Verŝajne du aliajn erojn — *La balado de Greklando* kaj *La balado de Franco* — ne ĉiu aplaudus nuntempe.

La ideon de la humanismo ekkonis Kalocsay junaĝe en la *Galilei Kör* (rondo Galilei), kaj tie li ekkonis ankaŭ la marxismon, kies te-zojn li trovis simpatia. Postulus longan studon eĉ skizi la politikajn cirkonstancojn, kiuj regis dum la vivo de Kalocsay, ĉar en tiuj jarde-koj abundis okazintaĵoj kaj ŝanĝoj en Hungario: reĝa potenco, feŭ-dal-kapitalismo, revolucio (1918), proletardiktaturo, du mondmilitoj, "popola demokratio", jaroj de "malvarma milito", subpremita revo-lucio en 1956 — ĉiuj kun siaj ideologioj kaj potencoj.

Pri la politika sinteno de Kalocsay skribis Ferenc Szilágyi (NLR 1961:36, p. 213-214): *"Kalocsay 'ex officio' devas ĉiam sekvi formale la regantajn sistemojn, sed li estis ĉiam opozicie progresema, plej ofte devis kaŝi tion. Esperanto ravis kaj logis lin al sindono, sed ne al ekstazo. Sed li estis kuraĝa: mi memoras okazojn, kiam la gazeto (LM) havis du variantojn, unu preskaŭ nur por la hungaraj ma-gistratoj kaj la alian, kiun oni sendis eksterlanden kaj en kiu estis kelkaj artikoloj, ne konvenaj al la vido de la pli kaj plifortiganta hungara reakcio..."*

En tempesta jarcento vivis Kálmán Kalocsay. Li estis nek heroo, nek viktimo — li estis humanisto.

Post la fino de la dua mondmilito Kalocsay, kaj multaj aliaj humanaj intelektuloj, sincere kredis, ke komenciĝos nova, pli justa sociordo kaj li akceptis la marxisman teorion, multe pli, ĉar en Hungario antaŭ la mondmilito ne estis demokratia libereco.

Apenaŭ ĉesis la milita ŝtormo en Hungario en 1945, fervoraj esperantistoj komencis reorganizi la movadon. *Hungara Esperantista Societo Laborista kaj la Hungarlanda Esperanto-Societo* denove funkciis. En 1946 jam aperis la unua postmilita E-gazeto kaj estis aranĝita la XVI-a Hungarlanda Esperanta Kongreso. En 1947 re-aperis *Literatura Mondo*, la radio regule dissendis E-lingvajn informojn. El Hungario povis veturi karavano al la unua postmilita Uni-versala Kongreso en Bern, 1947.

Tamen la agado de la E-movado severe kontrolis la ŝtataj instancoj, la esperantaj eldonaĵoj oni rigore cenzuris. La movado devis submetiĝi al la postuloj de la reĝimo, kaj ĝi devis konstante prui sian lojalecon al la popoldemokratio.

Sub tiuj malfacilaj kondiĉoj estis memkompreneble, ke la lojalecon de esperantistoj deklaru la plej eminenta (ankaŭ en la socialismaj tendaro rekonata) poeto, t. e. Kálmán Kalocsay. Kaj li per elokventa plumo plenumis tiun taskon. Liaj kondamnitaj poemoj aperis en la organo de la *Danub-regionaj Esperanto-Asocioj* (Internacia Kulturo 1947, n-roj 6-7, 16). Tiuj versaĵoj bonvenis al ĉiuj "satelitaj landoj". Oni aperigis ilin plurloke kaj plurfoje. Do, la socialisma tendaro dankis, en okcidentaj landoj riproĉis la poeton. Tamen la akomodiĝo al la nova situacio ebligis, ke la Esperanto-movado pluvis, eĉ grave prosperis en la komunisma bloko.

"Marxist' mi estas, jes ja ..." — skribis Kalocsay en 1947, sed li kaj la klare vidantaj homoj baldaŭ seniluziigis spertante la misfunkciadon de la marxismo, la stalinan subpremon, malhumanecon. Pli kaj pli influis la personkulto, akriĝis la malvarma milito, fortiĝis la diktaturo. En 1949 la julian-aŭgustan n-ron de *Literatura Mondo* ne sekvis pluaj, kaj ĉesis ĉiuj E-gazetoj. Ĉesis la Esperant-lingva radio-dissendo, kaj en aprilo de 1950 HES devis ĉesi sian agadon. Evidentiĝis, ke por la Esperanto-movado la glorigaj poemoj, kaj aliaj manovroj ne longe efikis favore.



La kondamnitaj poemoj de Kalocsay — escepte "Lenin" — ne venis en volumojn. Lian poezian verkaron gardas la subaj memstaraj poemaroj kaj antologioj:

Originalaj poemoj:

MONDO KAJ KORO (1921, 1970); RIMPORTRETOJ (1931);  
STREĈITA KORDO (1931, 1978); SEKRETAJ SONETOJ (1932, 1989);  
EZOPA SAĜO (1956; 1978); ESPERANTA ANTOLOGIO (1958, 1984);  
ORA DUOPO (1966); IZOLO (1977); LA DEKDU NOKTOJ DE SATANO  
(1990); VERSOJN ONI NE AĈETAS (1992). EN NACIA VESTO (2004).

Tradukoj:

KANTANTA KAMPARO (1922); S. Petőfi: JOHANO LA BRAVA (1923,  
1948, 1970, 1984, en paralelaj Esperanta kaj ĉina tekstoj 1997); I.  
Madách: LA TRAGEDIO DE L' HOMO (1924, 1965, CD-ROM 1999); NI  
KANTU! (1928, 2000); ETERNA BUKEDO (1931); J. W. Goethe:  
ROMAJ ELEGIOJ kaj LA TAGLIBRO (1932, ĉi lasta en paralelaj  
Esperanta kaj germana lingvoj 1984); Dante: INFERO (1933, 1979);  
CH. Baudelaire: LA FLOROJ DE L' MALBONO (kun G. Waringhien,  
1957); W. Shakespeare: REĜO LEAR (1966); SOMERMEZNOKTA  
SONĜO (1967); LA TEMPESTO (1970); H. Heine: KANTOJ KAJ  
ROMANCOJ (kun G. Waringhien, 1969); S. Petőfi: LIBERO KAJ AMO  
(1970); TUTMONDA SONORO (1981); FABELARBO (2003);  
POSTRIKOLTO (2004).

(En diversaj antologioj):

BULGARA ANTOLOGIO (1925); HUNGARA ANTOLOGIO (1933,  
1983); SVISA ANTOLOGIO (1939); ORA DUOPO (1966). E. Ady: LA  
MORTO DE ĈIELARKO (1977); HUND-BAZARO (1979); A. József:  
URBORANDA NOKTO (1986); ITALA ANTOLOGIO (1987); POEMARO  
DE LI BAI (1997).  
LA KREMO DE KALOCSAY (1971) kaj la ESPERANTA KRESTO-  
MATIO (1991) enhavas ankaŭ originalaĵojn.

La poezia verkaro de Kálmán Kalocsay estas listigita en OMAĜE ...  
vol. 2, 3. (1999-2000). Ĉi tiu kolekto kompletigas la liston.

Budapest, 2005.

Ada CSISZÁR

## **ORIGINALAJ POEMOJ**

### **KARA LUDOVIKO!\***

Je l' nomtago de via kion mi deziru?  
Vian vivon ĉiam en sunbril' vi iru.  
Vin evitu, timu la sort' malfeliĉa!  
Poŝ' je mono, kor' je ĝojo estu riĉa!  
Deziritan skuu el la jakmanikoj!  
Amu vin, kaj helpu aro da amikoj!  
Kaj mildigu vent' se blovis sovaĝe,  
Ĝi karesu milde, mole vin vizaĝe,  
Alportinte famon pri knabinoj-floroj  
Pleniginte vian koron per odoroj.  
Kion diri? Estu por vi do donata  
Kion vi deziras al la plej amata,  
Al la plej amata de vi en la mondo.  
Kaj nun ... kio estu fino de la kanto?  
Vivu, kresku, floru nia Esperanto,  
Fluu tra la tero kiel vasta ondo.

Amike K.

(1913)

\*La unua Esperanto-poemo de Kalocsay dediĉita al la amiko kaj iama lernejkamarado Lajos Győry-Nagy (1892-1980).

## **PROLOGO ANTAŬ LA TEATRA VESPERO\***

Bonvenon, karaj fratoj,  
Pro laŭtaj korobatoj  
Lang' mia nur balbutas,  
Korbatoj vin salutas.

Mi estas la Prologo,  
Alvoko kaj allogo  
Por gaja kor-amuzo  
Per nia farsa Muzo.

Ŝi estas iom stranga,  
Kaprica kaj klaĉlaga.  
Kunmiksas aĵojn multajn  
Tre saĝajn kaj tre stultajn.

Ŝi timas nur enuon  
Kaj volas: larmofluon  
En dolĉ' — malĝoja revo,  
Kaj — ridon ĝis la krevo.

Ŝi venas ja laŭveste  
Malriĉe kaj modeste,  
Laŭ pov' ŝi estas eta  
Sed ami, flami preta.

Babilas ŝi naive  
Je la kompren' soife.  
Ŝi, de l' esper' ebria,  
Mem estas koro nia.

Se estus por malplaĉo  
Longega ŝia klaĉo,  
Mallaŭte — do — mallaŭdu,  
Sed laŭte, ho, aplaŭdu!

(1921)

\*Verkita por la postkongresa aranĝaĵo en Budapeŝto, 1921.

## **LARMOJ\***

La larmoj ie amasiĝas  
Guto post gut' en apati'...  
Ho, larmoj el hungar-okuloj...  
Nenian fluis pli.

La larmoj ien falas, iras,  
Sen ĉeso verŝas sin malĝoje,  
Sed je oceano ŝvelinte  
Revenos ili foje!

Kaj tiam ili forbalaos  
Eksterme ĉion, sen kompat'!  
Marego estos Ter' de kulpoj,  
Ne estos Ararat!

La larmoj ie amasiĝas  
Guto post gut' en apati'...  
Ho larmoj el hungar-okuloj  
Neniam fluis pli...

(1921)

\* La poemon verkis Kalocsay okaze de la unua postmilita packontrakto inter la venkintoj kaj Hungario. Laŭ la "Trianona Packontrakto" Hungario perdis 71,5 procentojn de sia teritorio kaj 54 procentojn de la loĝantaro.

## **AL LA LEGANTOJ**

(Je la apero de Literatura Mondo).

"Mia prozo, miaj rimoj  
Estas peto kaj allogo,  
Frapas pordojn de l' animoj  
Por kunhelpo kaj apogo.

Karaj fratoj, ĉesu dormi!  
Jen, la sorto kubon ĵetis.  
Estas, kion nun ni petis,  
Same por vi, kiel por mi.

Volas mi el eta ĝermo  
Kreski, flori, lukti, spiti,  
Volas mi per brava skermo  
Tutan mondon almiliti,

Kaj per milda tuŝ' al koroj  
Porti: revojn, larmorulon,  
Kaj konsolan, molan lulon,  
Kaj ŝercvicon al doloroj:

Kion dolĉa Muz' kun beno  
Donas por volupto pura:  
Ĉiujn florojn de l' ĝardeno  
Arta kaj literaturo.

Fratoj, do al via sin'  
Prenu min, la infaneton,  
Ho, aŭskultu mian peton,  
Legu, amu, verku min!"

(1922)

## **GISSWEIN\***

En mondo de l' malamo kaj de l' armo  
Li estis amo, bono, beno, varmo.  
Li estis milda, lia rava mild'  
Por malfortuloj estis ŝirma ŝild'.  
Por baraktantoj de la vivo ŝvita  
Li estis plena mano etendita.  
Li estis forta per potenca fort'  
De l' bona ago kaj de l' bona vort'.  
Li estis ĉarma, kiel la infano  
Li estis simpla, kiel mola pano,  
Serena, kiel la ĉiel' radia,  
Kaj estis nia, ha, li estis nia!  
Jes nia, nia patro kaj patrono  
Kun sia tuta koro kaj sindono.  
Ĉe patra tombo staras ni, la filoj,  
Ne hontu ni, pro niaj larmobriloj.  
La tuta mond' pli frosta estos nune  
Ve, ne varmigas lia koro sune.  
Sed nin konsolu, fratoj, en ĉagreno:  
Foriris li, sed restis lia beno.  
La noblaj semoj jam en koroj ĝermas,  
La frosta tombo ilin ne enfermas.  
Kreskigu tiujn noblajn semojn, fratoj,  
Jen testament' de liaj korobatoj.

(1923)

\*Sándor Giesswein (1856-1923) prelato, parlamentano, pioniro de pacifismo kaj aliaj sociaj klopodoj. De 1912 esperantisto kaj prezidanto de la Hungarlanda E-Societo ĝis sia morto. Dum kelkaj kongresoj li celebris meson kaj predikis en Esperanto.



## ĈU VI SENTIS?

Ni iras firme kaj ni stumblas, ni preĝas kaj ni pekas kaj ni ekkuras  
ĝojkrie kaj ni baraktas en polvo:  
Piaj kaj malicaj, malkuraĝaj kaj heroaj — homoj!  
Kiu atentis en ni pri niaj paŝoj — mistera Okulo?...  
Ĉu vi ne sentis la rigardon eklumi kaj bruligi en via sino,  
Rigardon aman kaj pardoneman, sed kelkfoje tranĉan, ke vi kaptas  
al koro,  
Kvazaŭ iu ponardon estus traborinta?...  
Ĉu Tiu estas ni — nia mizera, senhelpa estaĵo gluita al la terobuloj,  
Tiu, mistera, potenca, Tiu majesta Juĝisto,  
Antaŭ kiu ni tremas?  
Ĉu vi ne sentis disiĝi vian memon kaj rigardi vin mem el la alto,  
Kompate kaj ame aŭ indigne kaj kolere pri viaj agoj propraj?  
Kaj ĉu vi mem rigardas vin tiam, aŭ transtera, giganta, nekonata  
Spirito  
Tuŝinta vin dum momento, sian filon, sian eron deŝiritan,  
Kiu erarvagas en la labirintoj de l' Materio, en la surda mallumo de  
l' sensoj,  
Ĝis li liberiĝos kaj kun Li triumfe unuiĝos? ...

(1925)

## ŜI DORMAS

Silenton! Dormas la trezor'.  
Subpremis dolĉe ŝin langvor'.  
Sur vang' en rozkoloroj  
Burĝonas mildaj floroj.  
Okulojn ŝiajn fermas mole  
Palpebra silk-kurten',  
Sed ride glitas kaj petole  
La sonĝoj tra l' mien'.

Filin', fratino, amatin'!  
Patrino de l' feliĉo!  
Ho dolĉe estas gardi vin,  
Atendi je l' vekigo.

En dismetita blond-harar',  
En tiu onda, blonda mar',  
Sub ondoj sunradiaj  
Nun dormas kisoj miaj.  
Vidiĝas inter punta kremo  
De l' brusto roza bril'.  
For tento, for! Ĝin kun hontemo  
Mi kaŝas per kovril'.

Filin', fratino, amatin'!  
Patrino de l' feliĉo!  
Ho, dolĉe estas gardi vin,  
Atendi je l' vekigo.

Pri la anĝeloj eta kant'  
Dirata super la dormant'  
En mian kapon venas,  
Dancante trapromenas.  
Por akompan' en mia koro  
Eksonas mola lir'.  
Ĉe l' sonoj de la lulsonoro  
Dormetas la sopir'.

Filin', fratino, amatin'!  
Patrino de l' feliĉo!  
Ho, dolĉe estas gardi vin,  
Atendi je l' vekigo.

Silenton! Dormas la trezor'.  
En sonĝojn lulis ŝin langvor'.  
La karan ĉirkaŭ buŝo  
Karesas mi sen tuŝo.  
Ho kiel dolĉe... kiel strange...  
En kor'... la prem'... la varm'...  
Pro kio rulis sin survange  
Subite gut' de larm'?...

Filin', fratino, amatin'!  
Patrino de l' feliĉo!  
Ho, dolĉe estas gardi vin,  
Atendi je l' vekigo.

(1925)

## **STELO SUPER LA WAWEL**

(Kongresa saluto)

Leviĝas el la bluaj ondoj de l' Vistulo  
Kaj pace sin rigardas en la ondspegulo  
Sub la mirinde blua kupolo ĉiela  
La musko-mura Wawel — kastelo fabela,  
El kiu al la alto de pura lazuro  
Sin streĉas la majesta katedrala turo.  
Super la tur', jen, nuboj arĝentaj flugpendas.  
Oni kredus, ke tie flugilojn etendas  
Por triumfo ekflugi, ia birdo granda:  
La brilo blanka aglo: simbolo Pollanda.

Muskaj muroj de Wawel jen staras, sensonaj,  
Mute ripozas tie en la litoj ŝtonaj  
La reĝoj, episkopoj, nobeloj altrangaj:  
Ilin ŝirmas per ombro la flugiloj blankaj  
De l' pola aglo. Sed ja, se la suno dronas,  
Kaj el la preĝejoj urbaj sonoril' eksonas,  
El Maria-preĝejo per trumpetsignaloj  
La alvenon de l' nokto anoncas hejnalaj:\*  
Inter la muskaj muroj misteraj murmuroj  
Kaj susuroj eksonas: rakontas la muroj  
Inter si pli la gloro de tempoj pasintaj,  
Kiam sur Wawel gloro brilaj reĝoj regis,  
Tumultis vigla vivo, brilis glavoj tintaj,  
Batalaj krioj eĥis, ĉevalhuf' bruegis;  
Ho, pri tempoj pasintaj de glori kaj armiloj,  
Kiam iris patrujon defendi la filoj,  
Heroo Kosciuszko gvidis batalvice  
La nacion al venko apud Raclavice.

Muskaj muroj, kuŝantaj en dormo silenta,  
Grizaj ŝtonoj, kovrataj per polvo jarcenta,  
Sonĝantaj pri pasinta glori de arda armo!  
Vekiĝu nun, kaj aŭdu! marŝas nova svarmo  
De novaj batalantoj sur Wawel potenca  
Por nova batalado obstin-pacienca!  
Ĝi marŝas por konkero de l' mondo malamika  
Kun kantoj kaj krioj en lingvo muzika!

Muskaj muroj de Wawel, ĉu vi nun aŭdas,

Kion ĉi svarmo kantas kaj kiun ĝi laŭdas?  
Ĉu vi miras, ke iras ĉi armeo stranga  
Al stranga batalado: paca kaj sensanga?  
Jen, por ili ja estas la sola armilo  
Tiu muzik' en buŝoj, kiun nobla filo  
De l' pola lando kreis, por ke Forta Voko  
Ekflugu ventflugile de loko al loko.  
Jes, miru, muskaj muroj! El ĉiu angulo  
De l' mondo svarmoj venis al blua Vistulo,  
Por festi homan feston kun nobla ekflamo  
Kaj por fari el Wawel la templon de l' Amo.

Kaj vi, ho noblaj filoj de la Pola tero,  
Kiujn vizitas nun la arme' de l' Espero,  
Aŭskultu pri la voĉoj strange melodiaj,  
Kiuj nun eksonoras super tomboj viaj!  
Ho, heroo kuraĝa, brilanta kaj glora,  
Kiun kovras ĉi tie la ĉerko marmora,  
Ekaŭdu, Kosciuszko! Ni venis admire,  
Ho helpu nin per brila ekzemplo inspire!  
Instruu nin, ho brila, brava batalisto,  
Pri leona kuraĝo kaj spita persisto,  
Ke per via kuraĝo kaj fajra intenco  
Ni venku kontraŭ ĉiu malica potenco!

Kaj vi, ho di-benita kantisto orbuŝa,  
Revinta en ekzilo kun amo kortuŝa  
Pri l' naskotero litva, kaj per sorĉa kreo  
Songinta la figuron de sinjor' Tadeo,  
Atendinta dum veoj de la nostalgio  
La savantan alvenon de nova Mesio,  
Kaj korpe nun kuŝanta ĉi tie ĉerkferme,  
Sed vivanta en verkoj kaj koroj eterne,  
Mickiewicz! al via kantado potenca,  
Pri la granda fratiĝo, jen estas parenca  
Kantosonoro, aŭdu! kaj helpu inspire,  
Malamo nian mondon mordadas dentŝire!  
Ho vian oran buŝon ni ege bezonus,  
Vian poetan voĉon ravante dolĉkantan,

Kiu per la potenco de l' vorto admonus  
Kaj alarmus la Koron obstine dormantan.

Starante el la bluaj ondoj de l' Vistulo,  
Sin pace rigardante en la ondspegulo,  
Jen streĉas sian turon al lazur' ĉiela  
La musko-mura Wawel — kastelo fabela.  
Kaj jen super la turo de la Katedralo,  
Kaj super la arĝente brila nubvualo  
Ŝvebanta tie kvazaŭ aglo blankflugila,  
Rigardu, nun eklumas stelo, strange brila,  
Kaj dum mallumon sternas la nokto karese,  
Jen, pli kaj pli ĝi brilas kaj brilas promese,  
Radiojn de Espero fajreras ĝi sorĉe,  
Entuziasmaj koroj salutas ĝin torĉe,  
Sur la dormantajn reĝojn de l' fabelkastelo  
Misterajn ombrojn ĵetas nia Verda Stelo.

(1931)

\* hejnalo: fanfaro.

## **LA KAPITAN' EL BERNO\***

(Honore al s-ro Stettler)

Hoj he! La mar' tempestas!

Danĝeraj ondoj krestas

kaj frapas sur la ripo

de la malgranda ŝipo

kaj ĝin kolere skuas,

la velojn vento truas;

mevoj eligas veon,

anoncas la pereon.

L' animojn ĝis radiko

ekregas jam paniko:

"Rifuĝi! Al boato!

Tuj venos lasta bato!"

Sed en la venta bleko

jen staras sur ferdeko

en sia gvida loko,

pli firme ol la roko,

kun firme certa mano

la kapitano.

.

Kaj ju pli letargie

l' espero ĉie svenas,

jen des pli energie

li direktilon tenas.

Kaj inter akraj rokoj,

kiujn ŝaŭmpolvo kovras,

tra l' plej danĝeraj lokoj

trankvile li manovras:

kaj kiam rif' minaca

jam ŝajnas ŝipon spliti,

li, kun lerteg' sagaca,

sukcesas ĝin eviti!

sed firma kaj sentima,

Kaj ĉi trankvilo fera,

persisto bonespera

kaj celkonscia gvido

plenigas nun per fido

la korojn. La ŝipanoj

postenojn siajn prenas,

kaj per fervoraj manoj

laboras, luktas, penas,

kaj, jen, la ŝipo — flugas,

triumfe ondojn jugas!

Se iom eĉ ŝirite,

ĝi kuras, kuras, spite

al ĉiu uragano

al la haven' — merite

de l' kapitano.

Ŝipanoj! Pro l' gvido,

pro l' peno kaj sindono,

pro l' enverŝita fido,

konsilo kaj admono,

pro l' firma kaj trankvila

manteno direktila

en la koler' tempesta:

ni danku nun tutkore

al kapitan' modesta!

Ni danku, ŝipanaro,

pro la kvaroncentjaro,

dum kiu vane vipis

la ventoj: li plu ŝipis:

amanto de libera

maro kaj moro: vera

gvidisto, klara, klera,

kaj modestmaniera,

egalanima

en ĉiu sort-alterno:

la kapitan' el Berno!

(1933)

\* Flugfolio disdonita por la ĉeestantoj de la 25-a UK.

## ADMONO

La grandan nodon  
hontinte estas tranĉi  
tiel bubaĉe.  
Oni ne fajfi devas  
pri l' mondo, sed ĝin ŝanĝi.

(1938)

## **AL LA EŬKARISTIA KONGRESO\***

Ĉe la Danubo, kiu per rubando  
Majesta metas inter land' kaj lando  
Ligilon firman, daŭran de jarmiloj,  
Kaj nerompeblan de la hom-armiloj,  
Nun gajaj himnoj, piaj psalmoj voĉas:  
La korojn milde reĝo Kristo kroĉas  
En nerompeble firma harmonio  
Per sankta sorĉo de la komunio.  
Donacon de la sango kaj la korpo  
De Dio, oferitan por homaro,  
Jen miloj kaj dekmiloj, ega maro  
Da homoj prenis al si en absorbo  
Feliĉa, dum la koroj arde batis,  
Ligitaj per *vinculum caritatis*.  
Kaj tra la sange disŝirita mondo  
Trakuras, kvazaŭ per elektra ondo,  
El centmil koroj voĉ' de unu koro,  
Sublime nobliĝinta per adoro  
De l' diohomo, kies sava saĝo  
Surteren portis benon de l' Mesaĝo.  
Kaj tiu voĉo, tiu koraklamo,  
Kiel korbato de l' ĉiela amo,  
Kun vigla vibro kaj kun ritmo festa  
Disflugas ĉien sur la ter' tempesta  
Kaj trovas eĥon en la koroj frataj  
Samvibre viglaj kaj samritme bataj,  
En kiuj vivas, per la save gvida  
Reĝ' Kristo, la Homaro sendivida.

Sed tiu voĉo trovas ankaŭ murdan  
Malamon, trovas nekomprenon surdan,  
Vojo-perdintajn korojn, ĉe idoloj  
Paganaj, reportantaj al la tero,  
Kiel dum la migrado de l' popoloj,  
La leĝon de la sango kaj de l' fero,  
Martirojn novajn, brulon de altaroj  
De l' Krista amo kaj de l' homa indo,  
Sangverŝojn de la cirko de l' cezaroj...  
Kaj antaŭ ĉiu ti anima blinda  
Ekmuĝas tiu voĉ' milionobla



Kaj krias tondre, en indigno nobla:  
Quo vadis, mundus? Antaŭ via salto  
En la abismon, antaŭ fal' el alto,  
Ho, haltu kaj rigardu dum momento  
Pri via glora verk', vi homa gento:  
La cerbo ja, pri kiu vi fieris,  
Kiel iam en Babel, jen liveris  
Al vi nur mondkonfuzojn, kataklismojn,  
Savo-promesajn, damnoportajn ismojn,  
Mizeron en abund', kaj por instigo  
De plej terura stulta memmortigo:  
Venenajn gasojn, flugmaŝinajn bombojn,  
Por fari senekzemplajn hekatombojn,  
Maŝinojn kreis al vi la genio  
Por sklavo, kaj vi iĝis jam nenio,  
Krom sklav' de via sklavo, ĉar en sino  
Vi portas la animon de maŝino!

Ho rekonsciu en la lasta horo,  
Ke vanta estas ĉio, sen animo  
Sublime nobliginta en adoro  
De l' diohomo! Venu por pilgrimo  
Al la altar' mistera, kie fumas  
Incens' de l' amo, kie arde lumas  
La korpo kaj sango, tra landlimoj,  
Al sankta unueco de l' animoj!  
Ĉar sola savo estas por la tero,  
Sub sankta signo de la di-ofero  
De ĉi neestingebla lum' interna,  
La dolĉa reĝ' de Kristo, reĝ' eterna!

(1938)

\*Kadre de la XXXIV-a Eŭkaristia Mondkongreso (Budapest, 1938) estis aranĝita la Unua Eŭkaristia Esperanta Mondkunveno. En la solena malfermo Kalocsay deklamis sian poemon.

## **SOLDATOJ MARŜAS...**

Soldatoj marŝas kante tra la strato,  
batali ili marŝas, tiacele,  
ke la liber' pereu, ke kruise  
plu tenu ilin en servuta stato

orgojla bankiero kaj magnato.  
Jen ili marŝas stulte kaj fidele,  
kaj dume luktas nun en mi duele  
senpova furiozo kaj kompatato.

Kun disdubiĝinta koro mi deziras  
la vivon al ĉi povraj, kiuj iras  
perei sub la fremda trud' barbara,

kaj mi deziri devas, ve, horore,  
malvenkon sangon al ĉi voj-erara  
hungara greg' — *nessun maggior dolore...*

(1944)

## **DEMANDO STRANGA**

Jes, certe jes, mi scias: ni meritas  
ĉi tiun punon de ĉiela fajro,  
ĉi tiun punon de la ŝtala hajlo,  
kiu la domojn kaj la ostojn splitas.

Sed ĉu de ĝusta loko nin vizitas  
ĉi plag' pro tio, ke ni sen salajro  
dungiĝis en la servon de kanajlo?  
Demando stranga, sed ĝi min ekscitas.

Ni kulpis, aĉe kulpis kontraŭ rusoj,  
ili nin rajtas puni per ŝtalŝprucoj,  
kaj tamen tiel krude nin ne batas.

Ĉu eble en infero bolŝevika  
pli kara estas kaj pli respektatas  
la vivo de l' popol' eĉ malamika?

(1944)

## **INTER RUINOJ**

En la suburba laboristkvartalo  
mi iras inter diskrevintaj domoj,  
inter perpleksaj, teruritaj homoj  
tuŝitaj de flugiloj de l' fatalo.

La suno svenas sub la fulgvualo,  
kaj ĉie montras diseriĝ-simptomoj:  
dezerta morno, ruboj kaj disfalo  
pri l' ĵusa hanto de l' militfantomoj.

Sur ruboj, kun mieno mortrikana,  
senkorpe kuŝas blonda kap' infana,  
el la buŝet' ellasas sangan fluon...

Mi pasas malespere kun rezigno:  
kia doloro — vidi ĉi detruon  
kaj ne havi rajton je indigno.

(1944)

## **RETROVO**

Popoloj elsangintaj, ĉu vi havas  
Ankoraŭ forton por kuniĝo frata,  
Dum vin nun kiel skurĝo senkompata  
La frosto kaj la senpaneco trafas?

Okuloj viaj de malsato kavas,  
Kaj la heredo de la abomenata  
Hokkruca stulto kaj frenez' mondbata  
Vin premas, ke vi krias: kiu savas!

Tamen, la mondo post la prov' terura  
Devas revivi kaj en vivo nova  
Forĵeti rubojn de l' pasint' malpura.

Kaj preni en la koron kun retrova  
Ĝojo la ĝermon de l' fratec' futura:  
La benon de l' heredo Zamenhofa.

(1945)

## **LA INTERNA IDEO**

Ni vidis, ke l' interna ideo, nobla revo  
de nobla koro estis nur iluzio vana:  
nur la facila vento flirtigis ĝin por levo,  
sed rompe forbalais la blovo uragana.

Ni scias jam, ke l' murojn de l' gentoj dividitaj  
la sento ne detruos per Jeriko-fanfaroj:  
aliaj fortoj gvidas la mondon, ne spiritaj,  
la Hom' sin mem ne regas, lin regas ja — la varoj.

Sankta Francisko tuŝis la fiŝojn per prediko,  
sed eĉ li ne predikis al fero kaj petrolo,  
kaj ĝuste tion volas la burĝa romantiko,  
kiam li sin mem trompas per sia pac-parolo.

Liberon al la Homo, ke ne plu aĵoj blindaj  
direktu lin, sed tiujn li regu per racio:  
jen sola eblo, por ke en faroj admirindaj  
fratiĝe kunlaboru nacio kun nacio.

La klas' de l' laboruloj, farinte tiun salton  
el land' de l' Neceseco en landon de l' Libero,  
instruos al la mondo la grandiozan arton:  
iĝi el sklav' de l' aĵoj la estro de la Tero.

Kaj tiam — la interna ideo, nobla revo  
de nobla kor' ne estos plu iluzio vana,  
ĉar ne facila vento flirtigos ĝin por levo,  
sed ĝi en cerboj ankros kiel racia devo,  
kaj ĝi en koroj ankros kiel instinkt' humana.

(1946)

## **KONGRESA SALUTO**

Bern, 1947.

Ho, fratoj en la signo de l' Espero,  
Forpasis do la tempoj de sufero!  
De kiam ĉesis la homar' tempesti  
L' unuan fojon povas ni kunesti,  
Dek jarojn post la ora jubileo.  
Kiaj dek jaroj! Kiom da hom-veo,  
Kiom da mortoj, kiom da turmento!  
Sufiĉaj ili estus por jarcento!

En nia historio sesdekjara  
Dufoje nin jam plagis sort' amara.  
Dufoje mutis pri l' Esper' la kanto,  
Dufoje preskaŭ mortis Esperanto.

Koncipiĝinte en animo sola,  
Ĝi kreskis je trezor' interpopola,  
Ĝin vartis diligenta kolegaro,  
Kaj — jen ĝi marŝis jam sen halt' kaj staro,  
Amasojn entuziasmajn por si gajnis,  
Sed kiam ĝi decide venki ŝajnis,  
Kaj post la solvo de l' interna krizo  
Triumfon volis festi en Parizo,  
Ekbrulis mond' — kaj ĝia belpromesa  
Juneco velkis de la flam' freneza.

Kaj kiam ĝi en sia morto ŝajna  
Revivis kaj kun pli-ol-iam-ajna  
Viv-povo ree marŝis tra la tero,  
Kaj sur la rekta vojo de prospero,  
Elaste, freŝe, riĉe de kulturo  
Ĝi portis siajn fruktojn de maturo, —  
Atakis mondon, kun potenc' eksterma,  
Faŝismo, tiu monstro plej moderna:  
Pri rasa supereco sonis gurdo  
Por muzik-akompan' de rab' kaj murdo.  
Ho, tempoj de la senespera nigro!  
Revenis la epok' de l' popolmigro,  
Landon post land' invadis novaj gotoj,  
Kaj kien ili tretis per la botoj,  
Kien atingis per flugil' vesperta,

Mortis la lumo de la stelo verda.

Popoloj venkis — ili venki devis:  
La bruna best' en sia groto krevis.  
Ĝi krevis, sed ne mortis la faŝismo,  
Ĝi revas jam pri nova kataklismo,  
Kaj ĝi infektas ĉie la animojn,  
Milvoĉe disvastigas dubojn, timojn,  
Volante tiel kun infera ruzo  
Profiti ree el la mondkonfuzo.  
Rezistu al ĉi mondo-malamiko!  
Se vi, en embaraso de paniko,  
Parolas treme pri milit' venonta,  
Vi helpas ĝin en ĝia plan' senhonta.  
Ho liberigu vin de l' superstiĉo,  
Ke ni de tiu monstra malfeliĉo  
Ne povas savi nin: ĝi venos certe.  
Samideanoj! krias mi averte:  
Tiu dubemo estas kvazaŭ pesto!  
Deklaru plej decide, kun protesto  
Al ĉiu, ĉu trompanto, ĉu trompito:  
***Ne estos plu, ne estos plu milito!***

Ĉar en la epoko de l' atomoj  
Ĉio dependas de la simplaj homoj.  
Kaj ke nek la fumantaj urbruinoj,  
Nek amasiĝ' de orfoj kaj vidvinoj,  
Nek eĉ la eksplodiĝ' de l' tuta mondo  
Ja helpos la popolojn al la fondo  
De la abundo kaj de l' viv' sentima,  
Ke la milito estas ne nur krima,  
Sed ankaŭ stulta oferad' de sango,  
Ke l' atombombo estas bumerango,  
Ke sur la sojlo de la mondfeliĉo  
Malsaĝ' ridinda estus neniiĝo  
Kaj flug' al ĉiuj flankoj de l' etero:  
Ĉio ĉi estas tiel simpla vero,  
Ke eĉ plej simplaj homoj ĝin komprenas.  
Kaj la decid', ***al ili*** apartenas!  
Ne eblas fari sangan politikon,  
Se ili faras grandiozan strikon  
Kontraŭ la puŝ' de l' mondo al abismo.



Vivu la ĉiovenka optimismo.  
De la frat-popoloj en labor' laŭplana  
Por mondo de abundo, mondo sana!

Por tiu mondo sana, mondo paca  
Ni eklaboru kun fervor' sagaca!  
Kaj, por ke ni ne restu eta sekto,  
De nun alia estu la direkto  
De nia vojo sub la stel' kvinpinta!  
Jam ĉesu tia kredo, nin trompinta,  
Ke ni por la sukceso havas ŝancojn,  
Se ni konvinki penas la instancojn!  
Ni ne konfidu nin je la bonvolo  
De potenculoj, sed je la popolo!  
De-sube supren — tiu marŝo traos  
Ĉiujn obstaklojn, barojn forbalaos,  
Ĉar voĉ' popola estas voĉ' de Dio!  
Ek! Ni ne timu esti la gvardio  
De l' Progreso! El ebura turo  
Descendi kaj batali por futuro  
De l' liberemaj, laboremaj homoj,  
Kaj kontraŭ la faŝistaj mondfantomoj  
Inter la vicoj de l' amasoj grandaj,  
Ĝis en la koroj, cerboj ĉiulandaj  
Ekradikiĝos firme la konscio,  
Ke la hom-paco kaj la mond-racio  
Posedas en ni fortan federanton.  
Ni tiel vidos venki Esperanton.

(1947)

## **NEŬTRALECO**

Okazis kolizio akra  
Inter la opionioj malaj:  
Ĉu pri l' faŝismo mondmaskara  
Ni povas esti neŭtralaj?  
"Internacia krim'!" — asertis  
Unuj — "Ĝi estas kondamninda!"  
Aliaj kun terur' avertis:  
"Ne! Estus partieceo blinda!"  
Sinjoro tra la voĉtumulto  
Kriis kun senkompara vervio:  
"Demokratio estas kulto  
De homaj rajtoj, sen rezervo.  
Ni neŭtralecon nian gardu,  
Ĝin difektante per nenio,  
Kaj kompreneme ni rigardu  
Al ĉies sankta opinio!  
Netolerem' min ne infektas,  
Ĉies liberon mi estimas.  
Jen — nefumantojn mi respektas,  
Kvankam je fumi mi kutimas."

Mutiĝis ĉiu post la aŭdo  
De tiu trafa argumento,  
Ĝis fine iu, kun aplaŭdo,  
Rimarkis milde, por konsento:  
"Tre prave, vere! Ni akceptu,  
Ke ĉies rajton mi estimas,  
Kaj la murdistojn ni respektu,  
Kvankam ni murdi ne kutimas."

(1947)

## **AL NEŬTRALULOJ**

Vi estas, jes, neŭtralaj, kiel Luno,  
Lumante same, kun arĝentaj flatoj,  
Al la rabistoj kaj la prirabatoj.  
Vi lumas pale: kia oportuno

Por la murdistoj gliti en imuno  
Sinŝtele en la duonlum' de l' stratoj,  
Tra l' ombra labirinto de l' merkatoj,  
Por nova krim' prepari sin sen puno!

La Sunon al ni! kiu per lumfaskoj  
Penetras senindulge tra la maskoj,  
Montras la lupon sub la ŝafa lano,

Ke l' popol-malamikoj, en la turpo  
De sia tuta nudigita kulpo  
Tremegu, kun la sango sur la mano!

(1947)

## **LA SUBTASOJ**

Pro l' subtasoj, pro l' subtasoj,  
Kiuj flugas tra l' aero,  
L' okcidenta duonsfero,  
Estas nun en enbarasoj.  
Sed mi diras al amasoj  
Scivolantaj al la vero:  
Trankviliĝu pri l' afero,  
Tie flugas nur anasoj!

(1947)

## **DISCIPLINO**

Okazis foje al germano  
En varma tago de somero,  
Ke ekdeziris li per bano  
Sin refreŝigi en rivero,  
Li siajn vestojn do demetis,  
Plezure sin en akvon ĵetis,  
Kaj naĝis gaje kiel fiŝo.  
La ondoj lin karesis flate,  
Sed jen — li legis sur afiŝo:  
"Naĝi estas malpermesate  
Ĉi tie!" Kaj li tuj obeis:  
Ne naĝis, dronis kaj pereis...

Por ke ni tiru ĉe la fino  
Konkludon el ĉi akcidento:  
Tre bona estas disciplino,  
Ne manku tamen la prudento!

(1947)

## **MARX**

En labirint' malluma, tra densa voj-zigado,  
La homoj blinde stumblis sen lumigil' spirita,  
Kaj tiu ret' obstakla, de ili mem farita,  
Aspektis nehelvebla kiel natura plago.

Fetiĉoj paŝon baris, mistika rev-imago  
Per voj' erara trompis. En la nebulo mita  
La manojn pie levis la penso hipokrita,  
Ke pri l' mond-ordo kruda ne helpas homa ago.

Sed Marx fetiĉojn romp'is per la martel' de l' vero,  
Ekŝanceliĝis muroj de l' labirint-karcero,  
Kaj malfermiĝis vojo al la libero hela.

Spirit' de Marx, lumigu tra la anim-obskuroj,  
Ĉar talpojn vane vokas la flago ruĝe ŝvela,  
Nur la vidantojn logas la klaro de l' lazuroj!

(1947)x

## **JES JA**

Marxist' mi estas, jes ja, kaj fiera  
Pri tio! eĉ se moki vi arogas,  
Ke tia "katekismo" min allogas.  
Ja kion fari, se ĝi estas vera!

Mistero, rev', ekzalto, bel' etera  
La paradizon super nubojn lokas,  
Kaj la piedoj, dum l' anim' mensogas,  
Jen vadas en la sanga marĉo tera.

Se trafis nin tertremo kaj inundo,  
Kaj novaj nin minacas, ĉu sur grundo  
Ŝancela serĉi floron esoteran?

Ni luktu kontraŭ krimoj kaj malsaĝoj,  
Kaj se ni faris jam la ordon teran,  
Nu, venu beloĵ, revoj kaj miraĝoj!

(1947)x

## **ENGELS**

Amik' de Marx, amiko kaj frato pli amika,  
Subteno kaj kunulo en lukto kaj en kreo,  
Kunulo en akuzo pri laborsklava veo,  
Kunulo en malkovro de l' mond' dialektika.

La mondon Hegel kaptis, kaj en sistem' unika  
Ĝin knedis konsistanta nurnure el ideo.  
Tez', antitez', sintezo, kaj neo de la neo:  
Pens' leĝoj regis mondon el nura pens' logika.

Sistem' mirinda estis, sed sur la kap' ĝi staris,  
Ĝis la du filozofoj la grandan turnon faris,  
Starigis ĝin, reale, de l' kap' al sur la plandoj:

Mond-leĝoj regas penson, spegulon de l' mond-sfero  
Kaj la sistem' turnita ekstaris, kaj tra landoj  
Ekmarŝis firmapaŝe, triumfe, por konkero.

(1947)x

## **LENIN**

Milmova amasestro, stratego de l' tertremo,  
Skuinta mondsesonon ĝis fundo fundamenta,  
Geniul' fandanta en si laŭ grundo monumenta  
La oron de l' scienco kun ŝtalo de l' agemo!

Esper' de ĉiu koro ĝemanta de subpremo  
En fumaj fabrik-urboj aŭ tribo orienta,  
Terur' de l' mond-piraba uzuro insolenta,  
Kiun la ŝvit' kaj sango nutras per tantiemo!

Nun la Ruĝa Placo sur marmor-katafalko  
Ripozas la kranio kun la titana arko,  
Sed viglas plu kaj gardas kaj lumas plu por gvido

La Viro ĉiospita, klarvida sen indulgo,  
Kaj simpla inter simplaj, sed de l' simpluloj fido,  
Martelo de epokoj, mond-krea demiurgo!

(1947)x

## **STALIN**

Konstrui socialismon sur sovaĝ-stepa grundo  
Spronante ducent gentojn por agoj anim-fandaj,  
Konstrui por modelo de gentoj ĉiulandaj  
La mezuratan mondon de paco kaj abundo:

Jen task' farata de vi sur la Lenina fundo,  
Semant' el kies semoj elkreskas urboj grandaj,  
Sorĉist', laŭ kies frapo disfluas larĝrubandaj  
Kanalaj tra dezertoj por porto de fekundo.

Georg' tretinta kapon de l' diverĝisma drako,  
Plej firma rok', sur kiu rompiĝis la atako  
De l' blankaj kaj de l' gotaj hordoj ĉe Stalingrad':

Sub via gvido marŝas rusoj, burjat-mongoloj,  
Uzbekoj, latvoj, gruzoj, turkmenoj — frat' kun frat'  
Al riĉ', liber' kaj scio — paŝtisto de popoloj!

(1947)x



## **OKTOBRA ODO AL LA TRIDEKJARA SOVJETUNIO\***

Ho granda dudek-kvina de Oktobro,  
Kiam amasoj rulis sin lavange,  
Gvidataj de Lenina fajra sobro,  
Kaj la Epokon Novan baptis sange:  
Per la nerezistebla sturm' alflanke  
Ĵetis grandburĝon, bienulon, caron,  
Potencon donis al popol' senmanke,  
Kaj la Laboron metis sur altaron!

La mond' jarmilojn vivis en konfuzo  
De besta lukt' por vivo: klan' kun klano,  
Klaso kun klaso, per armil' kaj ruzo,  
Batalis krude por pli granda pano.  
Salut' al vi Oktobra Uragano,  
Forbalaanta ĉi epokon feran,  
Por ke l' homar' laŭ solidara plano  
Komencu sian historion veran:

Epokon de la Scio kaj Libero,  
En kiu kreas sin la Homo Nova,  
Kiu la kapon tretos de l' kimero,  
Ke l' hom' eterne restas nur senpova  
Ludil' de l' aĵoj, — kaj kun filozofa  
Klarvido regos super ĉiu forto  
Natura kaj socia: seren-brova  
Forĝanto de l' komuna-propra sorto.

Tra mar' de sango kaj sufero gvidis  
La lukta voj' al tiu cel' sublima:  
Ĉirkaŭe la malnova mond' insidis,  
Ribelis hordoj por atako krimea,  
Sed venkis brav' kaj sinofer' senlima,  
Triumfis Stalin apud Stalingrado,  
Kaj la popol' libera, jun-anima  
Sin donis al mondkrea konstruado:

Titana febro de kvinjaraj planoj  
Hejtis la korojn, kaj la organizo  
Faris miraklojn per fervoraj manoj

Konkuraj pri masono, forĝo, ĉizo.  
Dum transe oni dronis en la Krizo,  
Tie preparis ĉi klopod' pasia  
Hejmon, ĉe kiu estas pala grizo  
El revo plej aŭdace fantazia.

Sed la Mallum' embuskis al la Lumo,  
La Detruem' embuskis al Kreado:  
Elsendis la Obskura Frenezumo  
Siajn vandalajn hordojn por invado.  
Kaj kredis jam, ke li en marŝparado  
Metos la mondon sub la jugon brutan,  
Sed Stalin venkis lin ĉe Stalingrado,  
Patrujon savis, kaj la mondon tutan.

Esper' de l' mondo, mondo de l' Espero,  
Sovjetunio, vi, forĝej' titana,  
Kies marteloj tintas sur la fero  
La sanktan himnon de l' Epok' Humana,  
Kie ne diktas la profit profana,  
Strebanta blinde por ĝiskreva ŝvelo,  
Kie la homo estas ne du-mana  
Maŝino plu, sed ĉies ĉefa celo!

Patrujo, kie cent kaj kelkdek gentoj  
Sin streĉas al la lumo de l' konscio,  
Kaj el mizero besta, el turmentoj  
De la subprem' despota, je nacio  
Ellevis sin per la konstitucio  
Stalina, kiu donis arton, skribon  
Al sovaĝuloj, kaj por ambicio  
Kultura vekis elmortontajn tribojn!

Popol' libera kaj liberiganta,  
Kun kies helpo ankaŭ ni, hungaroj  
Saviĝis de l' germana prem' juganta,  
Sub kiu ĝemis ni dum kvarcent jaroj,  
Kaj kiu ĵus, per la hitler-barbaroj,  
Nin jam minacis per ekzist-estingo!  
Nun, dank' al vi, ekiris ni por faroj  
De la Progreso kun potenca svingo,

Kaj marŝas packonkure kun najbaroj,  
Liberiĝinte de l' malam-inkubo,  
Sub kiun, por disfermi nin per baroj,  
Nin sorĉis ride profitanta grupo.  
Sub via ŝirmo, jen, de ŝtup' al ŝtupo  
Ascendas gentoj sur ĉi tero-peco,  
En sangsterkitaj valoj de Danubo,  
Sub la standardoj de l' popol-frateco.

Ĉi tiun frat-konkordon, pacan kreon  
Vane surŝprucas ĉia kalumnio,  
Kaj vane volas puŝi en pereon  
Malicaj fortoj: rompos jam nenio  
La ordon de l' Labor kaj Harmonio,  
Ĉar gardostaras kontraŭ la minaco  
Popol-potenco: la Sovjet-unio,  
Bastiono firma de l' homara paco.

Sovjet-unio, mondo de l' Espero,  
Esper' de l' mondo, vi, forĝej' titana,  
Kies marteloj tintas sur la fero  
La sanktan himnon de l' Epok' Humana,  
En kiu la homaro, ĝis nun nana,  
Elkreskis jam, por kreski je giganto,  
Hozana al vi, granda land', hozana  
Al granda Stalin, la saĝul-gvidanto!

(1947)x

\* Deklamita en la festo de Hungarlanda Esperanto-Societo kaj en la Hungarlanda Esperantista Societo Laborista por la tridekjara jubileo de la Sovjetunio.

## **BALADO PRI LA ATOMBOMBO\***

Hip, hura, jen la atombombo,  
La mortigilo sen rival'!  
La kompatinda packolombo  
Baraktas en danĝer' de fal'.  
Jen, eblas por la mondbatal'  
Disliberigi la fantomojn,  
Ĝis plenumiĝos la fatal':  
La Ter' solviĝos en atomojn.

Jam morte putras, sed al tombo  
Ne volas fali Kapital'.  
Ĝi vivon maskas kun aplombo  
En mortodanca bakĥanal'.  
Jen, homoj, al vi sangpokal',  
Elsorbu el ĝi la aromojn,  
Ĝis la festenon finos knal':  
La Ter' solviĝos en atomojn.

Ĉu helpus do la hekatombo,  
La pluv' de fajro kaj de ŝtal',  
La granda landbalaa trombo  
Al estroj de la mon-ĝangal'?  
Ne! Sed por savi de skandal'  
La bankrotkapajn ekonomojn,  
Necesas io! Nur detal':  
Se l' Ter' solviĝos en atomojn.

Princoj de l' Mono! Ĉi regal'  
Ne logos al vi plu la homojn,  
Sed sub vi vere, jen final':  
La Ter' solviĝos en atomojn.

(1947)

\* En angla traduko de K. Hall, en: La Brita Esperantisto 1983:sept.-okt. p. 269.

## **LA BALADO DE GREKLANDO**

Kio okazas en Greklando?  
Ho Byron, se vi vidus tion!  
La angloj faris, laŭ komando  
De Churchill, la demokration  
Per tankoj. Ili ĉi metion  
Diable scias, vi rimarkos,  
Tamen ne gajnis simpation  
Ili de generalo Markos.

Plu kantis Bevin, Labour-grando,  
Tiun Churchill-an melodion:  
"Mi per monark-faŝista bando  
Demokratigos la medion,  
Kaj, ke mi havu garantion,  
La demokratojn mi elsarkos."  
Sed ĉi konfuzan rapsodion  
Surkraĉis generalo Markos.

Truman, por solvi la demandon,  
Alsendis urĝan stipendion,  
Kanonojn donis kiel frandon:  
Popol' malsata, danku Dion,  
Aŭ pendu! Vian tragedion  
Toleru, ĝis l' okuloj sparkos!  
Sed venke la liber-gvardion  
Jam gvidas generalo Markos.

Reĝo! Danĝer' la dinastion  
Minacas! Se vi ne forbarkos...  
Nu, eble al vi amnestion  
Donacos generalo Markos.

(1948)x

## **LA BALADO DE FRANCO**

Ni laŭdu lin, kaŭdilon Franco,  
venkinton super la hispanoj:  
batalis ja ĉe lia flanko  
la maŭroj, la fremdlegianoj,  
kaj la italoj, la germanoj,  
kaj kontraŭ li — nur la popolo,  
al kiu li, kun sangaj manoj,  
la ŝnuron metis ĉirkaŭ l' kolo.

Nun sin ekspedas, sen afranko,  
al li nacistaj karavanoj,  
kaj tiujn nutras li, por danko,  
krom la espero per ĉampanoj,  
sed se l' mizero de l' kabanoj  
sin riskas eĉ per ekparolo,  
tion respondas li per ĉanoj,  
aŭ ŝnuron metas ĉirkaŭ l' kolo.

Tamen prosperas li sen manko,  
ĉar li dancadas per kalkanoj  
obeaj laŭ la fajf' de l' Banko,  
kaj hipokritaj puritanoj  
protestojn kvakas kiel ranoj,  
Sed sendas helpon por konsolo,  
dum li paradas sur ekranoj  
orden-rubande ĉirkaŭ l' kolo.

Kaŭdilo! ĉesos ĉi sangbanoj,  
kaj ĉi laŭfajfa farandolo:  
mondjuĝ' al vi, al viaj klanoj  
la ŝnuron metos ĉirkaŭ l' kolo.

(1948)x

## VILAĜIRADO\*

### I.

Ŝarĝaŭto sur landvojo kuras  
dimanĉe en mateno frua:  
la laboristoj alveturas  
vilaĝon en humoro brua.  
Al fratoj-kamparanoj venas  
kun helpo la vilaĝirantoj,  
kaj laŭ la voj' la kampo plenas  
de gajaj laboristaj kantoj:

"Niajn kantojn gaje portas  
la vento,  
vilaĝiras laborista  
taĉmento.  
Frat' kampulo, jen la mano,  
ĝin prenu,  
malriĉulon malriĉulo  
subtenu!

La tegmenton de l' lernejo  
ni faros,  
ponton, puton, laborilon  
riparos.  
Ankaŭ l' pastro ridu fine  
sen veo:  
iru bapti al sentrua  
preĝejo!".

En vilaĝmezo la ŝarĝaŭto haltas,  
La laborista grupo de ĝi saltas.  
Kunvokas la kampulojn la gvidanto,  
kaj, laŭ la senco de la supra kanto,  
rakontas, kial venis lia grupo.  
Sed entuziasmon li ne tre rikoltas:  
la homoj staras kun suspekta dubo,  
kaj liaj vortoj senresone mortas.

Ja suspektinda estas ĉio urba:  
sinjora ruzo, kampiltrampo turpa,  
jen kion memorigas por averto  
al la kampuloj la jarcenta sperto

ĉe la aŭskulto de promesoj belaj.  
Do ili staras mute kaj rigide,  
kaj, kvazaŭ ili estus surdorelaj,  
disiĝi ili volas malkonfide.

"Aŭskultu, homoj, ni nenion petas,  
ni volas helpi!" la gvidant' ripetas.  
"Ĉu vi ne havas ion riparotan,  
se ne alian, truan fundon potan?  
Riparon ni senpage entreprenas."  
"Pro kio do?" demandas homo aĝa.  
"Pro kio? Nu, ĉar interapartenas  
la laboruloj urba kaj vilaĝa."

Rompiĝas fine tamen la glacio,  
kaj vigle, kun kurioza ambicio  
la laborista grupo eklaboras,  
martelas, ĉizas, gisas, raspas, boras.  
Kiel la frat' pli aĝa al pli juna  
sindone helpas la vilaĝiranto  
al la kampul' ĝis la subiro suna,  
festante la dimanĉon per ekkanto:

"La marteloj gaje bruu,  
la patrujon ni konstruu,  
hura hej!  
Por ni mem mi ĝin konstruas,  
nia ŝvito por ni fluas.  
hura hej!

Plan' trijara en la vejnoj,  
el la ruboj kreskos hejmoj,  
hura hej!  
Unu-du-trijara, duro:  
por ni floros la futuro,  
hura hej!

Hej, brilaj ventoj blovas  
flagon en aero,  
hej, estas surskribite:  
vivu la libero!



Hej, brilaj ventoj, blovu:  
flago, ŝvelu vente!  
Ĝis morgaŭ ni la mondon  
turnos fundamente."



Mi jam skribis sur la murgazeto pri mia plendafero  
per funebre nigraj literegoj sur flamruĝa papero.  
Mi surskribis: mian koron ŝtelis de mi ama pirato,  
ĝin ordone al mi redonigu la Uzin-Komitato.

Sed la U. K. tiel min respondis je akuza pretendo,  
ke la U. K. en aferoj amaj estas sen kompetento.  
Kies koron oni ŝtelis, tiu ĝin reŝtelu per finto,  
kaj, se lerta, ŝtelu ankaŭ kune koron de la ŝtelinto.



"Jam ree produktas fabrikoj,  
kaj muĝas la radoj dum kur',  
dirante al mil mil amikoj:  
al la laborist' la futur',  
al la laborist' la futur'.

La hejm' ree hejmo jam estas,  
viv' kreskas el ruboj de mur',  
kaj trans ĉia plag' manifestas:  
al la laborist' la futur',  
al la laborist' la futur'.

Plenigu nin ago kaj volo,  
ni kreu en nobla konkur'.  
Patrujon konstruas popolo  
por la laborista futur',  
por la laborista futur'."

Vespere, kiam nia grup' ekiras,  
ĉar jam la okan montras la horloĝo,  
demandas la gvidant': "Ĉu vi deziras,  
ke ni revenu?" "Jes" — respondas voĉo  
de homoj pluraj. Montras jam simptomoj,

ke iom cedas la anim-rezistoj.  
Avinjo diras: "Ha vi bonaj homoj!  
Domaĝe, ke vi estas komunistoj."

## II.

Do — la uzin' adoptis la vilaĝon,  
aranĝas tien la vizitvojaĝon  
en ĉiu tago de dimanĉo,  
kaj en ĉi nesto post la dors' de Dio,  
droninta en la marĉ' de apatio,  
pli kaj pli jam montriĝas ŝanĝo.

La kamparanoj jam ne staras gape,  
kiam la laboristoj martelfrape  
klopodas por ilia bono,  
el la fervoro mem instigon ĉerpas,  
ĉe l' rekonstruo de la ponto helpas  
ne atendante je admono.

Jam ili havas emon kunsidi.  
Ho, kia ĝojo estas al ni vidi  
la diskuteman kompanion!  
Liberiĝinte de l' ĝendarm-infekto,  
ili sen ruze straba cirkonspekto  
eldiras sian opinion.

La turon de l' preĝejo bombo frapis,  
la sonorilon la saguloj rabis  
por ĝin transfandi je kanono,  
sed inĝenier' alvenas, planon faras,  
kaj sekvas granda tag': la turo staras.  
Eĉ, jen, por Pentekosta dono,  
mister', de kie, venas sonorilo,  
kaj kiam el la turo kun jubilo  
ĝi eksalutas helsonore,  
moliĝas eĉ la pastro katolika,  
kaj li ne povas en parol' publika  
ne diri sian dankon kore.

Kaj tiel, de vizito al vizito  
ŝanĝiĝas la malfido kaj la spito  
je amikeco kaj je amo.

Iudimanĉe la vizit' forrestas.  
Tuj ekscitite la vilaĝ' protestas  
per urĝe plenda telegramo.

Por granda bat' al loka reakcio,  
estiĝis fine la traktor-stacio  
gapata mire, kun respekto,  
eĉ, kiel realiĝon de miraĝo,  
en iu tago festas la vilaĝo  
la enkondukon de la elektro.

Vespere en la nova vilaĝklubo  
programas la uzina kultur-grupo  
kaj faras grandan sensacion.  
Ĉeestas eĉ la menciita avino  
kaj ridas, larmas, provas eĉ je l' fino  
kunkanti la Internacion.

(1948)

\* En ĉeĥa traduko de M. Lukáš, en: Esperantisto (Praha) 1951:10, p. 111-112.

## **LA VENKONTOJ**

Al J. S. Dinwoodie

Poeto, splene de acerbo  
vi fantaziis, ke pereos,  
kion nur kreis, kreas, kreos  
la homa man' kaj homa cerbo,  
kaj regos la mondvenka herbo.

Ludo de ritmo kaj de rimo  
efikis tiel forta min, ke  
ĝi preskaŭ trafis min konvinke  
kaj min dronigis en deprimio.  
Ribelis, tamen, la animo.

Mi spitis do al ĉi aŭguro,  
kaj mi demandis ĉi-koncerne  
la herbojn. Ili min konsternis  
aŭskultis, kaj, je mia ĵuro,  
respondis jenon per susuro:

"Ho, ĉu ni estus malamiko  
de l' homo? Tia dir' insulta  
nin batas por la servo multa?  
Jen — homojn nutras per la spiko  
parencio nia: la tritiko.

Ni estas ankaŭ mem ornamo  
de homaj parko kaj ĝardeno,  
ni homojn servas por vivteno:  
el ni fariĝas la ŝaflano,  
la lakto en la bovina mammo.

Ne vivus homoj sen la verdo,  
kiu ilian domon zonas.  
Kaj homojn ankaŭ ni bezonas:  
nin glutus sen ilia lerto  
iom post iom la dezerto.

Jen la komuna malamiko:  
La sablo! Kien ĝi atingas,

ĝi verdon de la viv' estingas,

kaj per tavolo' de granda diko  
faras Saharon de Afriko.

Sed spitas homo al la sablo,  
kanalojn metas, kaj riveroj  
ekfluas tra l' perditaj teroj;  
ĉi farojn de la homkapablo  
tuj sekvos verdo kaj agrablo.

Ĉu do nin eblas malaprobi?  
Kun homoj luktas ni komune,  
kaj venkas! Ĉar, marŝante kune,  
baldaŭ eĉ la dezerton Gobi  
ni povas per verdaĵo robi!"

Poet' de spleno kaj acerbo,  
por serenigi vian saĝon,  
mi sendas al vi ĉi mesaĝon:  
"Marŝas kun frata interhelpo  
venkontoj kunaj: hom' kaj herbo!"

(1949)

## **AL MARJORIE BOULTON**

Sur la marĝenon de ŝia libro "Kontralte"

"Ho sankta Sappho, vi mielrideta,  
vi violbukla ..." — jene sonis liro  
Alkaja iam, jene sub impeta  
impuls' al vira Sappho kantis viro.  
Sed kiel de marmoro, la admiro  
refalis rebatita, kaj eĉ peka  
stampiĝis, ĉar malpura deziro...  
Pro kio do, per kia sorĉ' reveka  
el sub la dika polv' biblioteka  
ĉi du fantomoj lumaj nun min hantas:  
Alkajo juna kaj la Muzo deka?  
Nu, ĉar poeto spite juna kantas  
al nia Sappho, ĉar mi la tumulton  
de sentoj kantas al Marjorie Boulton.

Post kiam Eros faris sian pafon  
al ŝia koro, time li forkuris,  
ĉar tiu kun la sang' elĵetis lafon,  
kies bruliga ardo lin teruris.  
La am' virinojn multajn jam torturis,  
sed ĉu animon sian ĝis tenebraj  
profundoj iu sonde jam mezuris  
tiel kuraĝe, kiel en ĉi febraj  
konfesoj montras la neforgeseblaj  
sinsekcoj de konsterna sinceremo:  
memoroj voluptemaj kaj funebraj,  
sopiroj jen ekbrilaj kiel gemo,  
jen nigraj, revokantaj sangan kulton?  
Ho, ĉasta bakĥantin', Marjorie Boulton!

Kondukas nin kavaliro dama,  
mi sekvas ŝin logate de vojaĝo  
tra la kratero de animo flama.  
Virin-tenero kaj virin-sovaĝo  
tie la ĉenojn de la frida saĝo  
streĉadas en ribelo katenita.  
Komence iras mi tra fe-pejzaĝo  
inter knabinoj kun la am-evita  
pastrino de diinio Afrodita.

Nun pensoperloj ravas min sur sombra  
velurtalaro de revad' medita,  
nun tril' lasciva kiel kver' kolomba,  
sufokiĝanta plore en singulton...  
Tiel mi vagas kun Marjorie Boulton.

(1956)

## **KALENDARO**

### **Dediĉo**

De kor' akceptu kore ĉi robajan  
Kolekton, iom galan, iom gajan,  
Amik', en "intelekta simbiozo",  
Waringhien, drogman' de Omar Kajjam!



***La kalendar' surtable al mi diras:  
"La tagoj unu post alia iras,  
Kaj ĉiutage vi deŝiras tagon,  
Ĝis fine unu tago vin deŝiras."***

### **Januaro**

Per frostpikil' nin pelas Januaro  
Rapidi sur la glita trotuaro  
Al hejmo, kie sonĝas la fenestroj  
Floretojn blankajn, brilajn de muaro.

### **Epifanio**

Kasparo, Baltazaro, Melĥioro  
Pilgrimis puranime por adoro,  
Sed ve! la Stelon kaj la Vojon perdis,  
Nun staras kun la mirho, nard' kaj oro.

### **Voko**

Ho Sun', returne de Kaprikorno,  
Rapidu, premas min la frosta morno,  
Rapidu, rekonvertu la adeptojn  
El la hereza kulto de la forno!

### **Oranĝo**

Dum Vintro sur la branĉoj de l' aleo  
Prujnreton teksas, morna araneo,  
Oranĝo, vi elsorĉas la aroman  
Lazuron de la Mediteraneo!



## ***Tento***

Frostintaj longaj flakoj min inviti  
Ne ĉesas sur glacio glata gliti:  
"Nu, startu brave! Tiel bela estas  
La aĝon spiti, kaj la ostojn spliti!"

## ***Februaro***

Tiran' reganta per nebul' kaj gelo,  
Nur furiozu! Vana la kruelo.  
Degelos gard' poltrona: la neĝhomoj,  
Kaj vin ne savos de l' printemp-ribelo.

## ***Nebulo***

Mi vade vagas tra nebula denso.  
Ĉu estas vero aŭ nur tromp' de senso,  
Ke min en juna pompo preterŝvebis  
Anĝelo inter nuboj el incenso?

## ***Karnavalo***

Danc', kanto, ŝercoj sparkaj kiel tindro.  
Princ' Karnavalo ĵetas el cilindro  
Konfetojn al la homamas' jubila.  
Kaj morgaŭ — nur ĉifonoj, ruboj, cindro.

## ***La Aŭdaca***

Ankoraŭ froston blovas la trumpeto  
De l' vento, sed la Vintron malkvieto  
De tim' ekregas: jen, impertinente  
Tra l' neĝo boris sin la galanteto.

## ***Degelo***

Ĉip, ĉir, ĉip, ĉir, ĉip, ĉir — senĉese laŭtas.  
De l' tegmentrand' falante plaĉe plaŭdas  
La gajaj gutoj ... El degelmuziko  
Jam la hirundan ĉirpon mi elaŭdas.

### ***Marto***

Fendiĝas la enua nubkovrilo  
Kaj sub la varma varto de l' sunbrilo  
En la animo vintrolaca ŝvelas  
La ŝaŭmo de la Marta maltrankvilo.

### ***Printempa Rivero***

El la rivero por moment' emerĝas  
Arĝenta perĉo, kiu certa serĉas  
La dolĉon de l' printempo: sur la ondojn  
La ora sun' mielon puran verŝas.

### ***La Ŝtelisto***

Stratbubo Vent' kun fajfa kapriolo  
Galopas, haltas nur ĉe kariolo,  
Kaj huŝ! plu kuras kun odoro dolĉa,  
Ŝtelita de vendisto de violo.

### ***Ekscito***

Ho Marto, kiel vi tra l' vejnoj pulsas!  
Pro vi eĉ la maljuna kor' ekskursas  
Al vojoj de la vivplezur'. La mondon  
Por amo kaj ribelo vi impulsas.

### ***La Rivereto***

Senbride kuras freŝa rivereto.  
"Ho restu!" flustras floroj kun koketo,  
Sed tiu bubo saltas plu senbride,  
Neretenebla per amloga reto.

### ***La Kverko***

Engravurita koro, ama verko  
De juna paro, flavas sur la kverko.  
La arb' ilian amon ombris foje,  
Por la pranepo estos eble ĉerko.

## ***Aprilo***

En blu' alaŭdo kantas kun delico.  
Nubet' subita ĝin kun ŝercmalico  
Alŝprucas, oj! Sed baldaŭ la kantiston  
Karesas ree bril'. April-kaprico.

## ***Hirundoj***

Hirundo! Eĉ hirundoj! Ho salutojn!  
Plezure estas vidi viajn fulmajn flugojn.  
Kun ĉarma ĉirp' alportas vi someron  
Kaj kun ĝi por knabinoj la lentugojn.

## ***Arĝento Aprila***

El krispa greg' de nuboj el arĝento  
Ekduŝas dense pluvoj el arĝento.  
La sun' ridetas dume al la flakoj,  
Kaj ili brilas — ruboj el arĝento.

## ***Palmarum***

Li venas, venas! Homamasoj svarmaj  
Palmbraĉojn sternas kun glorigoj psalmaj.  
Kvin tagoj pasas, kaj azen' senmastra  
Paŝtiĝas sur sternitaj frondoj palmaj.

## ***Pasko***

Jubilas ĥor': La morton venkis Pasko!  
Inundas la animojn la lumfasko  
De l' Reviviĝo. El la lumo ridas  
La Morto, kiel el sub ora masko.

## ***Georgo***

Georga tago, brilu per sunrido!  
Georga tago, venku super frido!  
Ni vee vokas vin, ho venu varme!  
Jen kiel frostotremas la kaprido.

## ***Akacioj***

La akacioj blankas en florado.  
Se vi enspiros, olda kamarado,  
Ĉi florparfumon per maljunaj pulmoj,  
Vi sentos ja la sencon de saŭdado.

## ***Majo***

Ho Majo, sorĉa Maj', sub via ĉarmo  
La larmo iĝas dolĉa ĝojolarmo.  
Memoroj svarme en la koro hantas,  
Fantomoj, jes, sed kia brila svarmo!

## ***La Unua de Majo***

Flagranta ruĝ' de vivo kaj de vero,  
Lazur de revoj, verdo de espero —  
Kolarebrie la homaro sonĝas  
La sonĝon de eterna primavero.

## ***Konvaloj***

Aŭskultu bone: la konvaloj per la  
Sonoriletoj de l' floraro perla  
Kun fee fajna tinto akompanas  
La trilfontanon de l' orkestro merla.

## ***Siringoj***

El lila floropompo de siringoj  
Ondas parfum' en ventlulataj ringoj.  
Ĝin enspiranta oni ebriiĝas  
Kaj ekdeziras fajfi kiel fringoj.

## ***Pentekosto***

Okazis foje — kunfandiĝis ĝoje  
Per fajrolangoj ĉies kor' aloje.  
Okazis foje — diras la legendo  
Kaj flustras homa rev': okazos foje ...

### ***La Najtingalo***

En nokta bosko sonas kantsignalo:  
Pri l' amo trubaduras najtingalo.  
Ho ve, ne eble trovi jam komparon  
Ne eluzitan pri ĉi madrigalo!

### ***Malkuraĝo***

La ruĝa roz' en plena peza pompo  
Koketas kaj min tentas por derompo.  
Ne, kara! ĉar mi sangos, kaj vi velkos.  
Ni gardu nin de reciproka trompo.

### ***Ĝardenkoncerto***

Matene la koncerto merla, turda  
Sonoras ege. Oni iĝas surda!  
Ej, birdoj, bone, ĝoju je l' printempo,  
Sed tia bruo estas jam absurda.

### ***Junio***

Ho blua-verda vibro de Junio,  
Sub via sorĉo kuŝas mi kun io  
Mistera, dolĉa, tima en la koro,  
Simila al torpor' de agonio.

### ***Abelo***

En la ĝardeno, inter bunta belo,  
De florparfum' ebrias la abelo.  
Ho, flugi kun ĝi por mielon ŝteli  
Ŝvebanta per flugiloj de libelo!

### ***La Floroj de la Grenkampo***

Kia kontrasto en la kampo grenaa,  
De papavetoj kaj cejanoj plena:  
La frenezume flagraj sopir-ruĝoj  
Kaj ĉielruboj de revad' serena!

## ***Lilioj***

Lilioj, ho lilioj de l' ĝardeno!  
Ĉi arda blanko kaj ĉi frida spleno!  
Parfum' ilia estas tiel peza  
Kiel la am': balzamo kaj veneno.

## ***Somermeza Nokto***

La Sankt-Johana kanto sonas zume,  
Transsaltas fajron la knabinoj dume,  
Atendas ilin ĉirkaŭpren' — kaj Pukk  
La parojn benas petolpalpebrume.

## ***Kokcineo***

Hej, ruĝuleto kun sep punktoj nigraj,  
Flugu de l' fingro per flugiloj viglaj,  
Flugu al iu el la kvar ventvojoj,  
Montru direkton al sopiroj tiklaj.

## ***Julio***

Tra l' kampoj ardaj pura peza oro  
De blondaj spikoj ondas kun langvoro.  
Zizel' ekaŭdas tinti la falĉilojn,  
Rapidas preni predon el trezoro.

## ***La 4. de Julio***

Deklaracio de la Sendependado:  
"Pri viv', libero kaj feliĉpretendo  
Rajtas popolo, rajtas pri forpelo  
De registar' ĉe ties rajt-ofendo."

## ***Orfa Papilio***

Julio. Magnolio kaj lilio  
Odoras peze. En ĉi idilio  
Melankolie sidas surfolie  
Flugilrumpita orfa papilio.

## ***Tulipo***

Tulipo, damo pimpa, en kostumo  
Verda kaj ruĝa, vi por amindumo  
Galanta logas, sed mi vin adorus,  
Se havus vi animon el parfumo.

## ***La 14. de Julio***

Falis Bastille, la servut-simbolo!  
Sur la ruinoj dancas la popolo.  
De tiam jar' al jaro eñas veke  
La vokon de l' triumfa Karmanjolo.

## ***Leontodo***

Ej, leontod', ludilo flok-disŝuta,  
Vi estas konkeranto liliputa!  
La tutan kampon volas vi avide  
Invadi per taĉmento paraŝuta.

## ***Fulmotondro***

Plumb-nubo al soifa ter', kredence,  
Grandgute plaŭdan pluvon verŝas dense.  
Ĝin fulmoj urĝas: "Haste, he! Atendas  
La ĉielarko jam senpacience!"

## ***Aŭgusto***

De varmo ŝvitas frunt', anhelas brusto:  
Ardegas la bakforno de Aŭgusto.  
La suno, la sukerajisto sorĉa,  
Bakas frandaĵojn de aroma gusto.

## ***Tremolo***

Kun tremo trista kaj langvore mola  
Sur akvon klinas sin branĉar' tremola,  
Kaj zumas al kompata rivereto  
Lamenton en minora mi bemola.

## **Rezedoj**

Vespere, el la flortapiŝo beda,  
Alfluas tajde la parfum' rezeda,  
Acerbe-dolĉa, lula, sorĉe loga,  
Langvora, peza, prema, jam obseda.

## **Stelofalo**

"Se stelo falas, iun glutas tomba."  
Tra l' nokto de Aŭgusto en la pompo  
De grandioza artfajraĵo sparkas  
La steloj defalantaj. Hekatombo!

## **Lampiroj**

En nokto min albrilas dum kamp-iro  
La fee glimaj lumoj de lampiro.  
Pigmeoj eble en la herb' kongresas  
Ĉe etaj torĉoj, flustras en konspiro.

## **Fojnodoro**

Parfumdeliroj de mortantaj floroj,  
Lastvibre voluptemaj velklangvoroj,  
Kaj varma aromo de ĵusmelka lakto  
Tra l' nokt' alfluas nun la fojnodoroj.

## **Kukolo**

Kukolo, birdo de aŭgura voko!  
Kiom da jaroj havas vi en stoko  
Por mi, nu nombro! 1... 2 ... 3... 5... 7...  
10... 15... 20... Dankon pro l' mensogo!

## **Septembro**

Septembro, granda majstro de la farboj,  
La monotonan verdon de la arboj  
Transpentras flava, ruĝa, ore-bruna.  
La vento gloras ĝin per zumaj harpoj.



## ***Emocio***

Ne estas tiel granda sensacio,  
Tamen per elektruma emocio  
Min trafas la mesaĝ' parfum-portata:  
"La duan fojon floras akacio!"

## ***La Heredo***

Somer'0, patrino riĉa, iĝis predo  
De mort' velkiga. Kaj ni, ĉe l' bankedo  
Funebra, plezuregas pri la fruktoj,  
Kiel senkoraj idoj pri heredo.

## ***Malfrua Eño***

Jam kie estas la printempaj triloj  
De merlo-flutoj kaj fringel-fajfiloj?  
Melankolie al la Maj-muziko  
Nun eñas la septembra ĥor' de griloj.

## ***Filandroj***

Dum gaje sonas kantoj vinrikoltaj,  
En la aero la aŭtunheroldaj  
Filandroj flirtas, grizaj fein-haroj.  
Ho ve! jam la feinoj iĝis oldaj.

## ***Cikorio***

Kurante tra la kamp' en histerio  
Skeletajn brakojn svingas cikorio.  
Kion perditan serĉas ŝi freneze?  
Ho ne demandu! Trista historio.

## ***Oktobro***

El nubo morna kiel la noktombro  
Aspergas nin per splena pluv' Oktobro.  
Mediti vokas ĉambro. Sed en la kejoj  
Jam bolas most', por savi nin de sobro.

### ***Maljunulin-somero***

Sunbrilo ree, kvazaŭ por almozo!  
Kiel virino en lasciva pozo  
Sopire la Natur' ankoraŭ laste  
Ekardas en panik' de pordoŝloso.

### ***La Gruoj***

Formigre gruoj tranĉas la aeron  
Kaj krias: "Venu kun ni en someron!"  
Mi adiaŭe levas miajn brakojn,  
Formante kiel ili, V-literon.

### ***Purigado***

Purigas la Aŭtuno en vestiblo,  
Foliojn rastas kun moroza siblo,  
La paĝojn de valora, granda, kara,  
De ŝiaj buboj disŝirita libro.

### ***Prunelarbeto***

Kovrinte sian velkon per la tuloj  
De prujno, ŝi ridetas al vaguloj,  
Siajn acerbajn kisojn proponante  
Per la koketa blu' de cent okuloj.

### ***Novembro***

La laman lumon trenas tra la valo  
La kripla suno de fantoma palo.  
Arb' nuda tremas en la tranĉa vento,  
Sopiras je la ŝirm' de blanka ŝalo.

### ***La 2. de Novembro***

Ho trista tag' de kolektitaj ĝemoj!  
La homoj, por sin savi de korpremoj,  
Hororon hidan de la tomboj kovras  
Per la acerba pomp' de krizantemoj.

## ***La 7. de Novembro***

Amas' ribela sturmas por la gloro  
Triumfa de Libero kaj Laboro.  
Fendante la obskuron de jarmiloj  
Per ruĝaj salvoj fajras la Aŭroro.

## ***Novembra Humoro***

Adventaj ventoj frido-spire siblas,  
La ploraj nuboj plumban pluvon kribras,  
La mondo mornas en melankolio,  
La meĉo de la esper' apenaŭ vibras.

## ***Pasero***

Hirundoj nin forlasis sen skrupulo.  
Vi, pasereto, restis fidelulo.  
En frostoj vi malsate ĉirkaŭsaltas  
Ĉevalon, ĝin petante pri manĝbulo.

## ***Kornikoj***

Super la kampoj de dezerta vak'  
Kornikoj flugas en funebra jak'.  
"Oj! kio finas ĉion belan, bonan!"  
Suspiras mi. Respondas ili: "Kraak'!"

## ***Novembra Suspiro***

Nenio estas, vere, pli dolora,  
Ol rememori, pri feliĉo fora  
En la mizer': pri Majo en Novembro  
Senflora, senbirdkanta, senkolora.

## ***Decembro***

Maljuna av', li portas, neĝo-ŝuta,  
Kovrilon blankan' al la branĉo nuda,  
Al la infanoj sledon, glitumilojn  
Kaj neĝopilkojn por batalo luda.

## ***Vintraj Floroj***

He, blankbarbul', vi iĝis jam moroza!  
Vi vipas nin per vento furioza.  
Jen, tamen — floroj, sur knabinvizaĝo,  
Kiun la freŝa frosto pinĉis roza.

## ***La 6. de Decembro***

Nik-Nikolao, kun la barbo ava,  
Vi donas el tornistro riĉenhava  
El vergoj vipon al la knab' malica,  
Abundan bonon al la bubo brava.

## ***La 15. de Decembro***

Naskiĝis en ĉi tiu tag' la koro  
Sopira venki en decida horo:  
La kuracisto de l' homaro muta,  
Kaj en la blinda mond' okuldoktoro.

## ***La Gnomoj***

Neĝas, neĝegas, preskaŭ dronas domoj.  
La frostajn flokojn kirlas vento-gnomoj  
Kaj krias moke: "Hejho! Ne kuradu  
Zigzage tiom, sidu hejme, homoj!"

## ***La Spitantoj***

Kiel de spir' de morto, tremas membro.  
Sternita la tombtolo de Decembro.  
"Eĉ sub la neĝo oni povas verdi" —  
Admonas la abio, pino, cembro.

## ***Kristnasko***

Nun ĉiun domon faras fe-palaco  
Plezur' de dono-preno de donaco.  
De du jarmiloj unu nokto jare  
Estas la via, Paco, Paco, Paco!

## **Silvestro**

La jar' maljuna, morna muzikestro,  
Neĝŝtormojn blekis per la blovorkestro,  
Sed gaje, kun tintila ĉap' surkape,  
Li mortas nun, en nokto de Silvestro.

***Feliĉan Novan Jaron! Jar' feliĉa,  
Demandas mi kun timo superstiĉa,  
Ĝis kiam, diru do, simila al vi,  
Mi povas morti, ĉiam reviviĝa?***

(1956)

## **LA PROVIDENCO\***

La patro kun la filo eliris por promeno,  
kaj li la filon saĝe edifis por kompreno  
de l' Dia Ordo, kiu en la naturo regas,  
de l' alta Providenco, kiun li admiregas:  
"Jen birdoj en printempo, por ovojn meti, nestas;  
Sed la birdidoj longe en tiuj ovoj restas;  
nur tiam ili rompas la ŝelon per bekpikoj,  
kiam, por ilin nutri, ekzistas jam lumbrikoj,  
kaj poste danke kantas la gloron de l' Sinjoro,  
kiu kreaĵojn siajn plenverŝas per favoro."

"Kaj la lumbrikoj, patro — demandis nun la filo —  
ĉu ili kune kantas en tiu dankjubilo?"

(1956)

\*Elfalinta versaĵo de EZOPA SAĜO.

## **DANKTRIBUTO\***

Al s-ro J. D. Applebaum

Mi volus vibri sonorkante  
kiel belvoĉa eolharpo  
kaj diri zume, diri kante  
la grandan dankon al pomarbo.  
Donacoj venis, tuta garbo.  
Mi preskaŭ saltas kun ĝojbaŭm':  
Subtenas, kiel brakon skarpo,  
min, my dear old friend Applebaum.

Memoras mia kor' konstante  
pri via bon', kaj por elĉerpo  
de mia danko sonus vante  
eĉ la plej ekzaltanta verbo.  
Jen refreŝiĝis mia cerbo  
frapita de la psika traŭm'  
kiel de ros' la velka herbo,  
ho, my dear old friend Applebaum.

Kiel rigardis stelojn Dante  
Post multa pen' en Ĝojabsorbo,  
tiel mi ĝojas nun, vidante  
bonecon vian per la korbo  
da donoj. Kaj dum dolĉa sorbo  
de ĝojo, kiel ĉampan-ŝaŭm'  
susuras sang' en mia korpo,  
ho, my dear old friend Applebaum.

Ho mia princ' en Sheffield urbo,  
bonfartu, fortu kiel faŭn'.  
Neniam trafu san-perturbo  
Vin, my dear old friend Applebaum.

(1957)

\* Dankesprima versaĵo pro la ricevita pakaĵo dum la hungara revolucio en 1956.

## ***CENTJARA ESTUS JAM LA KORO***

Centjara estus jam la koro  
de l' homarano, kiu arde  
sopiris, brule de fervoro,  
ke homo homon fratrigarde  
renkontu kaj ke paco-garde  
la gentoj vivu en konsento  
kaj ilun gvidu verstandarde  
per nova vort' la Nova Sento.

Kaj tiu kor' ne mortis tuta!  
Ĝi vivas inter ni konstante!  
En nia voko pac-saluta  
li vokas mem pac-salutante!  
La lingvo vivas verse-kante,  
postvivis lin per kvardek jaroj,  
kaj tra jarcentoj diamante  
ĝin fajlos plu fidelaj aroj!

Ĉi tie en la lando, kie  
li vivis age kaj produkte,  
mi diru, iom elegie  
kiel li ĝojis bonafrukto,  
kaj kiel ĝemis pene-lukto  
en la mondbrolo katastrofa.  
Aŭskultu, karaj, senterupte,  
Pri ĉi BALADO ZAMENHOFA.

(1959)



## **WARINGHIEN**

Tra l' Esperanta mondo sonoru nun  
Alkaje alta kant' pri Waringhien  
omaĝe al la sesdek jaroj  
plenaj abunde de bonaj fruktoj.

Ĉu tro patose do? Ĉu li kun grimac'  
ĝin prenos eble? Povas okazi, ĉar  
la flat-siropon li ne amas,  
preta je mok' pri la incensfumoĵ.

Nun tamen sonu, sonu la laŭda od'  
eĉ spite lin! La verda popolo jam  
konsciu, kiom ĝi malriĉus  
sen lia entuziasma saĝo!

Li ĝin instruas pri l' senerara vers'  
kaj pri la ĝusta uzo de vortrezor',  
li: trezoristo de la lingvo,  
gardo fidela de l' orrezervoĵ.

Per li kreiĝis el la leter-arkiv'  
de l' lingv-aŭtor' la kor-emocia verk':  
la tragedio Zamenhofa,  
dramo sesakta de dorn-kronulo.

Praesperantojn vivi revokis li,  
Postesperantoj sub lia esploril'  
kvalifikiĝis malsufiĉaj  
inde rivali al Esperanto.

Per li parolas al ni kun alta art'  
sagaco senreviĝa de Rochefoucauld,  
kaj la irana skeptikulo  
tiu vinama saĝulo, Kajjam,

kaj tramp' Villon kaj princo de Orlean',  
kaj du Bellay, pirato de l' arta bel',  
Verlaine, pia lascivul', kaj  
papo severa de simbolismo,

Mallarmé — Oriento kaj Okcident'!  
Jen la eseoj kun sia kon-abund',  
spicitaj tiel, ke vi povas  
frandi, lekante la lipojn ĝue.

Babili dokte — jen lia majstra pov'!  
Necesus ronde sidi kaj aŭdi lin,  
kaj per delic' de li verŝata  
lerni la amon al Esperanto.

Necesus multmilope akiri kaj  
— popolo alfabetaj! — legadi lin,  
plezuri pri l' racio luma,  
ĝusta mezur' kaj atika salo!

Kaj kion porti el mia koro nun  
al plur-jardeka kunklopodanto, al  
amik' en plena harmonio,  
en kunagordo de puro pleja?

Li estis por mi dum tiu longa temp'  
legant' unua, de plej unua grad',  
kaj ol frato frat' pli frata,  
helpo, apogo kaj instiganto.

Ni rompis vojon kune per akra fer'  
tra densa denso de l' gramatik-ĝangal',  
por al lingvuzo zamenhofa  
ĉiuireblan aleon meti.

Ni kune pekis per tiu Fakvortar'  
de Poezio, kiu resonis en  
du kontinentoj per skandalo,  
sed ĉe poetaj animoj lante

azilon trovis kaj plu ĝin anatem'  
ne trafas (eble sole sur aŭstra ter'),  
ĉar venkas la deviz' aŭdaca:  
Riĉu la lingvo por alti arte!

Ni kune luktis kun la metala vers'  
Baudelaire-a, ĝis nin, post la jar-dudek',  
la Floroj ĉarmis Esperante  
per la arom' de matura lingvo.

Ni kune donis en nia koro kaj  
komuna lingvo hejmon al Ekzilit',  
romantikul' romantik-rompa,  
sprita Lazaro: al orfa Heine.

Jes, kune, jes, sed el kia malproksim'  
respondis argumento al argument'  
en la diskutoj gramatikaj!  
Kaj delikata sopir-ĝemeto

el "douce France" al la Danuba bord'  
kaj de ĉi tie poste returne al  
Francujo flugis plurajn fojojn  
ĝis la ricevo de pura formo.

Ni kongresadis kune Parize kaj  
Viene, gajaj, en (relativa) jun'.  
Pri l' vienaĵ' raportis Maura,  
bona poeto, amik' mistera.

Kion rakonti pri la revid-minut'  
en Budapeŝt, somere de 59?  
Post fulmo pli mallumas nokto,  
eĉ se defore la fajro glimas.

Sed for kortuŝ! *Maiores canamus!* En  
Alkaja formo altu la voĉo pli!  
La odo diktas, kiel decas,  
laŭdi merite la laŭdindulon!

Li estas, sola, en si mem, institut'  
por dokta varto de l' poezia bel',  
por la logik' sen algluiĝo,  
por l' unueco, la forto-fonto.

Ni danku por klopod' memofera, por  
donac-prodiga viv' kaj obeu lin,  
paŝtiston, kiu pelas ame  
al Helikono la esperantojn!

(1961)

## **SALUTO\***

Por deka naskiĝtago de la klubo  
Egressy flugu de mi mil salutoj.  
Jen mi deziras al ĉi brava trupo  
triumfojn, kaj parolojn sen balbutoj.  
La membroj nombro ĉiam pli, kaj ili  
neniam eĉ pensetu krokodili.

Kaj por ke povu jam la veteranoj  
trankvilanime sur la laŭroj dormi,  
aliĝu multe da junulaj anoj  
por viglan, freŝan societeton formi,  
kiu inundu eĉ trans sia bordo.  
Jen la dezir' de la klubofrat' Konkordo.

Post ĉi deziroj kaj salutoj devas  
ankaŭ vortoj de la laŭdo vici,  
do mi image mian glason levas  
je la honor' de via Jurák Mici.  
Ŝi estas la patrino kaj patrono,  
do al ŝi nun fanfaru klariono.

Agrabla dev', ke ankaŭ kromajn ni  
honoru, se pri ĉiuj tempo mankas.  
Berceli, József Nagy kaj Tolnai,  
kaj Réthelyi indas, ni nun tre kore dankas  
ilin, fervorajn, kaj du Ludovikojn,  
Kökény kaj Tárkony, bravajn klub-amikojn.

Vivu Berényi kaj Margit, kaj multaj,  
domaĝe, ke tempmanko malpermesas  
mencii ĉiujn eĉ per vortoj kurtaj.  
Ankaŭ al nekonataj mi adresas  
manpremon kaj saluton kaj admonon:  
precize pagi la kotizan monon.

Vivu la Klubo, vivu la klubvivo!  
Vivu la gvidantaro, la klubanoj!  
La tuta lingve lerta kolektivo  
fariĝu frataj paco-partizanoj.

Super la Klubo, ke ĝi inde strebu,  
nobla spirito Zamenhofa ŝvebu!

(1969)

\* Dekjara datreveno de fondiĝo de la Grupo Egressy.



## **TRADUKOJ EI LA MONDLITERATURO**

### **EL LA ANGLA POEZIO**

George Gorden Noël Byron (1788-1824)

#### **SONETO PRI CHILLON**

(Tradukita en la originala ritmoskemo)

Spirit' eterna de l' senĉena mens',  
Liber'! en ĉeloj vi brilegas plej,  
Ĉar estas ĉi la kor' por vi loĝej':  
Nur via am' ĝin ligas kun potenc'.  
Se viajn filojn juĝis juratenc'  
Je ĉen' sub volb' haladza sen tagbril',  
Ĉi martirec' por land' estas util':  
Ventporte flugas pri Liber' la pens'.  
Ho Chillon, sanktas via ĉel-obskur',  
Altar' la trista planko en ĉi kel',  
Ĉar kvazaŭ estus ties ŝtona dur'  
Kampmola, Bonnivard en ĝi tra l' ĉel'  
Eltretis sulkon. Restu tiu spur',  
El tiranec' vokanta al ĉiel'!



#### **SONETO PRI CHILLON**

(Tradukita per kromsilaba aleksandro)

Ho, Vi, Spirit' eterna de la senĉena menso,  
Libero! En la ĉeloj plej lumas Via gloro,  
ĉar en ĉi lokoj vere Vi loĝas en la koro,  
kiun nur Via amo katenas per potenco.  
Se Viajn filojn juĝas je ĉenoj juratenco  
kaj je obskur' de volbo haladza sen tagbrilo,  
ĉi martireco dotas la landon per utilo,  
ĉar ĉiuvente flugas pri la Liber' la penso.  
Chillon, sanktejo estas en vi la ĉel' obskura,  
altaro la malĝoja pavimo de ĉi kelo,

ĉar Bonnivard ĝin tretis, ĝis, kvazaŭ ties dura  
kaj frida ŝtono estus herbejo, tra la ĉelo  
la paŝoj sulkon markis. Ho, restu, marko spura,  
ĉar el la tiraneco vi vokas al ĉielo!

William Shakespeare (1564-1616)

### **SONETO (LXIII)**

Vi vidas en mi tempon de la jaro,  
Kiam velkflava, aŭ jam senfolia  
skuiĝas en la vento la branĉaro,  
ĥorej' ruina, iam birdaria.  
Vi vidas en mi tagon, kiu palas  
Post sunsubiro en la okcidento,  
Pli kaj pli nigra nokto sur ĝin falas:  
Duona mort', sigel' de tombsilento.  
Vi vidas fajron, kiu agonie  
sub la cindrar' de sia junco dronis,  
Elspiris ĝi sur mortolito, kie  
Ĝin konsumadas, kio nutron donis.  
Ho, vidu min kaj kreskos via am'  
Al tiu, kiu baldaŭ pasos jam.



## **EL LA ĈINA POEZIO**

Maŭ Zedong (1893-1976)

### **VINTRA BILDO**

Pejzaĝ', senlima, kalva: Nordo. Ĉio  
frostetas sub cent mejloj da glacio.  
Mil mejlojn ĝis kaj trans la Granda Muro  
kiriĝas ĉio blanke tra la obskuro.  
Inter la krutaj bordoj de la Jang-ce  
rigidas gel':\* ne kuras ondoj dance.  
Sur la neĝkampoj, kiel elefantoj,  
en greg' tiriĝas mornaj mont-gigantoj,  
maŝino nia ilin preskaŭ tuŝas.  
La kampoj sub ni mute, surde kuŝas.

Ekpluvas lum'! La tero, pure blanka,  
signadas kiel knabino' rozvanga,  
ridetas en fajrere-blanka ŝalo,  
sun-banas sin rivero, monto, valo.  
Por la favoro de ĉi knabino,  
kiom da militestroj kun impeto  
konkuris kaj da kara sango fluis!  
Ĉu iom tio la animon skuis  
al Ĉi Huang aŭ Vu Ti, imperiestroj,  
ke falas la popol' per glav' aŭ peŝtoj?  
Taj Ĉung kaj Taj Ĉu flagris, enflamiĝaj,  
kaj estis sole en batal' feliĉaj;  
batalsoifa ankaŭ Ĝingis estis,  
sep landojn li eksterme tratempestis.

Ĉio ĉi pasis for. Heroo nova  
naskiĝis sur ĉi ter', la ĉiopova  
popolo. Ĉi heroo mirplenumo  
sin levis por la plena forbalao  
de ĉiu plag' restinta el la prao.  
La paco brilas super li sunlume.

\*gelo = frosto.

## **EL LA FLANDRA POEZIO**

### **DUM VINTRA PLUV\*\***

Flandra kanto

Dum vintra pluv', sur vojo,  
Sur marĉe kota ter', ja ter',  
Ekiras fiŝkaptisto  
Por fiŝi al river'  
Kun sia pako, kun sia sako,  
Kun stang' el kano en sia mano,  
Kun sia leda, hej-trallala-heda,  
Kun sia leda botopar'.

La muelistineto  
Ekstaris ĉe la pord', ja pord',  
Ke preter ŝi li devu  
Tramarŝi al la bord'  
Kun sia pako, kun sia sako,  
Kun stang' el kano en sia mano,  
Kun sia leda, hej-trallala-heda,  
Kun sia leda botopar'.

"Ĉu ŝuldas mi pro pekoj,  
Aŭ pro malbona far', ja far',  
Ke preter vi ne povas  
Mi marŝi nun sen bar'  
Kun mia pako, kun mia sako,  
Kun stang' el kano en mia mano,  
Kun mia leda, hej trallala-heda  
Kun mia leda botopar?"

"Malbonon vi ne faris,  
Ne faris pekojn vi, ja vi,  
Sed antaŭ ol foriri  
Tuj donu kisojn tri  
Kun via pako, kun via sako,  
Kun stang' el kano en via mano,  
Kun via leda, hej-trallala-heda  
Kun via leda botopar!"

\*Anonime.

## **EL LA FRANCA POEZIO**

Louis Aragon (1897-1982)

### **LA POETO AL SIA PARTIO**

Mia parti' redonis memoron kaj l' okulojn  
Kion infanoj scias ne sciis mi en ignoro  
Ke ruĝa mia sango ke franca mia koro  
Mi sciis nur ke l' nokto dissternas la obskurojn  
Mia parti' redonis memoron kaj l' okulojn

Mia parti' redonis sencon de l' epopeo  
Vidu Johana teksas Roland la kornon blovas  
Epoko de herooj sur la Vercors renovas  
Plej simplaj vortoj faras glavtinton de armeo  
Mia parti' redonis sencon de l' epopeo

Mia parti' redonis al mi la trikoloron  
Parti' partio mia mi dankas por leŭcionoj  
Kaj mi de tiu tempo disverŝas en kantsonoj  
Ĉiun koleron amon kaj ĝojon kaj doloron  
Mia parti' redonis al mi la trikoloron

Hervé (1825-1892)

### **MAM'ZELL NITOUCHE**

Nokte venis el festeno  
Ŝi, Babe' kaj li, Kade'.  
"Kristo! kia nokto-pleno!  
Nu rapidu do, Babe'!"  
"Vi ne uzas ĝin, azeno!"  
Farilon, farila, farileno!  
"Timas mi!" — tiel Kade'.  
"Ja ne mi!" — tiel Babe'.

Ili kvazaŭ blinde iris,  
Urĝis treme ŝin Kade'.  
Jen, l' aeron krio ŝiris:  
"Via mon' aŭ viv'!" Ho ve,  
Du rabistoj tion diris.  
Farilon, farila, fariliris.  
Unu saltis al Kade'  
Kaj la dua al Babe'.

Unu, kiel la omleton,  
Kirlis korpon de Kade',  
Dua montris grandan preton  
Okupiĝi pri Babe',  
Ĉifis sian kolumeton.  
Farilon, farila, farileton.  
"Mortas mi!" — tiel Kade'.  
"Mortas mi!" — tiel Babe'.

Okulvibre, terurite  
Hejmenvenis nun Kade',  
Kaj silente kaj medite  
Akompanis lin Babe'.  
Eksuspiris ŝi invite.  
Farilon, farila, farilite.  
"Mi ne iros plu, Babe'!"  
"Ja reiros mi, Kade'!"

Eugène Pottier (1816-1887)

## **LA INTERNACIO**

Leviĝu proletar' de l' tero,  
leviĝu, sklavoĵ de malsat'!  
La Vero tondras en kratero,  
eksplodos por finfara bat'.  
La paseon plene ni forviŝos,  
amasoj, marŝu, kresku ni!  
La mond' en fundament' ŝanĝiĝos,  
ne nul', sed ĉio estu ni!

Refreno:

Por batal', por la lasta,  
unuiĝu nia front',  
internacia estos  
la tuta homa mond'!

Ne estas super ni defendo,  
nek reĝ', nek dio, nek patron'.  
Kreantoj, ni nin savu mem do,  
dekretu pri l' komuna bon'!  
La rabaĵon preni de l' rabisto,  
spiriton savi de l' karcer',  
ni blovu fajron kun persisto,  
kaj batu ni, dum ardas fer'!

Refreno:

Por batal', por la lasta,  
unuiĝu nia front',  
internacia estos  
la tuta homa mond'!

Ni laboristoj, ni kampuloj,  
partio granda de l' labor'!  
Al ni la ter' laŭ justreguloj,  
nenifarul' sin portu for!  
Ja grasigis multajn nia karno,

sed malaperos ĉe l' aŭror'

la korvo kaj vultura svarmo,  
eterne brilos suna glor'!

Refreno:

Por batal', por la lasta,  
unuiĝu nia front',  
internacia estos  
la tuta homa mond'!

## **EL LA GERMANA POEZIO**

Johann Wolfgang Goethe (1749-1832)

### **JAPANA VESPERKANTO (*Alia*)**

Ĉio en la pavilono jada  
silentas tute.  
Kornikoj en la lunlumo flugas  
mute  
al neĝkovritaj ĉerizarboj.  
Mi sidas  
kaj ploras.

\*La "Wanderers Nachtlied" (Noktokanto de l' migranto) estas unu el la plej konataj kantoj de Goethe, kiun aperigis Kalocsay en du variantoj sub titoloj "Vesperkanto de l' migrulo" kaj "Alia" (Literatura Mondo 1924/193). Ilin represigis Kalocsay en ETERNA BUKEDO, respektive la duan iom modifigite sub titolo "Simila" (tiel ĝi venis ankaŭ en TUTMONDA SONORO). En Oomoto (1970:jul.-aŭg., p. 108-109.) Kalocsay pritraktis la nefacile trakudeblan kanteton kaj prezentis ĝin iom japanigita formo.

"Mi ne scias — aldonis Kalocsay —, kion dirus Goethe pri ĉi tiu varianto. Mi konfesas, ke al mi ĝi plaĉas."

Georg Friedrich Händel (1685-1759)

**MESSIAH\***

Mi scias, ke l' Savinto vivas  
kaj ke tronos li ĉe la Lasta Juĝ'  
super la ter'.

Mi scias, ke la Savinto vivas  
kaj ke tronos li ĉe la Lasta Juĝ'  
super la ter', super la ter'.

Ja ĉi korpon manĝos vermoj,  
sed Dion, karne vidos mi,  
Mi scias, ke l' Savinto vivas,  
ke ĉi korpon manĝos vermoj,  
sed Dion karne vidos mi,  
ja vidos mi.

Mi scias, ke l' Savinto vivas.  
Ĉar Krist' nun leviĝis el la mort':  
unua frukt' de l' dormantar',  
de l' dormantar',  
unua frukt' de l' dormantar'.

Ĉar Krist' nun leviĝis,  
ĉar Krist' nun leviĝis  
el la mort'  
unua frukt' de l' dormantar'.

\* En la tradukkonkurso ĉe Literatura Mondo en 1936 gajnis la Unuan Premion.



Kürenberg von (trobadoro de la 12-a jc)

### **LA FALKO**

Mi belan falkon longe, dum pli ol jar' edukis,  
ĝi malsovaĝiĝinte, laŭ mia vok' reflugis,  
per or' mi al ĝi farbis flugilojn ĉe la rand'.  
Sed jen, ĝi leviĝis alten, kaj flugis for al fremda land'.

Nun mi ekvidis ree ĉi mian sveltan falkon,  
sur kruro la silkrubandon ĝi portas kiel markon,  
sur la flugiloj brilas ankoraŭ nun la or'0...  
La korojn sin amantajn unuigi helpu, Disinjor'!

Otto Roquette (1824-1896)

**LUDE, PETOLE GAJAS LA KOR'**

Parto el "La legendo de Sankta Elizabeto".  
(Muziko de Ferenc Liszt).

Ĉarmas nin ludo per bonhumor',  
plektas ni kronon el ĉia flor'.  
Ĉarmas nin ludo per bonhumor',  
plektas ni kronon el ĉia flor'.  
Venu, fiŝetoj naĝadas en ondoj,  
Venu, sciuroj saltadas sur frondoj.

Venu sur kampon nun, floran, odoran,  
papilieton ekkapti, koloran!

Lernu arbare vi de l' kapreoloj  
vivi en gaja lud' kaj sen doloroj.  
Ĉarmas nin ludo per bonhumor',  
plektas ni kronon belan el flor'.  
Kantos kaj diros ni feajn fabelojn,  
feajn fabelojn,  
lernu fianĉa par' ĝui la belojn.  
Kantos kaj diros ni feajn fabelojn,  
Kantos kaj diros, kantas kaj diros  
belajn fe-fabelojn  
kaj de ni ellernu plezurojn kaj belojn,  
ĝui vivobelojn!

Johann Strauss (1825-1899)

**'ĈE LA BELA, BLUA DANUBO\***  
(Valso)

Blua Danub'  
ĉielo sen nub',  
afabla seren',  
ho ĉarma Vien!  
Muziko per vent'  
alflugas por tent',  
allogas por bal',  
kie trenas la sorĉa danc-torent'.  
Tie lumoj mil,  
en okuloj bril',  
sub la lustroj  
dolĉaj flustroj.  
Ĉie danc-ivit',  
ĉie ŝveb' kaj glit',  
ĉie gaja splito  
de la facileta sprit'.

Ho dolĉa amflustret'  
ĉe la danco en sekret',  
ho la milda, varma prem'  
sufokas la voĉon la sopira ĝem':  
"Sentu, ke batas en flam'  
la kor' pro la ekscit'  
Donacu la jeson de am'  
sen tim', sen hezit'!",  
Ho dolĉa amflustret'  
ĉe la danco en sekret',  
ho la milda, varma prem',  
sufokas la voĉon la sopira ĝem'.

Ĉe l' son' de fluto kaj violon'  
susuras jupoj tra la salon',  
jen sur ĉio roza vapor',  
muzikas mem la kor'.  
Nin ravas en melodi'  
brilo de sunradi'

trilo de birda ĥor',  
gajo de juna kor'.  
Kaj milde ĉarma dolĉ'  
kaj arde varma sorĉ',  
kaj arĝenta nub'  
kaj zum de la Danub'.

Magie la ritmo pulsas en ni,  
Portas al rav' kaj al ebri'.  
Dronas la mond' en roza vual',  
regas nin (Princ') Karneval!  
Svarma rul',  
varma lul',  
arde brula spir':  
ho dolĉa dancdelir'!  
La magia sving',  
sorĉa ring'  
portas plu kaj plu  
per povo potenca flu'!

Tiu ĉi valso ne estas ja lud',  
sed ĝi estas ensorĉo kaj trud',  
en ĝi estas brul'; kaj la flam'  
kuntrenas por danc' kaj am'!  
Kaj se ĝi ondas ensorĉe tra l' sin',  
ne rezistas junul', nek knabin',  
kaj ekflugas al paradiz'  
per flugiloj de l' danc' kaj kis',  
per flugiloj de l' danco kaj kis'.

Plu, plu, plu,  
kia dia danc', po du,  
ĉe magia, pli kaj pli  
dolĉa dancmelodi'!  
Jam, jam, jam,  
per ebria danc', la am',  
kiel per la sun' la flor',  
ekburĝonas kaj ŝvelas en kor'!  
Tiu ĉi valso ne estas ja lud',  
sed ĝi estas ensorĉo kaj trud',  
en ĝi estas brul'; kaj la flam'

kuntrenas por danc' kaj am!  
Kaj se ĝi ondas ensorĉe tra l' sin',  
ne rezistas junul', nek knabin',  
kaj ekflugas al paradiz'  
per flugiloj de l' danc' kaj kis',  
per flugiloj de l' danco kaj kis'.

\* En la tradukkonurso ĉe Literatura Mondo (1936) gajnis la Unuan Premion.

Richard Wagner (1813-1883)

**AL LA VESPERA STELO\***

Sur teron morne la krepusko falas,  
La valon ĝi per nigra tol' vualas.  
Sopirus ja l' anim' je alta flug':  
Ĉin nokt-teruroj premas kvazaŭ jug'.  
Ekbrilas jen vi, ho plej ĉarma stelo,  
El malproksim' kun via milda helo.  
Forpelas ombrojn via kara lum',  
Afable montras la vojon ĝi nun.

Ho kara stelo de vesper',  
Mi vin salutas kun esper',  
Heroldu al ŝi via flam'  
Pri mia ĉiam fidela am'.  
Kiam ŝi ŝvebos for de l' tero  
Esti anĝel' de l' sankta sfero.

\* En la tradukkonkurso ĉe Literatura Mondo en 1936 gajnis la Duan Premion.

## **LA RABITAJ KISOJ**

(Germana popolkanto)

"Maria", diris la patrin',  
"Jen, vere, io bela!  
Vi lasis, ke vin kisu vir'  
Kaj eĉ dum tago hela!

Se brava resti volas vi,  
Ne decas tio, vere!  
Ne plu okazu tia hont'!  
Mi diras plej severe!"

"Ej panjo", diris la knabin',  
"Riproĉojn kial fari?  
Mi volus scii, kiel mi  
Ja povis kontraŭstari?!"

Portante du sitelojn mi  
Tra nia korto iris,  
Jörg venis, ne tro petis min,  
Sed simple al si tiris

Kaj kaptis min sub la menton',  
Kaj kisis min rabiste.  
Pro la du siteloj devis mi  
Toleri senreziste."

"Toleri!" kriis la patrin'.  
"Ho, ne pretekstu vane!  
Vi povis ĵeti ilin for  
Kaj vin defendi mane!"

Kaj diris nun Maria, dum  
kapkline ŝi hontemas:  
"Pri ĉio pensi ne eble ja  
Kiam pri kisoj temas."

## **EL LA MALNOVGREKA LITERATURO**

Archilochos (7a jarcento)

### **FRAGMENTOJ\***

Emerĝas, jen, insulo en la maro  
ĉe l' horizont' serena,  
ĝi estas tiel hirta de arbaro,  
kiel la dors' azena...



De Ares kaj de batalbru' sovaĝa  
mi estas la servanto,  
kaj mia bela Muzo-donacita  
scienco estas kanto.  
Per lanc' mi gajnas panon, kaj per lanco  
la vinon. Ĉe ripozo  
per lanco mi apogas min por trinko  
de vin' el Ismaroso.

Kaj pri la tuta fama riĉ' de Gyges  
envio min ne tentas,  
pri l' mondo, kiel ĝin la dioj kreis,  
komplete mi kontentas,  
Eh, kio al mi kelka imperio?  
Ne volas mi akiri  
reĝlandon; de mi estas malproksime  
tiaĵon eĉ deziri...



Urĝe iru kun la kruĉo al la alia fin' ferdeka,  
Tie el barel' dikventra prenu la korkon, kaj sen tard'  
Al ni portu ruĝan vinon, Kiu atendus, ke kun seka  
Gorĝo, sobre ni tranoktu nun ĉe tia staro de gard'!



La ŝildon dum rifuĝ', mi de mi ĵetis  
sur teron sub arbusto,  
La malamik' nun pri ĝi fanfaronas,  
portante ĝin ĉe l' brusto.  
Perdiĝu tiu ŝildo, se mi povis



la karan vivon savi!

Vivanta mi ja povas baldaŭ ŝildon  
ne malpli bonan havi...



Jen estas la soldat' laŭ mia gusto:  
nek dika, nek tro granda,  
la kapo estas nek kun har' tondita,  
nek longabukle danda.

Malalt-statura estas viro vera,  
kaj kurbaj liaj kruroj,  
kaj lia marŝo estas firma, certa  
paŝad' de kuraĝulo...



Ne obule kun mirtobranĉ' en mano,  
plezuras pri ĝi kaj pri la petaloj  
de roz' purpura; al ŝi ombras  
la frunton kaj la ŝultron krispaj haroj...



Figuj' donanta manĝi frandon  
al granda ar' kornika,  
jen Pasiphile, la enloga  
kaj ege gastamika.



Ho vi koro, turmentata de neforpelebla zorg',  
estu firma, kaj streĉante bruston kontraŭ la malbon',  
luktu brave, kaj fidelu la principojn sub la plag'  
senŝancele! Nek venkinte vi aspektu orgojlul',  
sed al ĝojo kaj amaro, en malbono kaj en bon',  
metu limojn, kaj akceptu ritmon de la homa viv'.

\* Kalocsay samloke analizis la poezion de Archilochos.

Euripido (480-406 a. K.)

### ***PACO-ĤORO DE MALJUNULOJ***

Paco benata, kun abunda  
riĉo de via sino fekunda,  
plej bela diino, kie vi tardas?  
De kia sopiro por vi mi ardas!  
Mi timas, ke min superŝutos  
per la mizer' de zorgoj la obskura  
maljuno, antaŭ ol salutos  
min via festo bela kaj plezura  
kun danco ravanta de ĥoro  
florkrona ĉe kantosono.  
La urbon eniru diino luma,  
nin savu de malpacem' ekscita  
kaj de kverel' frenezuma,  
ĝojanta je fer' akrigita...

## **EL LA HUNGARA POEZIO**

Endre Ady (1877-1919)

### **LA LASTA RIDETO**

Mi tre malbele vivis,  
Ho, tre malbele vivis:  
Kiel bele mortos mi,  
Kiel bele mortos mi.

Beliĝos miaj vangoj,  
Satiraj miaj vangoj:  
Estos sur la lip' ridet',  
Estos sur la lip' ridet'.

En grandaj la okuloj,  
En vitraj la okuloj  
Brilos ies bela bild',  
Brilos ies bela bild'.

Rideta mia buŝo,  
Malvarma mia buŝo:  
Dankas vin pro via kis',  
Dankas vin pro via kis'.



### **LA RUĜA SUNO**

Batalon, peston, kiu portis  
Por superstiĉaj la centjaroj,  
Leviĝu sankta ruĝa suno  
Kun lumo-maroj.

Funebron nigran mi nur vidas  
Elrigardante antaŭ l' morto  
Nin skurĝas, pelas nokta, malica  
Ebria sorto.

Ĝisnuna sort': malben' malnova  
Ĉu longe daŭros? Kiu scias?  
Malfruadanta ruĝa suno  
Vin, vin ni krias.

Ne volas kun koler' mi morti  
Streĉitan arkon retenante  
Kun nigra koro, nigra funebro  
Malesperante.

Leviĝu sanko, ruĝa suno,  
Ĝis mi malamas, estas, vivas  
Pli potenca, detrua vi estus,  
Se mi vin vidas.

Vi vidus min, kaj kiel estas  
Skribite, sendus vi flamondon  
Sur malpiulojn, kaj mi trankvile  
Falus en tombon.



## ***SURFLUGIS LA PAVO***

"Sur departementan domon flugis pavo,  
Por kaptitoj multaj jen estas la savo." \*

Pompaj pavoplumoj kun sun-venka povo,  
Disten disheroldu, morgaŭ venos novo.

Morgaŭ venos ŝanĝo, fine estos hele,  
Novaj okuloj jam ridos alĉiele.

Ĝemas de nova vent' hungariaj arboj,  
Vin jam atendas ni, hungaraj mirakloj.

Aŭ ni nur frenezas kaj sen rest' pereos,  
Aŭ el ĉi nia kred' ni realon kreos.

Nova kred', nova vol', novaj sanktaj bruloj,  
Estas vi aŭ ree iĝos nur nebuloj.

Brulos la sovaĝa estrej' epokspita,  
Aŭ nia animo restos plu jugita.  
Brilos novsence jam la hungara vorto,  
Aŭ plu al ni stagnos amare la sorto.

"Sur departementan domon flugis pavo,  
Por kaptitoj multaj jen estas la savo." \*

\* Citaĵo de hungara popolkanto.

Lajos Áprily (1887-1967)

## **MARTO**

Ellogis la brulo de l' suna okulo  
La knabon sur monton. Li staras sur pint'.  
Kaj rida, ĝojtikla, subkrias per vigla  
Pravok' "evoe" al la val-labirint'.

Put' sekiĝinta, lag' vekiĝinta  
Pleniĝas per akvo, inundas al kamp',  
Eta paruo karbkapa kun ĝuo  
Disŝutas daktilojn de ĝoj-ditiramb'.

Silka amento flirtas en vento,  
Kornusoj ekflavas per floro-disfald',  
De l' firmamento fluas kurento  
Ektimas surmonte la neĝo de l' alt'.

Fluetoj kun tintoj kuras de l' pintoj  
Al pigra rivero en vigla humor',  
Sonoras la fontoj, sonoras la montoj,  
Sonoras, sonoras, sonoras la kor'.

(Kun Kolos Imbán)

János Arany (1817-1882)

## **KLARA ZÁCH**

Floras reĝinkorte  
ĉe l' leviĝo suna  
blanka rozo, ruĝa rozo  
blonda bel' kaj bruna.

"Franjo moŝt' reĝina,  
je l' ĉiel' mi diras,  
tiun rozon, ruĝan rozon  
ege mi deziras.

Pro ŝi batas febre  
de malsan' la koro,  
se mi mortos, mi mortinto  
estos do de floro."

"Frato, mi admonas,  
ke mi ŝin ne donas  
eĉ por cent! Ve, hontu! Mia  
antaŭsent' malbonas.

Urĝas min la vojo  
al la kirk' matena,  
se malsanas vi, kuŝiĝu  
sur divano jena."

Iras la reĝino,  
iras al la kirko,  
post ŝi iras freŝaj floroj,  
nura bel' kaj virgo.

Ŝi dezirus preĝi,  
ŝi ne scias vorti,  
hejme lasis rozaron,  
kiu iros porti?

"Iru , filnjo Klara,  
iru tuj infano,

vi ĝin trovos, genubenke,  
se ne, sur divano."  
Klara serĉas vane,  
ĝin ne trovas, ja ne,  
la reĝin' malpacienca  
sen preĝil' surmane.

Horo pasis jame,  
ŝi ne venas, ja ne,  
la reĝino en la kirko  
ŝin atendas vane.

Ja ŝi ne reiros  
virgulinan rondon,  
sed prefere sub la teron,  
en la morto-mondon,

sub la nigran teron  
en la tomban pacon,  
ol antaŭ la grizan patron  
iri en palacon.

"Kio vin afliktis,  
ho, filin', filino,  
diru, dolĉa filnjo, diru,  
venu al la sino!"

"Ve, patro, ho ne!  
Kien mi... for... drone!  
Kisi vian piedpolvon!  
Tretu mortodone!..."

Por taĝmeza manĝo  
oni sonorilas,  
tiuhore Feliciano  
antaŭ l' reĝon iras.

Antaŭ l' reĝon iras,  
sed ne por taĝmanĝi,  
estis al vi glav' terura  
en la mano venĝi.



"Ne, reĝin', mi vivon  
pro l' filin' petas!"  
Bone, ke kvar feblaj fingroj  
tion elaĉetas.

"Ludovik', Andreo!  
Pro l' filin' reĝfilon!"  
Bone, ke Gyulafi kuras  
kontraŭ la armilon.

"Tuj, tuj, la friponon!  
Knaboj, gardostaro!..."  
Tie buĉis Felicianon  
reĝa servistaro.

"Sangas la fingroj?  
do ne por nenio!  
Kion, reĝedzin', vi volas,  
por dolorpremio?"

Por la montra fingro  
la fraŭlin-filionon,  
por dikfingro al la filo  
plej teruran finon!

Por ĉi du, bofilon  
kaj filinon lian;  
por sangperdo lian tutan  
genton familian!"

Estas mavaj tempoj,  
iras mavaj steloj,  
vin, patruj', de granda plago  
gardu la ĉieloj.

\* Tiu balado estas historia fakto, ke Feliciano Zách, la 17-an de ap-rilo 1330 atakis glave la reĝan familion ĉe tagmanĝo kaj al reĝino Elizabeta li detranĉis kvar fingrojn. Pro tio lia tuta gento estis ekstermita ĝis la tria generacio. La eblo riski tiel kruelan rigoron pruvas, ke la potenco de reĝo Karlo Roberto, kiu, pro fremda de-veno (Anĵua) devis longe batali por firmigi sian pozicion, tiutempe jam estis fortika. — Pri la kaŭzo de la atenco de Feliciano la hungaraj kronikoj, eĉ la kondamna letero mem, profunde silentas. Tio, ke la reĝino donis okazon al sia frato delogi Klara Zách devenas el eksterlandaj fontoj (Henriko Muglen kaj anonima Napola kronikisto).



## **LASLO V.**

La densa nokto mornas,  
la suda vento ŝtormas,  
sur Buda-tur' en supro  
la vento-kok' el kupro  
akrege grincas nun.

"He, kiu, kio?... Nure?..."

"Jes, turnu vin almure  
kaj dormu Sir'. Tempesto  
frapegas sur fenestro,  
ĝi baldaŭ pasos for."

La nubon fulmo fendas,  
tra l' breĉ' torenton sendas,  
el defluilaj truoj  
verŝiĝas dikaj fluoj  
de la turoj de Buda.

"Ĉu vokas min? Por ĵuro?

Kial la pleb-murmuro?"

"Sir', la popolo tuta  
silentas tomo-muta,  
nur tondras la ĉiel'."

Ektintas la kateno,  
senmastre falas ĉeno,  
sur Buda-mur' al subo  
jen grimpas — pec' da nubo —  
kaptito post kaptit'.

"Ha rompas tra ĉenbridoj

tiuj du Hunyadidoj!"

"Ho Sir', do estu forta,

Ja Laslo estas morta,  
kaptita la infan'."

Grupet' sub fortikaĵo  
nun tiras sin en kaŝo,  
la paŝojn timo pelas,  
la vivon por si ŝtelas  
Kanizsa, Rozgonyi.

"Duoblu gard' kapteje,  
ĉe Matiaso pleje!"  
"Nu, tiu restis dome,  
sed la kaptitoj krome  
nenie estas, Sir'."

Jam pluvo plu ne gutas,  
la uragano mutas,  
ĉe molaj ondbabiloj  
luliĝas milde miloj  
da steloj sur Danub'.

"For, dum mi povas! Kure!  
Ĉeĥlande pli sekure!"  
"Ripozas en silento  
jam ĉiu elemento,  
do kial timi, Sir'?"

Dormanton lulas dormo,  
fuĝanton ŝiras dorno,  
se krakas branĉ' dum iro,  
timas de ven' de sbiro  
Kanizsa, Rozgonyi.

Dormanto eldormiĝas,  
fuĝanto alarmiĝas.  
Senvento, sed susuras,  
sennubo, sed murmuras  
kaj fulmas en lontan'.

"Donu, fidela ĉeĥo,  
gutojn al soifseko."  
"J en la pokalo, Siro,  
kaj en ĝi eliksiro  
kvietiga kiel tomb'."

Ripozu venĝagit'!  
Ĉeĥ-tere la kaptit',  
ĉeĥ-tere, terinterne  
la reĝo jam eterne...  
Revenos la kaptit'!



## **POPOLKANTO**

Sur Danubo suben naĝas la boat',  
la boat',  
el ĝi gaje sonas muzikado, guzlicado,  
sakflutad'.  
Hej-huj, al foir' la ruĝa pomo kaj persik',  
Hej-huj, al Kevi la belulin' por edzinig'.

Ruĝan pomon oni vendas sur foir' de  
Budapest,  
per ĝi povas Kevi la rozvizaĝa junedzin' en  
pimpa vest'.  
Hej-huj, brava kupo, kiu ĉarmo kaj allog'!  
Sub ĝi por kiom ajn da amantoj estas lok'.

Ĉard' en Kevi dematene plena jam,  
plena jam.  
Solodancon dancas tie kun akra klingo, sanga klingo  
edz' Jovan.  
Hej-huj, ruĝa pomo, sed jam vermoj mordis ĝin,  
Belis la edzino, sed ŝi estis ĉies in'.

Sur Danubo suben naĝas la boat',  
la boat',  
el ĝi hejhuado, krio akra, bruo sakra'  
blasfemad'.  
Jen jam Knjazevac, Aleksinac en proksim',  
Hej-huj, Kevi-Rac, vi pli ne revidos min!

Mihály Babits (1883-1941)

## **MERCERIA**

Ĉiam en nova modo, plej luksveste,  
turniĝas bela dam' butikfenestre.

Ĉio en ordo, eĉ pinglet' ne mankas,  
la lipoj ruĝas kaj la dentoj  
blankas.

Vizaĝ, regula ĉiam nur ridetas,  
ŝi, ĉiam gaje, samajn turnojn  
metas.

Sin ĉien turnas. Bona la eduko,  
neniam falas el harar' la buko.

Sinteno rektas, kap' senmovas  
digne,  
rigard' rigidas, ne koketas signe.

Per lum' ŝin la elektro sukerumas,  
ŝi per sukero de ridet' relumas.  
En pomp' eterna ŝvebas ŝi  
lum-mare,  
ŝin admirantoj gapas ĉirkaŭstare.

Sed kvankam brakoj, brust dekolte  
ravas,  
sopiro basa ŝin neniom trafas.

Ĉar, kie en virino la anĝelo  
finiĝas, ĉesas ŝi ĉe l' koksnielo.

Kiel anĝelo, pura kaj senscia,  
ĉiam novmode, en luksvesto sia,  
fenestre turnas sin la dam' gracia.

Károly Bari (1952- )

## **MIGRAJ CIGANOJ**

Tagiĝoj ture falegas niaŝultren, nebul-oscedaj  
grizaj tagiĝoj venantaj kroĉinte sin en kolharojn  
de ventoj pinĉemaj: la fumo amara de malriĉo  
nin sufokadas, sur niaj knaraj veturiloj  
ni portas niajn ĉifone-vestitajn, violonvoĉe karesatajn  
diojn: niajn virinojn de sino el nura fajro,  
kiuj naskas sur rando de fosoj, feinoj ili estas;  
feinoj de vojoj, sin lavantaj per roso,  
sin viŝanta j per konvalfolio, kantantaj dormon  
sur siajn okulojn vespere, ilia jupsusurado  
estas tempesto bolvarma; kiam la nigraj flugilfrapoj  
de kornikoj skrapas tenebron super la vojoj,  
embuskas ombroj inter arboj; volas  
ŝteli la tukon de niaj knabinoj, tial ke  
ĝin por kiso ili redonu; hundoj sovaĝaj  
ne gardas niajn tolŝirmatajn ĉarojn, nur scivolemaj  
strigoj ululas sur veturil-timonoj,  
sep-sigelaj neskrititaj leĝoj de olduloj malnovaj  
bruligis nian koron dura, ciganoj ni estas,  
sur ĉaroj tolŝirmataj nia popolo vagadas en la mondo  
inter fride kriĉantaj ventoj, ŝvite tra malsekaj  
someraj; sub flamoj de cindre disrubiĝintaj  
tendumfajroj sorĉas trezoron ciganinoj  
plu sian aĝon, ne sciantaj kiuj harojn de katoj  
kadavraj metas en manplaton de l' koleratoj por missorĉo;  
vojpulvo gluiĝas niavizaĝe, senlimaj, stelo-sonĝaj  
stepoj post ni frostotremas, niaj infanoj sordidaj  
taglonge sonorigas la ruĝan ĝojo-citron; senzorgaj,  
niaj knarantaj ĉaroj alkreskis la ŝtonpavimon de l' vojoj,  
heno de niaj ĉevaloj spirmankaj flagras en vento, pezaj  
lumflagoj sterniĝas sur la vilaĝojn: iliaj kampuloj  
levis el korfrapado de oraj tritik-kampoj muron  
ĉirkaŭ siaj domoj, ni vagas sur tolŝirmataj ĉaroj  
inter rustiĝintaj, rad-akse knarantaj ĉielregionoj;  
fulmohakitaj cindraj arbostumpoj kaŭras  
apud la vojo; iliajn fulgajn branĉojn vespere  
surnaĝas la luno.

László Benjámín (1915-1986)

**MI VOLIS FAJRON...**

Mi volis fajron trinki spite,  
tepidan akvon trinki devis,  
de malamik' ne mortpafite,  
potencon juste ne ricevis.

Ducent dek jarojn ludi kun mi  
Mort', mia kolerulo, emis,  
kaj pasis. Ne komprenas nun mi,  
ke min sub teron ĝi ne premis.

Ke mi forfuĝis de ĝi? — tamen,  
nur unu mov' unu momento  
sufiĉus — mi sternaĝus same  
sub la senpova firmamento.

Diriĝas, ke mi danku al ili  
bonfaron: ja mi spiras, vivas!  
Kial al kiu dankon diri,  
se mia vivo nur signifas,

ke sub ŝarĝ' dumilita jen mi  
kun tridek jaroj maljun-porta,  
milmil mortintoj kuŝas en mi  
kaj mi mem estas ĉiu morta.

László Beöthy (1873-1931)

## ***DU PASEROJ***

Sur telegraf-kolon' ĉevoje  
Sidiĝis du paseroj foje.

Flugil-malleve en malesper'  
Plendis pasero al la paser'.

Pri longa vojo kaj sufero,  
Pri suna hel' kaj frostvetero.

La unu: knab'; alia: knabin', —  
Kaj reciproke kompatas sin.

Li perdis sian amatinon,  
Ŝi sentas por edz' la sopiron.

Interpremiĝas en la dolor',  
Du paseretoj kun ama kor'.

Nur momenton — jam ĉiu vidas,  
Ke ne ĉi tiun ĝi avidas.

Ili forflugas, sen rerigardo:  
Unu al sud', alia al nordo.



Sándor Csóri (1930- )

### ***KE MALLUME NE ESTU***

Videblaj ankoraŭ la pontoj aŭdacaj  
betonborde, da arboj  
senpersona vico,  
vizaĝo de infanoj hejmenkurantaj  
la posttagmeza neĝado.

Sed poiome fulgiĝas la akvo  
kaj descendas ankaŭ la nokto de koro.  
Pri la ekstermeblaj\* mi pensas,  
kiujn defendas sonĝo nenia.  
Ensiblas al ili la silento kiel kuglo  
kaj la soleco kiel famo funebra.

Pri la ekstermeblaj mi pensas,  
plena de ili la tero.  
Ne defendas ilin armeoj, rozolaŭboj, parfumaj ĉemizoj,  
nek la arĝentaj bariloj de mono,  
nek la amo.

Kaj vane ili mortas vane naskiĝantaj.  
Pri la ekstermeblaj mi pensas.  
Nur unu manon ili bezonus por havi patrujon,  
nur unu korpon alian por ke mallume ne estu.

\* Aludo al la versoj de Attila József: "Neekstermeblajn ja tiel multege kiel nin, de post la apero de l' sunsistemo, oni ne ekstermis sur grandpasea tero, vizitis la hejmojn malsato, armilo, bigoteco kaj ĥo-lero."

Viktoro Dalmady (1836-1916)

### **HUNGAROJ ESTU NI!**

Sur lok' malgranda, kiun havas  
Ni en la mondo-val',  
Ni peni devas tage-nokte  
En peza vivbatal',  
Sed kvankam de venteg' centobla  
Vipataj estu ni,  
Persistos ni en la pereco — nur  
Hungaroj restu ni!

Luktadas ŝipo malfacile  
Ja kontraŭ onda trud'  
Sed tio al la rok' fortika  
Ja estas nura lud'!  
Sur rok' miljara ĉu ni timu  
La ondon? Kresku ĝi!  
Ŝancelos nin nek tertremeg', nur  
Hungaroj restu ni!

Jam estis temp': en malesperon  
Nin puŝis sortofrap',  
Kunfrapis pereigaj ondoj  
Jam super nia kap',  
Sed post falegoj multaj, ĉiam  
Revivis la naci':  
Subtenas nin mistera fort' — nur  
Hungaroj restu ni!

Do kiu diras: ke jam vivas  
Hungar' nur en Pasint'?  
Terura estas la vizaĝo  
De l' tombon forlasint'!  
Spiritoj havas horon, kiam  
Eksonas vekokri'.  
Leviĝas peza ŝton' de l' tomb' — nur  
Hungaroj restu ni!

Malnovaj kulpoj absolvitaj!

Estingis sin la flam'

De l' malben': parti-pasio  
Kaj venkas patrujam'.  
Per sama sento, cel', ideo  
Ardantaj estu ni;  
Ne timu ni pri la Estont' — nur  
Hungaroj restu ni!

La land' mil jarojn estis nia,  
Kaj la hungar': hungar'!  
Ventegojn venkis, kiuj kuŝas  
Nun dise en tombar'.  
Afer' ne nova estas por ni  
De l' uragan' furi'!  
Ni venkos la inferon mem — nur  
Hungaroj restu ni!



## ***PATRINA LARMO***

Kiomfoje skribon ŝi de l'  
Fil' ricevas,  
Kiu marojn malproksimajn  
Iri devas.  
Larmo tremas, kara, brila  
En okulo  
Brilas ja pli bele nek la  
Marspegulo!

Kiomfoje skribon ŝi al  
Filo sendas,  
Vin, ho kara, kara fil', mi  
Hejmatendas!  
Tremas en okul' profunda  
Larmo pura  
Pli profunda estas nek la  
Mar' lazura.



## **SENDEPENDO**

Fore, inter montoj  
Mia tendo nestas.  
Rok', arbaro sole  
La kunuloj estas.  
Min fendegoj baras,  
Muĝas la abioj  
Min apenaŭ trovas  
Eĉ la sunradioj.

Mond' malica, serĉu!  
Mi bon-lokon trovis  
Ĝoje, ke mi al vi  
Dorson turni povis.  
Via kruda, bruska  
Voĉ' min ne atingas,  
Vete kun la agloj  
Mi flugilojn svingas.

Ho, kunuloj miaj,  
Mont', arbaro, roko,  
Ĉe vi estas por mi  
Bon-trovita loko!  
Ŝiron de la dornoj  
Portas mi sen plendo,  
Nur vi estas mia:  
Dolĉa sendependo.

Magda Donászy (1911-1988)

**LA GRILO KAJ LA FORMIKO\***

Grilo:

Ĉir, ĉir, ĉir, karul' Formiko!.

Formiko:

Ĉu vizitas min amiko?

Grilo

Jes, mi. Kanta Gril' la nomo.  
Kiel varma via domo!

Formiko:

Kara Grilo, do saluton.  
Sed demetu la surtuton.

Grilo:

Hu, la vento blovis min tro.  
Neĝas, frostas. Venis vintro.

Formiko:

Kie ajn la frosto akras,  
ĉe mi bona fajro flagras.

Grilo:

Kiom da hejtaĵo tie!  
Ĉu vi gajnis loterie?

Formiko:

Mi laboron ne neglektis,  
dum somere mi kolektis  
tigon, spliton, kruston, pajlon  
penis per surdorsa porto,  
ke mi povu meti fajron  
kaj min savi de frostmorto.

Grilo:

Ho, kaj kio en angulo  
estas tio, vi, ŝparulo?

Formiko:  
Herbo, frukto, ŝelo, greno,  
ĉio bona por festeno,  
muelite kaj pistite.  
Nun mi manĝos apetite,  
kapdoloron mi ne konos,  
aspirinon ne bezonos.

Grilo:  
Trezorejo ĉi kamero!  
Al mi mankas eĉ panero.

Formiko:  
Vintron la prudent' avizis:  
Ĉu vi do vin ne provizis?

Grilo:  
Ne. Mi havas grandan peton.  
Volu doni nun prunteton,  
ĉar se mi ĝin ne ricevos,  
de malsat' mi morti devos.

Formiko:  
Kompatinda kamarado,  
do malplenas via plado?  
Sed ni havis ja someron,  
kiel do vi la kameron  
ne plenigis antaŭvide?  
Ĉu vi kuŝis malsanlite?

Grilo:  
Mi nur ĉirpis, ĉirpis kante,  
pri kolekto ne zorgante.  
Mia zorgo la muziko  
estis, ne pajl' aŭ spiko.

Formiko:  
Sciis vi, ke venos vintro,  
tamen vi senzorge trilis?  
Nun murmuris via ventro.  
Ĉirpo vin ne tre utilis.

Grilo:  
El ĉi multe da manĝaĵo  
donu iom da furaĝo.

Formiko:  
Nur konsilon mi donacos,  
eble tio vin kuracos:  
Se muzikis vi somere,  
dancu nun, ĉi-maniere  
vin varmigu frostvetere.

(Kun Márta Vári)

\* La poemfabelon prezentis infanoj en Budapeŝto dum la Infana Kongreseto en 1966.

Ákos Dutka (1881-1972)

**ANTAŬ LA KRISTO-BILDO DE YPERN**  
(En milithospitalo dum la unua mondmilito)

Kanonoj blekis ĉe Ypern; en olda  
preĝejo la litoj de vunditoj plenis  
kaj antaŭ la altaro artornama  
sur teron tri soldatoj sangaj venis.

Provencan kanton zumis unu febre  
kaj ame flustris li: Lisette kara ...  
Soldat' dikosta, kimra, okulferme  
la akvon glutis en kuŝad' najbara.

Junulo sveltfortika, apud ili,  
kiel reĝido de fabel', hungaro,  
jen kuŝis, — hejme panjo pri vi sonĝas: —  
Mikael Könyves Tóth, dudeka jaro.

Kanonoj longe blekis malproksime:  
Rigardas ses okuloj la altaron,  
moviĝas tri vinditaj manoj lante,  
hezite nun en sangan solidaron.

Pierre, la mildbarba kaj amema  
kaj Mikaelo, kiun kampoj sendis  
el Hungaruj', kunplektis siajn membrojn  
en sonĝo; pri dolor' neniu plendis.

Superaltare olda bild' de Kristo  
ekbrilis, kaj okuloj liaj ridis,  
radio blanka flugis tra preĝej', dum  
la sangaj manoj trovi sin kunglitis.

(Kun Paŭlo Balkányi)



Béla Endrődy (1886-1956)

### **HAJDE'**

Hajde' Sultan filino bela,  
Vagas en parko kun plezur' ...  
Aŭskultas ŝi pri birda kanto,  
Pri ondbabil' pri ventsusur'.

Kaj, dum sur mola musko-lito sidas  
Ŝi sub ombranta branĉotend',  
Jen, iu venas, kisas ŝin, kaj  
Jam malaperas — dum moment'.

Ha! Aŭdacul'! Ha! Sklav' malpura!  
Ekkaptu lin! Bluvesta sklav'!  
Kaj bruos en ĝarden', palaco  
Serĉ-persekuto — ĝis la traf'.

Sur tron' eksaltas la sultan potenco  
En kolereg' terura nun:  
"Al mi, al mi la mizerulon!  
Kaj senkompata estu pun'!"

Apud la patro sidas Hajde'.  
Enportas sklavon servistar':  
Bluvesta sklav', sed en okuloj  
Kun arda bril' jen: fajromar'.

Bluvesta sklav', sed dolĉaj lipoj,  
Kaj vang' pli pala ol lili' ...  
"Filin'! Ĉu la krimul' li estis?"  
Knabino flustras: "ho, ne li!"

Milán Füst (1888-1967)

## **LETERO PRI LA MORTO DE EDIPO\***

"Oidipus!" — ni kriis kaj laŭtege ekploregis ni kun brakolev.  
Ĉar la sanktajn leĝojn, bronze kaj homkore ĉizitajn rompis li.  
Trumpetoj tiam sonis tranĉe kaj post ili kiel fajrotorent  
Falegis de sur flanko de monto la jarcenta malbeno de Mitras.  
Patrinoj junaj kaj seriozaj  
angore rigardis sian bebon, kiu dormis sur ilia brust.  
Ardaĵo la kampojn ĉirkaŭkuris, — subiris la sun.  
Nigrigis la flanko del monteto kaj ĝiaj frondoj; ĉevala kadavrar  
Kuŝis sur ĝi dise... ĉar kuro ŝovaĝa estis tio ĉi, ekscita, lasta kuro  
sovaĝa  
De la heroldoj; ankaŭ ili, kiel sako, tiele falis, tiele sub la arboj  
sternis sin  
Tuj post sia elseliĝo kaj rakontis, ke al Edipo stas finita jam.  
Pli fore, sur angulo de plac la saĝuloj, kaj eĉ pli fore eta grupo kun  
sakflutoj trapikitaj,  
Tiel same veantaj, pri la funebraj, kaj lamentantaj kiel orfa infenar  
La sakflutistoj de la kulpa reĝ.  
Sed kelkaj leĝeraj facilulinoj, kvazaŭ nenion ili aŭdus,  
sukis al si la lipojn per langeto kaj tiamaniere rigardis ĉirkaŭ sin.  
Bukloj iliaj kiel nuboj krispis, kaj tremis al ili la eta agema man ...  
Ili nur metadis-agadis dum klakado de pantofloj siaj,  
prefere aliĝis al restintoj, ankoraŭ vivantaj, luktvenkintaj la ĉevalojn  
sovaĝajn,  
kaj nun kuŝantaj duonsvene, dum mano aŭ flustro virina ne dolĉigis  
al ili la lacan dormon.  
Ah, serioza la leĝo! — diradas ankaŭ ili, sed ne kredis.  
Kion ili pensis?  
Mi ne scias, ho mi ne scias. Ŝajnas, ke ordono ne ekzistas sur la ter',  
Kiu povus bridi ilian fajron kaj turni al niaj zorgoj la timonon de ilia mens.  
Ilia la ter, ĉar ilia la pek! Ja kio al ili la sufero del printempo, kio la dolor,  
kaj la granda plor de la forlasitoj sube en la malsupro de la val?  
Hartuber al kelkaj estis metita kiel al impertinentaj ĉien-nazoŝovaj  
knabinetoj,  
... Kaj unu el ili fine la belan kapon turnis eĉ al mi.  
Kaj atendis. Por ke kiel besto soifa, trovinta fonton, mi trinku el ŝia  
okul-lum.

Jen estis la damno, ho reĝo Oïdipus. Dum ni malbenadis, ni mal benis  
la volupton kaj volintus niajn virornamojn ĵeti for ...  
Ĝuste tiutage, kiam ni vin priploris: jen dronis ankaŭ mi, fariĝinta la sklav  
de voluptoj ĝisfine-ne-videblaj. Sombraj maroj kaŝas jam mian junecon  
puran.  
Hetajro min posedas, kaj, mi sentas, por eterne. Mi ne povas ekzisti  
jam sen ŝi,  
Ĉar ĉiam ŝi nudas kaj ĉiam ridas. Ringoj sur ŝiaj fingroj ...  
Ho lasu min, al mi la vortoj mankas ... kaj kompanon vian jam forge su  
por etern.

\*Noto de Kalocsay:

"Mi ne metis apostrofojn en kelkaj poemoj tradukitaj anstataŭ la eliziita o-finaĵoj de sub-  
stantivoj. Jene mi emfazas, ke tio estis ne forgeso, sed intenco. Ĉar: 1. La afero ne estas  
senprecedenca. Vilho Setälä en sia libro "Fortoj de l' Vivo" plurfoje faras tion, ek-zemple  
sur paĝoj 89, 90, 91, 92, kaj, laŭ mia scio, sen ia skandalo. Sincerdire, mi timis pri la  
prestigo de E-o. Se la poetoj, kies poemojn mi tradukis, vidos sian kreaĵon plenshu-tita per  
tiuj multaj ' ' ' ' ' ' ' ' , ili diros, ke E-o ŝajne estas ia arkaika lingvo."

La apostrofo havis kaj havas kontraŭulojn, en kies okuloj ĝi estas kvazaŭ dorno. Laŭ  
Brendon Clark la elizio sonas kiel singulto kaj dum laŭta legado aŭ en konversacio  
malfaciligas la komprenon, kondukas al kvazaŭ dialekto.

En la "Arto Poetika" de C.E.R.Bumy ni legas:

*Ne svarmu ili en la vers' elstara  
kaj pike, kiel en la fiŝviando  
la etaj ostoj, kiuj dum la frando  
minacas ĉiam hoki en la gorgo.*

Gábor Garai (1929-1987)

**MIA PLEZUR KAJ MIA TURMENTO, BUDAPEST\***

Magio prujnofreŝa de stratoj frumatenaĵoj,  
bremsogrincado kruda de oldaj busoj astme penaj,  
somer-kaprico de banejoj ĉampanŝpruc-koloraj,  
senfina kruto de la ŝtuparoj ĉefofic-kontoraj,  
belegaj damoj pelten kudritaj — prirabitec fremdula —  
sundronoj grandaj vintre tra fum kaj vual nebula,  
knabinoj ŝvebe ekfloraj en papavet-jupetoj,  
krepusk-vizioj inter elektrolumaj stratostretoj,  
jen vi, resti deviga, arde altira nest,  
mia plezur kaj mia turmento, Budapest.

De vi mi eterne fuĝus — nur for, for! — mi min pelas,  
sed min via veneno kaj mielo rekverelas,  
kaj, kiel al silenta — al mi ne donita — naskvilaĝo,  
angore mi rerapidas: ĉu ne ŝanĝiĝis al vi la vizaĝo,  
ĉu vi ne iĝis fremda jam dum semajno kurta?  
Ho, la revojaĝadoj, ploregaj skuiĝadoj sur relopar suburba!  
Montoj, knabaĝaj veproj, Tabanaĵ\*\* rev-promenoj,  
bulvarde, en morbaj telefonbudoj, hasto ĝis folaj duonsvenoj,  
jen vi, resti deviga, vibre altira nest,  
mia plezur kaj mia turmento, Budapest.

Novstrate perloblanka kaj milda vic domara,  
en pluv tram-atendantoj kun sia sturm amara,  
anelaj tage-nokte fabrikaj maŝinaroj,  
homoj el ĉambro fridiĝa al svarm de trotuaroj,  
Danub tenera, murda kun sia ferum sep-ponta,  
tagiĝ de vagabondoj, ho, kien perdiĝonta!  
Juvel varia de la futuroj film-rapidaj,  
glacio resobriga de miaj tagoj disprodigaj,  
flamflor ekscita, ke miaj lamfidaj noktoj brulu,  
vi min en mondon metis, vi min en morton lulu,  
naskinta kaj murdonta, resti deviga nest,  
mia plezur kaj mia turmento, Budapest!

\* Vd la piednoton sur la paĝo 112.

\*\* Urboparto de Budapest.

Pál Gulyás (1899-1944)

### **LA KORO DE L' SOLDATO**

Ho, vi, soldat'!  
Se vi fiere pretermarŝas min  
kaj klakas la flava keramit'  
sub viaj tondraj paŝoj —  
ĉiam pri tio mi meditas:  
kiel malgaja kaĝ'  
ja estas via vasta brusto,  
kiel malgaja kaĝ' metala,  
sub kies ŝtalkirasoj  
fugadas cel-nescie  
via mola, ruĝa kor',  
ĉi tiu trila birdo,  
kiun via kara panjo  
el sia blanka man'  
kun mil esperoj iam ekirigis.

Ernő Holló (1910-1983)

## **ANSEROJ**

Je ia krio, ĉaro-bruo, bleko  
de aŭtohupo, je ia eksono  
niaorele nekaptebla, je fora  
voĉo alvoka,  
ili flugilojn siajn disetendas  
duflanken kiel aviadil-alojn  
aŭ remil-paron neĝo-blankan, kaj  
kun stentora gi-ga-ga-ekzaltiĝo  
ekvojas flugi tra l'  
nemezurebla maro de l' ĉielo.

Nur kvin-ses paŝojn longas kurs' ekkura,  
entute tiom estas lukto ilia,  
la senespera, blinda, vana  
renkontiĝemo  
kun nubo, kosmo, infinito.

Kelkpaŝe 'stas la voĉo: flugi, ek!  
Kaj l' adiaŭ reciproka kun  
la herboj, stratoj, vilaĝfinoj, akvoj, —  
poste la paŝo mortas en sin mem.

La tuto 'stas jam ne pli ol mallerta  
klopodo, kiel la kriĉad' sensona de l'  
patrino infan-senigita, aŭ tremo  
de la hirundo inter  
la ungoj de aglo,  
ke dezir' ilia estas morta  
kaj la piedoj  
gluiĝas teren.



## **VIZAĜO SURSTRATE**

Vizaĝo,  
dura, fermita, kion vi portas? Kiel  
profunde kaŝas vi la kareson por  
viaj infanoj, la kliniĝadojn  
ŝutitajn en okulojn de l' ĉefo, brakumon  
de l' amatino, fuŝitan  
tolon, sukcesan globolagron, eraran  
rubrikaĵon magazen-libran, vinon  
vesperan, vin kanti kapbalancigantan, mokon  
de l' edzino, ke: nu jes, aliaj lukras pli. Kaj kiel  
avare vi gardas viajn bagatelaĵojn, kiuj  
'stas tiel same viaj kiel  
via stomak-ulcero kaj kor-reŭmatismo.  
Silento estas en vi kaj post vi kaj  
Oantaŭ vi, kvazaŭ  
neniun vi havus en la mondo, kvankam  
vi havas fraton, familion, parencon,  
kiuj same en vi enestas kiel  
viaj aĵoj time gardataj en tirkesto.  
Vi havas amikon pensatan kun manpremo,  
malamikon, kun kiu vi pretas interpugni.  
Se mi vin haltigus: kion vi portas?  
Ĉu vi min brakumus aŭ  
kaptus min je la kolo?

Gyula Illyés (1902-1983)

## **DANKE**

Pereus la homar' sen ido,  
se la virinoj aŭdus, kian  
fi-tonon uzas viroj, kiam  
ili obscenas kun hen-rido  
pri la minut', kiu dediĉas,  
kiel oaza fonto sorbon,  
la genufleks-kultatan korpon,  
kiu kraĉujo poste iĝas.

Kiom ni, kun fidelo vera,  
ja dankis por ligiĝ' federa  
al homfratin', post ol, falintaj  
venkitoj, ni nur kuŝis, lacaj  
pro sangoperdo, trans forpasaj  
espero, kred', bataloj blindaj?



## **MONTRIĜAS**

Montriĝas ungoj de leono:  
burĝonas abrikoto, pir' kaj  
disvolvas ruĝe sin ĉi mildaj  
ungegoj de l' printempsezono.  
Jen ĉie, ĉie pura campo  
leviĝas svarme en la alton  
kaj ĉiu kvazaŭ montras halton  
ordonon praan tra la kampo.  
Jes, kvazaŭ patrinbest' giganta  
elŝovas sin kaj brust-aperte  
la vojon baras for averte  
al mond' pereon alkurante.

Kiom da brakoj! Mi observas,  
ke grefoj, puraj glavoj skermas.  
Kiom da edukad', pacienco,



elteno kaj triumfpotenco

kontraŭas la needukitan  
instinkton por mortiĝ' agitan!

La koron saĝa dur' ekregas,  
jen, la profundo ja fortegas  
pli ol la tero, ol la homoj.  
Ne kuru time! Eĉ se domoj  
kaj turoj falas de l' furiozo  
inunda de l' militĥaoso,  
ĝia pramalamik' sin levas:  
la pac', kaj fine venki devas.



## ***POETOJ INTER SI***

Ne povas esti hom' honesta,  
kiu mutigas sian liron.  
Tiu mutigas la verdiron.

La nemensogon, la netrompon  
ĉesigas tia hom', jes, frato,  
jen estas ja fakta stato.

Vi ne prosperos eĉ pri l' sorto,  
se la diskutfurioz' ne bruas.  
Poet', se mutas li, ekbluas,

kiel al kiu aero mankas,  
kaj palas ĉio, spiroperda,  
kies li estus buŝ' aperta.

Bibli-elvoka stranga plago!  
Sed tutaj imperioj falis,  
kiujn versero ne regalis.

Terur'! Poetoj — ajn sonore  
kiu homveron ne disdonas,  
meritas, ke li en ĝi dronas.



## **TRANSFORMIĜINTA KNABINO**

Ŝi nudpiede, duonsovaĝe  
kun ni kuradis, nin simile.  
Foje komencis al ŝi lumi  
l' okuloj velurbrile.

Foje, dum kun ni ŝi transsaltis  
la heĝon en pelado kura,  
ekfulmis ŝia sortomarko:  
la brusto frumatura.

Ŝi dancis, sen konjekt', ke — kiel  
malsan' latentia iun boras —  
ia lontana fremda volo  
en ŝi laboras.

Kaj foje, kiam siajn lipojn  
ŝi kun frandem' infana lekis,  
ĉi lipoj, kvankam innocentaj,  
jam kulpe ekardegis.

Kun ni, sur arbo, ŝi fabelis;  
la heroin' ŝi estis ĉiam,  
kaj inter nin el la butiko  
foje ne venis ŝi jam.

Fortepiano murmuranta  
domfunde ŝin kaptita tenis.  
Salutojn ŝi ne reciprokis,  
eĉ kiam ŝi elvenis.

Kolonj- kaj har-odor', obscenaj  
bubvortoj ŝin postsekvis garne,  
kaj, povra, alian ĉielregionon  
transiris por eterne.

Károly Jobbágy (1921-1998)

## **SAMLINGVE**

Suĉinfanoj  
    samlingve pepas-lispas.  
La amparoj  
    samlingve aminsistas.  
La tombaroj  
    samlorsingulte tristas.  
Eternas tio kaj ne havas finon.  
Tamen  
    suspekta la nekomprenato,  
mi tiun ŝirmas ŝilde kontraŭ bato,  
kiu sin igas al mi frato  
dirante vortojn  
    kun klara al mi senco.  
Disĉesu furioz',  
    danĝer kreskanta en hommenso.  
Al la konserva ritmo de l' patrina  
lingvo pariĝu l' esper-origina  
lingvo,  
    kiun la hom-malesperant'  
lastprove ĵetis al la borda rand'  
de l' ŝaŭmobolaj ondoj de la Sang',  
kiu jam ŝajnas mond-brakuma  
spir' de muziko ĉie-zuma,  
ĉiun-penetra! Akompane  
kvazaŭ la Paco signas mane.  
"Paseo-manka — oni krias —  
sen nuancoj fajnaj..." Mi ne scias,  
sed min ne interesas tro.  
Ĉu pro nuancoj mi pereu do?  
Egale jam, nur estu lingvo,  
lernebla plej rapide, malplej pene,  
en kiu tamen vortas vorto plene,  
animojn ĉiugentajn perkompreni  
traanta, ke per ĝi ni krii jene  
tra l' mond', kie multvoĉe ve' amasas.  
"Ne pafu min! Amiko, pasas!"  
Kaj ke la vivon amas mi. Ekstermi  
ĝin mi ne lasas, ne lasas.

Jolán József (1899-1950)\*

## **LA BAKISTO-LERNANTO KAJ ATTILA JÓZSEF**

Joĉjo, la malgranda bakisto-lernanto  
laboris en bakejo de vilaĝo  
apud la hungara ĉefurbo. Li dormis  
sur sakoj apud la bakforno. En koro  
de l' knabo zumadis versoj de la  
poeto Attila József. Antaŭ kaj post  
la laboro li legis liajn poemojn.

Foje, dimanĉe bele li lavis sin,  
elskuis la farunon el sia ĉapo kaj  
ekiris por viziti la poeton.

— Mi deziras bonan tagon! —  
kaj paŝis en la ĉambron de la poeto.  
Li rapide deprenis sian ĉapon, sed  
tuj ruĝiĝis, ĉar el la ĉapo flugis  
supren faruno, kiel delikata, blanka fumo.

Attila József sidigis lin sur la  
divanon kaj demandis, de kie kaj  
kial li venis.

Kion diri, kion? Fine li respondis:

— Mi nur volis viziti la poeton  
de la belaj poemoj — sed liaj vortoj  
estis apenaŭ aŭdeblaj.

Li rigardis malsupren per siaj  
infanaj okuloj, kunpremis siajn  
genuojn, kaj pro la embaraso li  
premadis sian farunan ĉapon.  
Tamen subite li vigliĝis. Li dismetis  
siajn piedojn, ĵetis sian ĉapon  
sur la divanon kaj prenis el sia poŝo  
belan ruĝan pomon.

— Se vi akceptos ĝin, mi donas  
volonte al Vi.

Attila József "ĉe la rando de la urbo"\*\*\*  
ofte renkontiĝis kun tiaj homoj.

\* Fratino de la poeto.

\*\* Titolo de lia poemaro.

Lajos Kassák (1887-1967)\*

## **AL ĜOJO**

Ho ombro inertia en mi de svenanta korp' de Jesuo  
Ho Malĝojeco! Rigardu, en la kadukaj, nigraj urboj  
Kie nun bluaj rozoj de l' kadavroj odoradas  
Kaj nur la malĝoja falango de l' muŝoj flugadas  
vage en la silento,

Mi per kulpiĝo de l' virginoj gustumas la moston  
Kaj sonigas sonorilon antaŭ novaj Mesioj,  
Kiujn la plena arterio de l' jarcento elĵetos sur la  
foirojn.

Nun en brulantajn boskojn de l' Ĝoj' mi kaŝiĝas  
Kaj por mi ne estas jam: la estanta, estas nur: la  
neestanta

Sur malvarmiĝantaj ruinoj novan vizaĝon de Epikur'  
mi kantas

Kaj de l' ebenaĵoj ekkreskantan verdon, de l' montoj  
blankan glaciaĵon

Kun krudaj, kirlantaj amasoj la kolosajn metropolojn  
Kaj aparte la forĝistoj pugnon de la bankieroj  
flavajn tigrookulojn

La subiĝantan subakviston, la ĝardeniston, kaj la  
ŝnurnervan piloton.

Bilionojn da eblecoj de l' vivo mi spilas el mi mem  
Kaj la ora fork' de l' rido ekfrapas sur miaj dentoj  
Vaganta ĉevalvir' de l' ĝojo, de l' volo mi estas  
Freneze ĉevalid', mi kun vastaj naztruoj blekas al  
la tempoj:

Kiam la profundaj ferfandejoj de Vestfalia al ni  
kantos

Kaj post siaj jugitaj bovoj la sovaĝa hungara kampano  
La 1905 de Petersburgo, la gajaj vinrikoltantoj de  
Champagne

Kaj, ho, vidu, ankaŭ mia ebria strata lingvo, kiu nun  
Unua ĵetas sin en la novan mondon.

\*Lajos Kassák estis la gvidanto de la plej moderna literatura skolo en Hungario: reprezentanto de la ekspresionismo, dadaismo, konstruktivismo.



ankaŭ sen avido korpa  
pro ilia puro,  
ilia forto  
iliaj ritmaj movoj  
ilia kuraĝa rigardo  
mi amas ilin.  
En ilia proksimo mi sentas la dolĉajn  
gustojn de fermentado  
kaj vidas, kiel pleniĝas  
ilia korpo  
per ekscito kaj ĉarmo.  
En ili ekflagras  
la fajro de ribelo  
natura deziro de l' posedo.  
Se ili proksimiĝas,  
mi rigardas profunde en iliajn okulojn,  
kaj se ili malproksimiĝas,  
mi turniĝas triste post ilin.  
Sed vane ili kuregas,  
ili ne povas ŝiriĝi de mi tute.  
Jen ili speguliĝas en mia koro,  
ili ne povas veni vojerare  
el la denso de miaj pensoj.

Pli malpli baldaŭ  
ili estos mi  
kaj mi estos  
ilia memoraĵo.

Tiel estas bonorde.

Amen.



## ***EN BONA HORO***

Tagiĝo ridetanta  
ridetu ankaŭ al mi  
virino virino  
venu el via domo

Kun mia fruktoplado  
mi venis  
por vin pridonaci en la lumo.

Ho stelo de mia nokto  
orinundo de mia tago  
klukanta mia kokineto  
mokanta mia turdo.

Nun mi diras ĉion ĉi  
dum vi ne estas ĉi tie  
poste mi vin brakumos  
kaj silentos.

Poste  
mi vin rigardos  
mi vin rigardos  
kaj miros  
kiel bela vi estas.



## ***LABORIST-PORTRETO***

Tiun ĉi kapon ne formis Dio laŭ sia propra bildo  
tiun ĉi kapon turmentas memoro de l' paseo kaj  
duboj de l' nuno  
en tiu ĉi kapo ĝermas semoj de revolucioj  
tiun ĉi kapon delonge gvatas ekzekutisto  
tiujn ĉi manojn direktas la ideo de l' kreo  
tiuj ĉi manoj estas benataj de live kaj damnataj  
de dekstre  
tiuj ĉi manoj bategas kaj levas per unu fojo  
tiuj ĉi manoj portas spurojn de katenoj  
tiuj ĉi manoj ne plektiĝas por preĝo  
tiuj ĉi manoj ne naŭziĝas de sango  
tiuj ĉi piedoj ne misglitas sur oranĝoŝelo  
tiuj ĉi manoj interligas okcidenton kun oriento  
tiuj ĉi piedoj trete disprenas la sep kapojn de  
l' drako



tiuj ĉi piedoj atingos la pejzaĝon pri kiu la kapo  
revas  
tiu ĉi koro per sia propra ardaĵo renaskas sin  
mem  
tiu ĉi koro estas la ĝemelfrato de mia koro  
tiu ĉi homo estas tia kia estas mi  
sub tiu sama ĉielo  
tiun saman kanton  
ni kantas  
pri semado  
pri rikolto



## **LA GARDANĜELO**

Potenca bronz-anĝelo sur blanka  
ŝtonkolono  
gardas la trankvilon de l' nokto.  
Adorinde bela. Netimigebla.  
Sed li ne rimarkas  
en la frostiĝinta silento  
senonaj kaj senombraj  
birdoj alvenas  
por ruinigi la domojn  
mortigi la homojn.

Tagiĝe  
sole li staras sur la loko de l' pereinta urbo  
el bronzo  
sur blanka ŝtonkolono.



## **LA REALAĴO DE NENIO**

Vi ne belas pli ol la aliaj  
tamen vi belas pleje.

Vi ne bonas pli ol la aliaj

tamen vi bonas pleje.

Strangas ĉi tiu ludo  
amaras ĝia gusto  
kaŝiĝanta sub miaj palpebroj.

Vi ne havas korpon  
kiu sur si portus  
la spurojn de turmentoj  
vi ne havas kutimojn  
kiuj la mildajn ŝafidon  
incitus en sangsoifan lupon  
vi ne havas parencojn  
kiuj estas por vi malhonoro.

Ho vi plej bela kaj plej bona  
vi estas jam nur via memoro  
al mi.

Mi ekiris  
por vin serĉi en la vesperiĝo  
por vin kisi antaŭ ol la suno  
dronos en la maro  
sed faleganta pluvego dislavis la vojojn  
vento de rabbesta muzelo  
dismordis la velon de mia ŝipo.



## ***LA ZORGOJ DE SOLECA VIVO***

La vento la vento  
freneze krozas  
pelas la nubojn  
elŝiras la arbojn  
kaj hurlas  
ploras  
sensatione  
Mi pensas nun pri tiu  
kiun neniam mi vidis

sed mi sentas ŝian proksimecon.

De jaroj  
ŝin mi pentras sur tolon  
ŝin mi skulptas en ŝtonon  
kaj per vortoj senvoĉaj  
al ŝi mi parolas.

Eble nun ankaŭ ŝi pensas pri mi.  
Eble ankaŭ ĉi senindulgan venton  
kirlis ŝi  
por al mi mesaĝi  
en sia tristo.

Aladár Komját (1891-1937)

## **AMA POEMO**

Kiel la tero vi vin etendas  
kun trankvilo plena kaj danĝer' pereiga.  
Montpinto, golfo, istmo ŝiras-fendas  
vian riĉe fekundan korpon,  
ŝtormnuboj de l' bukklar' akumulas volbon  
super via frunto.  
Surbrake al vi nestas akcipitro ŝrika.

En tertremego, fulmotondro  
enorm-amase kun vi min intermiksi!  
Kiel fajra neĝobulo, brule,  
de via brustopinto alprofundi rule!  
kaj elripozi.

Min lulas la fluido de viaj membroj,  
min kovras garde la frondo plorsalika  
de via hararo per ombro refreŝiga,  
la bord' fornaĝas, kiel sonĝo, pale,  
arbaroj, rabobestoj, roko-sovaĝo  
fandiĝas sub nebulo fabelvuale.  
Kaj nun kliniĝas al mi via vizaĝo,  
kiel la bona vartistino-vizaĝo de patrin'  
en mia ĉemizeta aĝo.

Vi, amatino! Vi, patrin' al mi!  
Kaj simpla, laborema tagposttaga kunulino.  
Vi surprenas nian sorton al via febra ŝultro,  
ne ploras, ne jelpas, nek humiliĝas,  
sed marŝas samaritme en la virina multo:  
kiu sufokas sian forton en la tekstomaŝino,  
kiu la garbojn ligas sur stoplej' figrafa,  
aŭ en kudrilan truon ŝovas sian lumon okulan,  
kaj ne ploras, ne jelpas, nek humiliĝas,  
sed jam stariĝas sur sia loko, home-brava!  
Batite, dure rebatas,  
malami kaj ami la filojn instruadas:  
malami kun neestingebla granda malamo  
la sango-grasigitan, nesatigeblan homtavolon,

kaj ami kun ĝismorte-fidela granda amo  
la siaspecan popolon!

Al ili kaj al vi ĉi kanto kantas honoron!



## ***REKRUTIGO***

Jen Johan' Trezora!  
Bona por fatraso.

Mikael' Konstanta!  
Bona por forpaso.

Petro Diotima!  
Bona por blasfemo.

Jen Andreo Gaja!  
Bona por plorĝemo.

Jen Francisko Forta!  
Bona kriplo putri.

Jen Jozefo Dika!  
Bona vermojn nutri.

Jen Kaspar' Bonhoma!  
Bona por rabbesti.

Jen Adam' Verdira'  
Bona por neesti.



## **VOĈO DE HUNGARAJ MALRIĈULOJ**

Mordadas streĉlaboro kaj malsat',  
kreskantoj vadas en mizero-mar:

Degelas eĉ frostinta senfidul',  
hontruĝo sur la vizaĝ' amara alarmas!  
Kaj kiu hodiaŭ mortas,  
Tiespupile memor' de la diktaturo varmas.

Ankoraŭ foje tion!

Sennombre nekalkuleble  
en la fabriko, minejo, kamp' de sinjoraj moŝtoj,  
vekiĝas vigla la tuta popolo de senhavo!  
Stariĝis! Ekiris!  
Sur pado inter la du mondoj  
la forviŝitan fronton de premegantoj kaj premegatoj  
distranĉis glavo.

Cent tridek tagoj!\*

Kiam la nia estis ĉio!  
Tempo de plenumiĝo eĉ kun eraraj agoj!  
Nia aero bona,  
nia sango, ost', muskolo, nervo,  
stimulo eterna. Signo ordona!

Ankoraŭ foje tion:  
la potencon de l' sovjetoj!

Surkorpe batadas stang' de turmento febra,  
sed en forĝejo kaŝa de l' Partio  
la ŝtalo jam ardas,  
el kiu iĝos ega mult' armila kaj laborila,  
detrua kaj konstrua: nerezistebla!

\* Tempodaŭro de la Konsilantara Respubliko en 1919.

Lajos Kónya (1914-1972)

### **KIE VI ESTAS ORIOLOJ?**

Orioloj, vi, kantbirdoj, sol-melodiaj, senresponsaj  
flamigiloj de l' ĝardeno, kie vi 'stas jam, fenomenoj?  
Ĉu sekeco murda pelis vin el ĉi pejzaĝo soifa,  
aŭ ni tedis vin per niaj klaĉoj kaj lamentoj eternaj  
kaj vi, oraj sonĝoj pasis al ĉiel-region' alia?  
Araneo plektas reton sur la senornamaĵaj branĉoj  
de la persikarboj, kiuj moviĝadas vin memorante.  
Viajn laŭtjubilajn fajfojn la vastvolba ĉiel' tagiĝa  
plu ne eĥas, ho, mi mem ne sciis, kio do al mi mankas,  
kial do mi rigardadas la ĉielon ire-reire.  
Orioloj, vekhorloĝoj oraj, flutetantoj amataj,  
sen vi la somer' ne plenas, mankohava la harmonio.  
Tiel ja necesas via fola kant': "Ne fidu la viron",  
kiel roso al la kampo, amo fidela al knabino.



### **LA RAJDARTISTINO\***

La rajdartistin fariĝos ĝuste tia  
veanta ĉielŝiradanta  
maljunulin kiel la ceteraj  
Avarados kurados  
lamentados  
Ŝia kredomondo stos eksterorda  
ofte ŝi survestos  
mantelon grizan  
de sensenca pieco  
Kaj ne trovas en ĝi trankvilon

Sub la mantelo  
turmente portos sian edenon  
la multescia korpo  
la iam strase plakita  
intervuale luliĝanta  
streĉita

arke saltanta  
infren de ĉeval supren al ĉeval  
fluganta galopanta

Kiel valorperdintan  
oldan moneron portos  
siajn memorojn  
la korp falemiĝanta  
kaj en la preĝdomo ŝi  
elmetos ilin vice  
antaŭ sin  
pri ili prezurados  
ŝiaj oldaj okuloj  
palpebrumantaj pro la lumo  
ĝuste sufiĉa  
por ĝismorte trabrili  
ŝian griziĝintan vivon



## **LA ROMIANO\***

Mi la legiestro  
kuŝas en tomb elfosita  
loke de mia kor  
sub la volb de miaj ripoj  
stas mallumo de vako  
Kiel krucumita aglo  
ekbaraktas mia memoro  
sur la Baltaj vizaĝostoj  
de kampulin barbara  
Tage dudek-kvinfoje ŝi tramuelas  
la lernitan tekston  
kaj kiel iu kaptinta birdon  
premas pugne la monereton  
kiun en ŝian polmon metas  
la turistoj.  
Poste ŝi fermas super mi la lignopordon  
dormu plu romiano  
Kaj mi ree kaj ree mortas  
pri Panonio

\* Vd la piednoton de p. 112.



## **NIMBO**

Nin liberigu Disinjoro  
disde l' potenc-ebriuloj  
al kiuj facile ekstreĉas  
la akoholo la kranion,  
kaj tiam el ili  
eksplodas la pranaturo,  
ŝiriĝas la teg' de ilia  
discipliniga inhibicio  
kaj ni povas vidi  
ilian nudan memon  
Al kelkaj eĉ gluto sufiĉas  
por esti malkovrita,  
por montri la kruelan  
cezar-vizaĝon lupajn dentojn  
Kaj se li grimpis alten  
li ne rekonas siajn samlernejanajn  
viumas ilin kiel fremdajn  
nenion-neniun memoras  
precipe ne tiun  
kiu siatempe  
skribis liajn lernekercaĵojn  
sur kies dorso li gimnastikis supren  
Matene li surmetas nimbon  
anstataŭ ĉapelo  
per sia rigardo subluma  
preterrigardas super ni  
kiel al kiu la cerbo bolas  
de landaj zorgoj  
Ĉu li ne scias ke la lando el ni  
sin kunmetas  
kies sorton eĉ por mangesto  
indigi li ne pretas?  
Nur supren al la alto  
li okulas dum irado  
ĝis foje li falos surnazen  
kaj ruliĝos malproksimen  
lia brilanta nimbo el lado

Dezső Kosztolányi (1885-1936)

## **ADMONO POR LA RESPEKTO DE MALJUNULOJ**

Jes ja, kliniĝu antaŭ la pli aĝaj,  
ĉu stratbalaistoj ili estas, ĉu ministroj.  
Ne tiam respekton mi al vi predikas,  
kiel la pastroj kaj lernejoj legolibroj.  
Sed konsideru, kiel malfacile vi mem transsavas  
tra danĝeroj de jaroj vian korbaton fragilan  
sur ĉi globo malamika al homo,  
kaj ili, vivintaj kvardek, kvindek, sesdek jarojn  
kiom da vintraj matenoj, kiom da pneŭmonioj  
ili travadis, kiom da riveroj nokte preteriris,  
de antaŭ kiom da aŭtoj forsaltis stratangule,  
ĝis neatendite ili stariĝas antaŭ vi tempokronite  
kiel la mirakloj aŭ kiuj venas el la milito,  
rekte kiel flagostangoj, kaj subite, por via mirego  
ili disvolvas de l' vivo ŝtormobatita sed reportita  
la majeste flirtan, pacoanoncan, triumfan flagon.



## **FLAGO**

Nur bastono kaj tolo,  
tamen ne bastono kaj tolo,  
sed flago.

Ĉiam ĝi parolas,  
ĉiam ĝi flagras,  
ĉiam ĝi febras,  
ĉiam ĝi estas en ekstazo  
super la strato  
suprenflirte de alto  
tute en la ĉielo  
kaj ion anoncas  
ekzalte.  
Eĉ se jam oni al kutimiĝis  
kaj plu ĝin ne atentis,  
eĉ se jam oni dormas,

tage kaj nokte.  
tiel ke ĝi jam tute magriĝis,  
kaj staras kiel sekakarna orator' apostola  
sur pinto de tegmento  
sola,  
luktante kun la silento kaj ŝtormo,  
senutile kaj ĉiam pli majeste,  
flagras,  
parolas.

Mia animo, ankaŭ vi, ankaŭ vi —  
ne bastono kaj tolo —  
estu flago.



### ***KIU HODIAŬ MORTIS...***

Kiu hodiaŭ mortis  
nur antaŭ unu horo,  
tiel malnova jam al mi estas  
kiel soldatoj de Aleksandro aŭ Kserkses.  
Silento en liaj oreloj,  
polvo kaj muto en lia buŝo.  
Se en malnovaj ĉambroj lin nomas  
malnovaj amikoj,  
kun plumbopeza kapo mi provas  
pri li rememori,  
sed mi restas sen kompreno, li fremdas.  
Mia miro estas ŝajnigita.  
Lin kun la longa-longa flago  
de l' forgeso mi kovras  
kun ĉifona indiferento silente,  
ĉar mi lin ja neniom atingos,  
kaj li estas fore  
kiel soldatoj de Aleksandro aŭ Kserkses.



## ***MALBONA POETO, KIEL KORTUŜA...***

Malbona poeto, kiel kortuŝa! Oni jam de jaroj  
pri li ne parolis, poste lante lin forgesis.  
Trivite kaj grize li nun flankumas, la butono  
loze pendas sur lia jako ŝirita, kaj ĝi fajfas  
al la vintra vento siajn poemojn neeldonitajn.  
Kiom da orgojlo kaj forto! Sur lia vizaĝo sidas  
malamo, envio ŝajnantaj defore ia etera  
tristo. Apud li la famaj, kiujn gloras  
pagataj artikoloj, kaj festas aplaŭdoj de sovaĝaj  
koncertsalonoj, estas ŝakristoj kaj fortunĉasistoj.  
Sur lian kalviĝantan fieran frunton apostolan  
la vivo metis sian larman florkronon, diiginte  
lian junaĝan revon, je kiu li pli kaj pli kredas.  
Eĉ lia magro, devena el nutro malbona  
kaj el tuberkulozo, estas laŭstila. Tuta kiel libre.  
Vane vi parolas, kritiko, literaturo.  
Li estas la idealismo. Li estas la vera poeto.



## ***VIRINOJ***

Ne en flagreto de am' adoleskula  
parolas mi.  
Meze de l' vivo, florkronita de brakoj virinaj  
mi al vi konfesas,  
virinoj, miaj parencoj.  
Nun mi jam povas diri, ke vi tiel al mi proksimis,  
kiel neniu alia,  
kaj mi vin ankaŭ amis ja.

Konfuzaj kiel mi,  
fekundaj kiel mi,  
malklaraj fontoj, el kiuj oron mi lavis,  
oron veran.  
Feinoj de l' naturo, kapricaj kaj neelkalkuleblaj,  
sed pli veraj  
ol la penso sterila,

ol la mensogul' fiera,  
ol la ostoza, timiga, mortigema viro.  
Kien ja mi rifuĝus  
kun mia hirta kapo,  
kun mia poezio,  
kun mia terura zigzag-ira ŝanceliĝemo,  
se ne ekzistus vi,  
komprenaj, pardonemaj  
vivantaj sanktulinoj,  
piaj paganinoj,  
svagaj bonulinoj,  
fidelaj mastrumantinoj de l' realo?

Kiam vi kudras aŭ pesas buteron,  
rigardas montrofenestron kun faksperto seriozafekta,  
trotetas en galoŝoj gracie, sed ankaŭ mallerte kiel la albatrosoj,  
mi ekridegas de ĝoj', ke vi ekzistas,  
kaj ankaŭ mi ekzistas apud vi.

Al vi min ligis la destino  
por eterne  
per umbilika ŝnuro, poste per ŝnuro  
vivanta de deziroj,  
ke en via profund' mi serĉu la vojon ale al la vivo,  
kaj en vian sinon mi faligu mian kranion pensgravedan.

Ne unu, sed ĉiu el ili.  
Ĉiu 'stas al mi filino, ĉiu 'stas edzino,  
ĉiu 'stas amikino, amatin' mistera.  
Ĉiu 'stas al mi patrino.

Mihály Ladányi (1934-1986)

### **ELEGIO\***

Kunfrapiĝas post mi la ondoj del jar,  
el mia hurla buŝ la vortoj plu ne sparkas.  
Kiel mi sciuz, kia estos la postepok!  
kelkfoje mi abomenas la dekjare pli junajn:  
povas esti, ili fine ridegos pri mia amareco,  
el mia kanto la salo solviĝos en ia fluidaĉ  
kaj nenium plu mordos.

Forpasos mia tempo.

Ĉiam pli ofte mi estas sola.  
Mia voj malfacilis, defore mi trotetis surpiede,  
de kampoj surkraĉitaj, montetflankoj aridaj,  
kie floris nur revoj kaj eŭforbioj,  
domaĝe pri ĝi memori. Forpasos mia tempo,  
kaj kiel glav-akrigisto del Husanaj militoj  
mi maljuniĝos inter tranĉiloj kuirejaj  
fajfanta febrajn oldajn kantojn.



### **KAJ FINFINE\***

Kaj finfine, nenia kaŭzo malesperi: mi vin amas  
kaj pri vi revas. Eĉ tiam, se  
pri ĉiu mia revaro pretiĝas ekzakta statistiko:  
kiam mi entuziamis pri vi unue, kaj kiam mi pro vi malesperis.  
Ĉar, vidu, de kiam iu nia praulo inventis la Historion,  
ni ne povas vivi

sen dokumentado, transdonita al la forgeso.  
Vidu, sur la kolo del heroo la tabulon HEROO — kaj ankaŭ sur  
la kolo del ekzekutisto troviĝas tabulo.

Kelkfoje iom

malfruas la limtempoj. Al la Historio, nome estas egale.  
Ĝi faras sian laboron kiel purigisto antaŭ sia pensio. Ĝi certas pril faro.  
La Historio tordas la lipharojn pintajn, tiras surokulen la ŝirmledan ĉapon  
kaj kunbalaas la ostojn.

La ostojn del poetoj kun tiuj del agentoj. Kaj kiam la amaso jam stas  
konvena ĝi diras:

Nu, fine mi povos ripozi!  
Sidiĝas. Kraĉas.  
Estas paco.



## ***LI TRAIRIS INTER LA SOLULOJ DEL KAFEJO\****

Li trairis inter la soluloj del kafejo  
haltis en la cigareda fumo  
ĉel tablo de ŝvitpolmaj geamantoj  
fiksitis sian violinon submentone  
kaj komencis ludi naŭzan kanton  
por ke poste ankaŭ el ĉi tavernaĉo  
li pumpu al si monon post la aliaj enue

Olduloj kaj geamantoj  
laŭ ritmo del kantetoj modaj  
tiel balancetis la kapon  
kiel la infanoj la etajn vazojn matene  
ĝis iu alparolis la violiniston:  
ĉu el Bach vi ne scias?

kaj komencis migri en la fumo la lumo de fugo  
Kaj poste li ne havis emon monpetadi  
forportis la lumon el la fumo eĉ ne adiaŭinte

Nun  
aŭskultante la debilajn kantojn de la mondo  
mi premadas monereton de frazo  
por ĵeti ĝin en la ĉapelon  
de malbonaj spiritoj kaj aliaj  
feliĉpromesaj slang-langaĵoj:  
ĉu el Bach vi ne scias?



\* Vd la piednoton de paĝo 112.

## **NUR RIMO KAJ RITMO**

lelan kanton  
konvenan por preĝlibro  
mi serĉas en la poŝoj  
de la vespero,  
tristete fornaĝantan en la vento  
kiel violona rulado,  
kiu al neniu ofendas  
la rosan animon,  
nek al dio, nek al ateisto,  
donu tian poemon, sinjoro,  
tian kanton flirtan,  
de kiu ne altiĝos  
la sanga tensio de oficisto,  
nenio en ĝi troviĝu  
krom rimo kaj ritmo,  
ĝi ne estu maltrankvila,  
ĉar jam temp' estf,  
ke mi kaŭru kune  
sur vazo kun surskribo "Bonvolu do"  
kun iu ajn beate.



## **SEN EKSTAZO**

Kafejo,  
vi 'stas mia patrio kaj nun jam mia sola  
hejmo,  
inter la kalvaj hebreoj de Chagall,  
kiuj restis viaj en la kavoj de la milito,  
inter sendentaj oldulinoj,  
jam antaŭlonge forgesintaj  
la varmajn manoplatojn,  
kaj inter la sovaĝaj  
ciganaj stratulinoj,  
kiuj mian triston  
premas al sia vizaĝo kiel manca,  
kafejo,



fumanta tombokavo,  
inter la implikaĵoj de la gazetoj  
mi en vi kaŝiĝas, fabelu pri io alia,  
per rido leĝera kovru  
mian jelpadon amaran.

Sed, kafejo,  
ŝipo ruliĝanta,  
tra viaj juntoj  
enfluas la griza amaro.

La unuokula gazetvendisto ĉirkaŭiras la tablojn,  
60 heleroj  
por la hodiaŭvespera nervospasmo kaj strata akcidento,  
por tiom la mondo garantias,  
ke en via fuma sino mi povas vivi grize,  
sen sovaĝa ekstazo.

La unuokula gazet-kriisto estas kontenta pri la hodiaŭo.  
Ĝi estis plena de eventoj,  
do la gazetoj ree vendiĝas,  
Profumo-afero\*, trajno-pirabo en Anglujo:  
ĉio ĉi varmigas gazet-kriistan koron,  
ĉio ĉi bobelas supren inter la tabloj,  
kaj la tabloj ŝvebas  
dormeme en ĉi griza suko,  
kaj ĉi griza suko  
inundas ĉiutage la mondon.

La malsato-statistiko de UNESKO ne estas evento ĉi- tempe,  
ĉar la Profumo-afero,  
trajno-pirabo en Anglujo kaj la ceteraj,  
jen estas nun la ŝikaj.  
Kio okazis al nia cerbo,  
ke ĉi tion ĝi voras,  
ne la malesperon de la poetoj,  
ne la hurlon,  
kiu gluglas el la gorĝo de la disfalonta mondo?  
Morgaŭ konsola ridrikan' de aktorinoj  
nin alaplaŭdos el la magazinoj, siavice  
la tago sur nia kubuto  
ankaŭ hodiaŭ ĉifoniĝis.

Kafejo,  
la nikela bovino  
kun dismetitaj kruroj  
staraĉas sur tablo bufeda,  
el ĝia mamoo  
nigre fluetas la ekscito.

\*John Profumo (1915-) brita politikisto. En 1960 fariĝis ministro de milito. En 1963 li de-vis abdiki pro seksa interrilato kun Christine Keeler. Tiumtempe unu el la ĉefa temo de la presorganoj estis la "Skandalo de Profumo-Keeler".

Laky ( ? )

### **MI ESTAS POLICAN'**

Forlasis hejmon en vilaĝo,  
Kaj jen mi luktas kun kuraĝo,  
En mil minacoj de danĝero  
Por la eterna, sankta Vero.  
Help' de grandulo, de infan':  
Mi estas polican'.

Danĝer' reteni min ne povas.  
Min sur posteno mia trovas  
Somera brulo, vintra neĝo.  
Okul' mi estas de la Leĝo,  
Kaj ankaŭ ĝia forta man':  
Mi estas polican'.

Min noktaj ombroj ne timigas.  
Mi gardas. Kaj mi bride ligas  
Malican volon, bruon ĉian.  
Kviete dormu dormon sian  
Palaco granda kaj kaban':  
Mi estas polican'.

Je virt' virina, burĝ-honesto,  
Socia ordo, leĝ-majesto  
Je patroland mi kredas firme,  
Kaj ĉiam estas preta ŝirme  
Defendi ilin mia man':  
Mi estas polican'.

Se de l' pasioj ŝaŭma bolo  
La menson prenas de l' popolo  
Kaj kontraŭ leĝ' ĝi rompe venas,  
Kuraĝe bruston mi altenas  
Al plej freneza uragan':  
Mi estas polican'.

József Lengyel (1896-1975)

## **EPITAFIO**

1.  
Ĉi kuŝas  
Trankvil-nescia  
Centpatriulo senpatria  
Sian vivon pravigonta  
Soifulo vagabonda  
Sendormulo sonĝfikcia.

2.  
Ĉi kuŝas  
Trankvil-nescia  
Inter saĝaj senracia

Eĉ en neplugantajn semis  
Dikulinojn ami emis  
Magrinulojn ami emis  
Kulpis ĉiel ĉiubeke  
Ankaŭ kiel al vi plaĉus  
Peki se nur vi kuraĝus

Ridus vi — li ridis ege.



## **JEN MI ESTAS**

Kie la ter', sur kiun la rompitaĵoj branĉoj de mia korpo povus  
kliniĝi?  
Nenie hum', en kiun miaj fingroj povus fiksiĝi kvinradike.  
Sed ne. Estas mia sorto de mi mem farita kaj bone tiel.  
Jen mi estas, kaj nerompita, eĉ se mi 'stas senĝoja en la  
nerompiteco.  
Sed kial la stultuloj, kiuj nun al mi hurlas siajn instigojn?  
Ja nerompita mi estas, nerompita, nerompita.  
Kio mi dezirus esti?  
Ja mi ekzistas, ekzistas.  
Ĉu estis malmulte, je kio mi kredis?

Ja ĝi ekzistas, ekzistas.  
Ĉu multaj komencoj pluas antaŭ mi?  
Mi plenumos ilin, plenumos.  
Nur ĉar nerompita mi 'stas, rompita mi volus esti.  
Ĉar mia vivo ne gustas bone.  
Kaj ĉar neniu estas ol mi pli rompita.



## **LA SIMPLECO DE LA MOROJ LAO-CE**

Per leĝoj oni regas la landojn,  
Per artifiko faras militon.  
Per la ne-ago oni povas la landon konkeri.  
El kio mi scias, ke tiel estas?  
El tio, ke:  
Ju pli da baroj kaj prohiboj en la lando,  
des pli malriĉa estos la popolo.  
Ju pli da armoj estas en la popolo,  
des pli maltrankvila estos la lando.  
Ju pli eltrovema estas la popolo,  
des pli okazas la nekutimaĵoj.  
Ju pli la dekretoj kaj leĝoj,  
des pli estas da ŝtelistoj kaj rabistoj.

Do jene parolas la sanktulo:  
Mi faras nenion kaj la popolo  
mem regas sin mem.  
Mi amas la trankvilon kaj la popolo  
per si mem estas trankvila.  
Mi liberas de strebo tumulta kaj la popolo  
per si mem riĉiĝos.  
Mi estas sen deziroj kaj la popolo  
per si mem estos simpla.

Karlo Lovászy (1887-1951)

## **LA HOMO**

Ses tagojn dum konstanta far'  
Kreiĝis suno, lun', stelar'.  
La sepan tagon la Sinjor'  
Ekkaptis koton sen valor'.  
El tero homon formas li,  
Sur kot' ekbrilas vivradi'...  
Hom'! Vi estas mem la Di'!

Ekstaris tie nun la vir',  
Ekiris por triumfa ir'.  
En man' martel' kaj kun brudad',  
Jen: pont', fervoj', maŝinorad'.  
Flugilojn flirtajn kaptas nun  
Eĉ flugi povas li sen pun',  
Homo! Supren ĝis la sun'!

Jam preskaŭ stelojn tuŝas li,  
Sed saĝon, ve, forpuŝas li.  
Diablo iĝis lia frat',  
Armilon donis li por bat'.  
En man': armil', tra mond' lavang',  
La teron kovras putra sang'...  
Hom'! Mem kraĉu vin je vang'!

András Mezei (1930- )

## **EN ĈIUJ TEMPOJ**

Stultuloj ĵetis el la turo  
la birdon al la gruzo grunda,  
ke ĝi falegu kiel ŝtono —  
Malsupre ŝaŭmis ar' ĉashunda.

En ĉiuj tempoj tio belis,  
se murd' fiaske restis for.  
Flugiloj eĉ el ŝton' disfrapis  
por ŝveba sor, por ŝveba sor'.



## **PRI L' MONDO PAROLU**

Ja luktas ankoraŭ la knab' vivigata de venĝo,  
ne povante rifuĝi de pleje sovaĝaj aperoj.  
Do plenumiĝis ankaŭ al li la sorto de la Vidantoj,  
ties kaptito li restos jam ĝis eterna eterno.  
Kvankam sekigās kaj faltigās al li la koro,  
krustlipe soifo al li dezertas, li kriegadas,  
ŝrumpe la fajra cerb' ensuĉas al li l' okulojn,  
rariĝas lia hararo sur lia verto, sed tiu flamo,  
kiun en sia korpo li gardas, jam frondiĝi komencas,  
novajn branĉojn jam tiu flamo naskas, aŭdiĝas,  
kiel ĝi kun sproskraketado freŝa kriadas,  
ĉar lumen sinkas jam la kapo de senoazeco,  
kaj en tiu lumo la tristo mem disĉesas,  
kiel blindnokte la flugetanta fulgo super la  
cindro de longe jam fridiĝintaj krematorioj...  
Spirit', pri la mondo parolu, ĉu povas en ĝi trankviliĝi l' animo,  
ĉu forgesi necese jam, aŭ pli vivas viaj ekzekutistoj?  
Ĉu Hamlet hezitudu, ke nur la paseon voku teatro  
en ĉi danĝera epok', ĉu vi aŭdas do: ekstere krakas  
ĉi mondo de planĉoj... Kiel glavoj kun venenita pinto  
frapas al la ĉielo raketoj, vundojn skrapas sur ĝi profundajn,

dum jen vi staras, tenas en la man' la kranion  
de l' homaro, kaj ni diras kun vi la vortojn:

"Ĉu esti aŭ ne esti, — nun jam —. jen la demando!"



Zsigmond Móricz (1879-1942)

## **PASEROJ-ALMOZULOJ**

Fabelisto:

Falas pluvo, muĝas vento,  
la paseroj en taĉmento,  
sub la rando de tegmento  
kvikas, ĉar dum pluv' torentas,  
la malsat' ilin turmentas.  
Sed nun pluveg' batanta,  
jen pasero malsatanta  
metas sur sin tornistreton  
entreprenas almozpeton.  
Ĝi al kokinpanjo iras,  
petegante al ŝi diras:

Pasero:

Kvivit, kvivit, kvik  
donu iom el tritik'  
Kokpatrin', mi petas kore,  
min ne traktu malfavore.  
Jen mi, en mizero pleja,  
kiel muso la preĝeja.  
Kvivit, kvivi, kvit,  
min mortigas apetit'.

Kokpatrino:

Bone, vin, fratin' pasero,  
mi kompatas pro l' mizero.  
Se el riĉo mi ne donus,  
ja min Dio ne pardonus.

Pasero:

Kvivit, kvivit, kvik  
gustas bone spik'.

Fabelisto:

La paser' post almozpeto  
kun la plena tornistreto  
hejmeniras lametante,

ties plenon montras vante,  
la paseroj pro ĉi tio  
preskaŭ krevas de envio.

Pasero:  
Kvivit, kvivit, kvik,  
lertan helpas pik'.  
Al kokpanjo kun tornistro  
iru petu kun insisto.  
Grenon ĝi posedas riĉe,  
al vi donos kortuŝiĝe.  
Kvivit, kvivit, kvit,  
Pri mi, tamen, ĉit!

Fabelisto:  
La paseroj sin alarmas,  
sin per lambastonoj armas,  
tornistreton sur sin metas,  
kaj al kokpatrin' lametas,  
sin petege ĉirkaŭsvarmas.

Kokpatrino:  
Kion vi en mia korto  
volas, vi, ŝtelista hordo?

Paseroj:  
Per almozo nin favoru!

Kokpatrino:  
Jam ne pluvos, do, laboru!

Fabelisto:  
Sed tiuj ne volas cedi,  
ili volas grenon predi.

Paseroj:  
Kvivit, kvivit, kvit,  
mastro avara, ĉit!

Fabelisto:  
Lambaston' fariĝas klabo,

almozpet' fariĝas rabo.  
Sed kokpanjo bravas firme.

Kokpanjo:  
Mi la idojn gardas ŝirme.  
Pli da greno mi ne donos,  
miaj idoj ĝin bezonos.

Paseroj  
Kvivit, kvivit, kvivit, krak' ...

Fabelisto:  
Tiel ili post atak,  
Kuras for de l' beka hak'.

Anna Pardi (1945- )

### **AMO**

Unu hom' alia, tra kiu esprimiĝas mia neesprimebla vivo,  
kun kiu mi povas tuŝi la ĉielon en terproksimo 168-centi-  
metra,  
kun kiu mi povas kovri miajn agresivajn instinktojn kontraŭ  
la mondo,  
kun kiu post iu ajn stratangulo mi povas ekvidi la Pacifikan  
Oceanon,  
kiu organizas la disfalan tempon per tio, ke li min elserĉas.



### **AMROMPO**

Ĝi pasis tiel, kiel salutkartoj  
la kristnaskaj festoj,  
la etiko de la sentoj estas balono,  
ĉu Himalajo aŭ pinglo ĝin trapikas: egale  
ĝi kreas tuj, kaj sur tiu egale navigi  
nenien ni povas.

Sed la maro restas.



### **INTERRILATOJ**

La homo estas certa pri l' vivo  
certa pri l' morto  
kiam li estas plej certa pri l' vivo  
li ne pensas pri l' morto  
kiam li estas plej certa pri l' morto  
li pensas nur pri l' vivo.



## ***TAGLIBRO-FRAGMENTO***

Kuraĝa 'stas verki odojn  
se oni havas sole unu vorton  
uzeblan  
kuraĝe 'stas amori kun iu  
se la palpo havas sole  
geografiajn gradojn  
kaj ne havas profundon  
kuraĝe 'stas travivi en absurdaj situacioj  
ion cetere normalan.



## ***TEZO***

Inter la relativec-teorioj de la amo  
ĉiam restas unu patrino, kiu naskas.

Sándor Petőfi (1823-1849)

## **LA MONUMENTO DEFALINTA**

Sur alta monto staris monument'.  
La monto estis tiel alta, ke  
Zon' ĝia estis nuboj, kaj la sun'  
Sur ĝiaj ŝultroj je tagmez' ripozis.

Sur pint' de tiu monto bronzstatu':  
Gigantfiguro staris en majest'  
En unu mano kun batala glav',  
En man' alia kun standard' triumfa.

Sur monton kiel venis la statu'?  
Portita de sur ter'? Aŭ de l' ĉiel'  
Falinta? Tiel ĉi pli sankta, sed  
Pli digna estas, se homman' ĝin faris.

Labor' komuna de l' ĉiel' kaj ter'  
Ĝi estis. Helpis Di', klopodis hom'.  
Centjaroj multaj pasis en labor',  
Ĝis milion' da manoj ĝin pretigis.

Pretiĝis fine, staris la statu'.  
Eŭrop' rigardis ĝin! Kaj antaŭ ĝi  
Genuoj fleksis sin, trudite per  
Duon' da tim', duono la estimo...

...Jen staras mont', sed kun malĝoja pint'!  
Kron' ĝia kie estas: la statu'?  
Enviis eble la ĉiel' al ter'  
Pro la ornam'? Kaj ĝin alŝiris? ho ne!

Tertremo venis, ruinigis ĝin.  
En ĝia fund' ŝancelis ĝin tempest'.  
Kaj en la profundon falis ĝi el alt',  
Kaj sube en la val' ĝin marĉ' englutis.

Patruj! Vi sankta glora monument',  
Barakti devis vi en tiu marĉ'!

Dum tri centjaroj tie kuŝis vi  
Sub kotiĝintaj putre verdaj ondoj.  
La kapon, kiun iam, kiel tron'  
Ornamis, supre la najbar-stelar',  
Kun abomenaj korpoj kovras nun  
La naŭzegaj vermoj de la marĉo.

Patruj', patruj', ho kompatinda land',  
Mi kiel nomu senton, kiu nun  
El koro, kiel pluvinado sur  
Memoron de pasinto via falas.

Sed for, malĝojo! for funebro! for  
Ne estas jam en marĉ' la monument!  
Ni levis ĝin el ĝia marĉo-lit',  
Ni portis ĝin en la aeron puran.

Ho ĝiajn membrojn lavi venu do!  
Ke — kiel iam — ĉasta estu ĝi!  
Ho ĉiu venu, helpu lavi nun,  
Virin' per larmo kaj la vir' per sango.

Se brilas ĝi jam en malnova lum',  
Gefratoj, tiam ni ripozu nur!  
Sed eĉ ne tiam! Ja krom tio eĉ  
La pen' de nova devo nin atendas:

Levota devas esti la statu'  
Sur monton, kie iam brilis ĝi.  
De kie ĝi kun tia grand-majest'  
Rigardis al la mondo admiranta.

Antaŭen! Maljunul', junul' de l' land'  
Al inertuloj estu granda hont',  
Glor' granda estu al la laborant'!  
Elektu, fratoj, nun: ĉu hont' aŭ gloro?



## ***MIA PLEJ BELA POEMO***

Poemojn multajn mi jam verkis,  
Kaj ne ĉiu estas bagatela,  
Sed, kiu gloron por mi gajnos,  
Nur sekvos la poem' plej bela.

Ĝi sekvos, se patrujo mia  
Rezistos al Vien' per forto,  
Kaj en cent korojn mi per pinto  
De mia glavo skribos: morto!



Gábor Rudnai (1946- )

***PUTO DE MARIA EN NAZARETO\**; \*\***

Ho lirla eterne sankta puto mirakla  
verŝu molakve plena la kruĉan sinon apertan  
vunde, se tuŝas gut via, jam la doloro saniĝas  
lante la ringo de ond glatiĝante la koron atingas  
softas ve se memor disĉesas drono en akvo



***SOLECA CEDRO\**; \*\***

Kiel do flugu, kiun la paseo  
rekaptas per radik de kutimiĝoj?  
Ĝermante en pase, futuron serĉas,  
sed vane batas muron de l' silent,  
kroĉi al kred, kunulo sin ne povas.  
Vivanta krude, pendingo propra vi stas  
via solec tranĉila vin travundas  
vin spert kolektiĝinta en jarringojn  
humilkurbigas, lanta torturmorto,  
ĝis vin, de viaj propraj febroj cindran,  
lulas, dormigas kaj priploras  
la velkintmama terpatrin.

\* Vd la piednoton de la p. 112.

\*\* Eroj de poemciklo. La pentraĵoj de Tivadar Csontváry Kosztka (1858-1919) inspiris la poeton Rudnai je poemciklo.

Sándor Sík: (1889-1963)

## **KANTO AL ĈIU HOMO**

Ho fratoj, vi, restaĵo de l' hungaroj,  
Aliaj fratoj, milionoj foraj,  
Kiu peladas kun okul' miranta  
Kaj sen kompreno la teruran radon,  
Maŝinon egan de l' freneza Sorto,  
Kiu la grenojn draŝas por l' Infero  
Kaj nur la pajlon lasas por la ter',  
Herooj memmortigaj, vi senkulpaj  
Ekzekutistoj kaj vi, kompatindaj  
Falintoj, malsatuloj, ĉifonuloj,  
Patrinoj en la prirabita nesto,  
Infanoj naskiĝintaj por mizero,  
Ĉiuj kun mi, malgajaj, povraj homoj,  
Fratoj, ni ploru!

La tempo jam gravedas,  
Naskiĝi devas jam, naskiĝi volas,  
El la infer-utero de la jaro  
De l' abomenoj, la Liberiganto:  
La larm': komuna, sankta homa larm'.  
Ni ploru ĉiuj kune! Ja neniam  
Ni tiom sentis, ke ni estas unu!  
La brustojn ŝiras unu vort',  
Sur fruntoj brulas unu stamp',  
Kaj super Sejn', Danubo kaj Bosporo  
Unu silent' kaj honto kaj frenezo!

Fratoj, ni risku esti jam herooj,  
Ni jam kuraĝu diri al mi mem:  
Vundiĝi doloregas  
Kaj vundi doloregas:  
Ĉiu dolor' doloras ja al ĉiu!  
Fratoj, ni risku esti jam herooj,  
Ni hardu niajn brakojn por brakumo,  
Ni jam kuraĝu plori tiun larmon,  
La larmon de l' homec' kaj homa grando!

Ni jam priploru kun lamento  
Nin mem, la kompatindajn:  
Ni ĉiuj estas kulpaj, ĉiuj, ĉiuj,  
Refrakasintaj per freneza man'  
Babelon reĝan de homeco nia,  
La scion fiigintaj je murdisto

Kaj je buĉist',  
Kaj ni priploru nian sangan Kriston,  
De kies brusto la disĉiplon mildan  
Ni forŝiregis kaj el kies sino  
Ni trenis for la infanetojn mirajn,  
Kaj kiun ĉiuj ni ja malkonfesis  
Por la murdisto.

Kaj ni priploru Dion,  
El kies riĉa mano ni eltordis  
La kruĉon de l' manao de la beno,  
Kaj kiun ni devigis per la nigra  
Potenc' de nia libereco, esti  
La Di' terura de la Juĝo.

Ni ploru, fratoj,  
Kiuj la kronon de la Kreo tretis  
En koton: jen ja la espero sola  
Por ĉi falinta ter', nenio krome.  
Ĝi eble levos sin ĝis ĉieloj nigraj  
Kaj rosos nian koron infektitan:  
Ni ree povos esti foje homoj!

Gáborné Szabados (19 ? )

### **JAM TAGIĜAS**

Jam tagiĝas, verdas kampoj, ridas sunradi'  
Jen al sia nest' revenis jam la cikoni'.  
Ankaŭ super vi heliĝas, kara patroland',  
Estos kiel iam, fuĝas malamika band'.

Ho patrin' hungara, nun vi kanti povas jam,  
Ruĝe-blanke-verde brilas kampoj en ornam'.  
Jam soldat' hungara staras antaŭ dom' por gard',  
Ridas al li ruĝaj rozoj kaj knabin-rigard'.

Lőrinc Szabó (1900-1957)

## **NOKTO INTER MONTJOJ**

En la nigregan nokton mi elpaŝis.  
Nek lun', nek steloj. Timiĝinta solo  
sur min ŝrumpiĝis: momenteto, kaj  
kvazaŭ blindiĝis kaj sur mian haŭton  
striktiĝis la ekstera mondo. Poste,  
lante kaj sonĝmaniere renaskiĝis  
la univers' el la nenio vaka:  
la spaco eksonoris, la pejzaĝo  
rekonstruiĝis el la nevidebla  
korpo de voĉoj kiel mondo de  
spiritoj: nun la dismuĝanta eĥo  
de la torento levis la duopan  
muron de l' val', kaj la malaperintan  
kamparon, kiel vualleĝeran kaj  
sonoran, molbalancan marĉterenon  
alfluis la muziko de la griloj.  
Atentis mi kaj kun mi la pejzaĝo.  
Ekventis, branĉo krakis... Etaj bruoj  
de buŝ' al buŝo donis la eventojn:  
Kaproolet' ekiris de l' montsupro  
al fonto... nun ĝi haltis... el funelo  
de Konvolvul' ruliĝis Kokcinelo...  
el sub la tero dumil Lekantetoj  
elŝovis sian kapon... streĉis sin.  
Olda Fagejo... glitis Bubal-Roko  
pli infren kaj nun reĝustigas sian  
ĉifitan kapsubaĵon... jam denove  
kverelas ge-Lukanoj... — Mi nur staris  
inter ĉi voĉoj lirlaj, dum de ĉie  
tumultis, vibris voĉoj, novaj voĉoj  
ligante-malligante, milionoj  
da voĉoj teksis reton ĉirkaŭ mi,  
milionoj da bruetoj teksis min en  
teksaĵon vivan de l' pejzaĝ', milionoj  
da agrafetoj... Kaj pli kaj pli riĉe  
min ĉirkaŭpulsis la sonora tempo,  
sonoris mi en la pejzaĝo kaj

sonoris la pejzaĝ' en mi, ĉi tiu  
muzik' dismetis ĉiun mian fibron,  
dismetis min, forblovis, traflirtigis  
super arbaroj, kampoj, montoj, valoj,  
min investante inter ĉiujn fratajn  
substancojn de l' ĉielo, ter', aero,  
kaj mi, en tiu nigra sol' timiga,  
kiel la vekiĝint', per unu fojo  
trankvile kaj feliĉe disrigardis:  
ja mi ne estas kaj neniam estos,  
eĉ en la tombo mi ne estos sola.

Margit Szécsi (1928-1990)

### **LA EKFLORINTAJ MANOJ\***

Kiu min turnas en la brilanta Spaco?  
Kiu mian sangon per radioj plenplenigas?  
Kio kuntajlis mian eston kun la Tempo ĝin briliganta?  
Kio al ĉi vip kaj estro de mia sort galopa min ligas?

Mi, pita pomet boardanta inter la buŝoj del tero,  
fervora evitanto de ĉiu gorĝ avidmanĝa,  
volanta tiel aparteni al la Forpaso, ke el ĝi  
disradiu astroarbo multfronda-multbranĉa.

Kaj vi, komprenanta la grandiozon de ĉi danco deva,  
scianta, ke el via am al mi flamanta nul vaniĝas sen rikolto,  
ĉar mia mort estas venk super mort kaj sublimes kiel la patrino,  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Vizaĝ beata de ŝton kaj glacio min gvatas de eterne.  
Mi dormas: la kusen de miaj ostoj estas ostoj de sombra hordo,  
sed reviviĝos la prauloj, se moviĝos mia talio:  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Elsidiĝas la flagraj okuloj en kraniokavojn,  
kio stas larvo, tion haŭt benata surkreskas laŭ ordo,  
kuproringoj tintas, aplaŭdas la ekflorintaj manoj —  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Hurlas la panter arbustara, atakus kaj ne kuraĝas,  
ĝia blonda barbo tremas nerveze, la dentoj knakas por mordo,  
ĉirkaŭ nin altiras la monstrojn la karn belega —  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Maturiĝas ĉio, ankaŭ la ŝtorm en la ĉieloj;  
fulmotondras, kvazaŭ metal-gitaron oni batus krude,  
grandaj gutoj pluegaj kiel antikvaj arĝentmoneroj  
pagas por terproduktoj, la tero kuŝas nude.

Jen, el la kampoj subite elkreskas la urbo,  
sur tegment-prismoj de nubskrapuloj kuŝas la nub surventre,  
supre, supre la impetaj flugiloj de ventokokoj  
fridiĝas en kosma blov kaj klakas elokvente.

Mi, kiu rompe eskapis del mizer, por forrabi  
Eŭropon, mi, virina apaĉ del mondo,  
sur la plej altan tegmenton mi fiksos mian flagon —  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Dolĉon, amaron mia sang enkollektis, mi riĉas,  
kvankam apenaŭ stas al mi mon por vestado del korpo.  
Mi turniĝas kiel ventbirdo laŭ turvento de muzikoj novaj —  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Ne voradis mia esto, grason sur sin ne akaparis,  
mia vivrendevuo stas nura fidel, honesto, ten de vorto.  
Mia korpo, kiel la anim, ankoraŭ estas magra pro idealoj —  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

Niajn grandajn noktojn mi sonĝas plenaj de vivantoj,  
de puraj koroj, kaj ni giras kun ĉi eskorto  
sonĝe-fluge en la astra spaco de la fekundo —  
venu kun mi danci ĝis en morto!

Senindulgas la temp, en ĝia vent aŭstera  
rulataj gigantaj glornimboj paliĝas sen forto,  
sed la lum de mia vizaĝo sendefenda ne ĉesos —  
venu kun mi danci ĝis en la morto!

\* Vd la piednoton de la p. 112.



Árpád Tóth (1886-1928)

**APRILA CAPRICCIO**

Vojrando — nura leontodo,  
arbustoj — nura trila odo.

Ekflutas turdo — tuj el dek  
anguloj eĥas fringelbek'.

Aŭskultas ĝin belforma  
kastelo duondorma,

langvore levas turon blankan,  
kiel streĉatan brakon, kvankam

per freŝa or' ĝin ŝute  
la sun' jam kovris tute.

Tra l' park' naĝadas — rufa  
orfiŝo — grase-pufa

sinjoro kun la ŝveba ventro  
en flu' de freŝa aertorento.

Nun estas sportovesto lia  
sutan' de mildo idilia,

ĉar antaŭ ol negoc' malpura  
ekiros, en la cerb' obskura

de borsovetoj ne la mono  
burĝonas nun, sed ia bono,

kiel petaloj de helblua  
floreto de l' printempo frua,

kiuj, domaĝe falos for,  
se sub la ŝarĝo de l' sinjor'

ektremos kun blek-laŭto

la nova luksa aŭto.

Ho, voĵorando en april',  
vangfrape ŝerca ventflugil',

ho sprosoj, ŝtalrisortoj verdaj,  
orioloj flute trilkoncertaj,

fringlirlo de arbustoj,  
parfumoj dolĉaj gustoj,

forgesu bone nun, ke l' vivo  
estas sovaĝa aĉa drivo,

ke kiom da vizaĝoj,  
tiom da batalaĉoj

kaj ke skandal' per unu foj'  
eksploĉus, kia eĉ, oj, oj,

se signe, ke en primavero  
la trist', malriĉo kaj sufero

paciĝas, mi, kun ŝerca gaj'  
enpaŝus tiun parkon, kaj,

aprila atenculo,  
al tiu potenculo

sur verdon brilan puŝus mi  
mildpugne rulojn du aŭ tri.



## **FLAMO**

La alumet' ĵetita tere  
ekflagris fanfaronfiere.  
La flava flam' kun ĉapo pinta,  
sur piedfingrojn starinĝinta,  
sin streĉis gaje, nano stranga,  
kun sving' alsupra kaj alflanka,

la verdon mordis, volis febre  
belegan incendion, nepre,  
miraklon ruĝan, arbar-brulon,  
aeron ardan, ĉielpurpuron.  
Sed, en orgojlo, nur kvietis  
la arboj, ĉiu flor' ridetis,  
neniu pro l' danĝer' angoris,  
eĉ herbo seka ĝin ignoris.  
La febra nana flam' fridiĝis,  
jam laca, sur la ter' sidiĝis,  
ekflagris laste, kun kapklin',  
sur musktapiŝo mortis. Fin'.  
Krom mi, neniu vidis ĝin.



## **LA NOVA DIO\***

Nun nova dio venis al vi, homoj!

Ne tra incenso naĝa en obskuraj  
haloj albrilas liaj fajr-okuloj  
el ora kadro de ikonoj brunaj,  
li nek inter altarkandeloj blankas  
kun alabastra mut' indiferenta,  
statu' trivita de kredulaj kisoj,  
ne ĉielul' enue sorbadanta  
siropajn ondojn de tirataj, longaj  
litanioj.

Ho ne!

Jen dio nova!

Nun nova dio vokas al vi, homoj!

Ne la ĉiel' lin naskis, ne ĉiele  
li vivas, fore nekonat' mistera,  
kovranta vangojn per la firmamento,  
kiel per friska blua silktalaro,  
ne!

Sed li nek idolo tera estas,  
ne tiu Mammon, kiu grasorgojle  
sursidis nin, dum el la buŝ' serpentis  
miliono da antenoj parazitaj,

kaj tiuj sorbaj suĉaj brakoj vringis  
virginajn korpojn, rompis por la fajna  
medol' sonorajn kapojn rompis por la fajna  
medol' sonorajn kapojn de l' poetoj,  
kaj penetrante tra l' profundaj blindaj  
fabrikaj fumotuboj, ili glitis  
en mornon de la sklavlaboraj haloj  
por trinki ĉiun larmon kaj malbenon.

Kaj ĉio ĉi en la pigra Monstro iĝis  
or' kaj malsato nova, kvankam ŝtopis  
l' intestojn plenajn jam la peza oro,  
kaj sur la putra granda korp' aperis  
timigaj oraj kadavromakuloj.

Nun nova dio venis al vi, homoj!

La sango de la sanga ter' lin naskis:  
la multa, densa, amara sang' elflua  
koaguliĝis tra l' doloraj kampoj,  
kunglue ekkorpis, je figur' turiĝis,  
figur' grandega, nuda, sangkolora,  
kiu landpaŝe-vaste piedsvingas  
kaj kies voĉ' efiĝas por ekstremo  
la Teron, sonorante el la ruĝa  
Oriento al la pala Okcidento:  
"Jen venis mi!

La ruĝa dio venis"!

Li marŝas kaj de l' tondraj paŝoj tremas,  
la blonda Sejno bordojn transversante,  
Jerike eĥas la Westminster olda,  
sur verda vitro de la Oceano  
antaŭentremas ruĝe lia ombro  
mil mejlojn longa, kaj ĝi ĉirkaŭkaptas  
la blindan muron de la Blanka Domo.

Hosana al vi, nova di', hosana!

Ekkonu nin, la viaj estas ni!  
La kara viva suk' en vi movanta  
la koron, ĉi triumfa ruĝa pulso

ankaŭ el nia trista sang' riĉiĝis,  
kaj en la trenon de trombono via,  
mond-alarmanta, glitas ja modeste,  
sed tamen helpe, ankaŭ la tremanta  
voĉo de nia torturita gorĝo:  
orfa hungara riveret' de veoj,  
en ĉien-muĝan Moskvan riveregon,  
kiu la mondon lavos pura nun.

Hosana al vi, nova di', hosana!

Voĉ' via estu nova verb' de kreo,  
planedon nian kotan, kulpan, oldan,  
fuŝitan de malnovaj sinjor-dioj,  
vi, inter dioj nova kaj proleta,  
formu feliĉa per la man' martela  
nin prenu sur titanajn viajn polmojn,  
transknedu nin laŭ via propra bildo.

\* Verkita en 1919 dum la 133-taga Hungara Konsilantara Respubliko.

Mihály Váci (1924-1970)

## **LUNO KAJ STELO POLUSA**

La Luno ŝvelas.  
Sankta ĉiela meleagro.  
Plenŝtopita parad-kuseno ama.

Ho, Luno!  
Ŝvela mamu senkapa  
de sankta bovin' Hindia  
ĉe l' horizonto.

Ho, Luno!  
ventrodikaĵo kosma,  
kies adipotrema lumo  
sin ostentas en la nokto.

Navigas tra l' infinito  
noktpoto porcelana,  
ĉion prilumas  
la granda fortostreĉo.

Ĝin svene adoras turistoj  
de ŝipoj ekskursaj,  
ne scias, ke l' kapitano  
gvatas la Stelon Polusan.



## **SEN TIIOLO**

Ĉar ni estas solope ĉar ni estas multope,  
ĉar ni volas esti solope, ĉar ni timas solope,  
ĉar estas multa laboro, ĉar estas nul serioza laboro,  
ĉar estas multaj taskoj, ĉar ni ne scias, kio la tasko,  
ĉar ni laboregas, ĉar ni nenion faras,  
ĉar estas tiom da farendo, ĉar nenio estas la faro,  
ĉar tiel multa estas nia tempo, ĉar tiel poka estas nia tempo,  
ĉar jam sufiĉas al ni la vivo, ĉar ni timas la morton,

ĉar ni satmanĝegis, ĉar granda estas la malsato,  
ĉar ni serĉas iun, ĉar ni perdis iun,  
ĉar tiel multe ni scias, ĉar nenion ni scias,  
ĉar necesus ion konfesi, ĉar necesas ion sekreti,  
ĉar necesus ion demandi, ĉar necesus ion respondi,  
ĉar ni kredas ankoraŭ ies ekziston, ĉar ni ne kredas ies eblon de  
ekzisto,

ĉar nenie troviĝas, kion ni serĉas, ĉar ni serĉas ja nenion,  
ĉar ĉiuj kune ni ne scias, kio estas, kion ĉiuj ni bezonus,  
ĉar eĉ tion ni ne scias, ĉu vere ni bezonas ion ajn,  
ĉar ni strebas, batalas, sopiras pri nenio.  
Ĉu la homaro bezonas ion vere?

Ĝi nun konstruas ja la stadionojn de sia futuro,  
kaj la grandaj magazenoj de ĝiaj stomakoj estas plenplenaj, por  
jarcentoj,

kaj ĉar tio ĉi mankas kaj ĉar tio ĉi ekzistas,  
kaj ĉar oni satas kaj ĉar oni malsatas,  
kaj ĉar oni sin savas reciproke kaj sin ekstermas reciproke,  
kaj ĉar estas sensanga mondmilito, kaj ĉar estas sanga mondpaco,  
kaj ĉar riĉa la homaro, kaj ĉar mizera la homaro,  
kaj ĉar ĝi vivas en ordo, kaj ĉar ĝi vivas en murda ĥaoso,  
kaj ĉar egale, kial, kiam kaj kie, kaj kio estas, kaj kio estos,  
solope tiom multaj, en tiu nemezurebla amaso,  
ĉiam solope, ĉiam kune, ĉiam unu kun la alia.  
ĉiu kun ĉiu, kontraŭ ĉiu,  
kune, unu kun la alia, unu kontraŭ la alia.

Béla Vihar (1908-1978)

## **BUDAPEST: EŬROPO**

Nek bulvarojn viajn nek la densan reton de viaj mil stratoj  
nek la montorulajn ondojn de viaj pejzaĝoj  
nek armeon de viaj puls-ritmaj fabrikoj, uzinoj  
mi laŭdas nun en vi, Budapeŝt,  
sed salutu ĉi tiu poemo  
la nobla profilajn vicojn, al via tuto apartenantajn,  
de radiafruntaj viroj kaj virinoj, brulokulaj  
gejunuloj kaj heredoportaj olduloj,  
kiuj, soifante la bonon, triumfigos  
la belajn koncipitajn en animprofundoj,  
la novajn, aŭdacajn kaj ofte vipatajn kreaĵojn  
en la arĝenta pieco de koncertsalonoj, teatroj, galerioj.  
Ilin, viajn infanojn, mi alvokas, dum tra la ondosfero  
de informaĵoj ili signas unu al la alia  
la sparkantaj mesaĝoj de libroj, filmoj,  
bruligaj pensoj arkantaj en la futuron:  
pri rondodanco, el sub cedro de tagiĝo-tekstitaj mitoj,  
la profundan suspiron de la materio en noktosilento,  
vekrion el gorĝo ljoba, vorticajn viziojn  
de la lando disipa, famon pri enbarasa morto de ostaĝo,  
mediteraneajn lumojn de amoj reaperigitaj sur celuloida  
rubando.

La armeon de ĉi neorganizita kaj tamen unueca,  
kvankam eta, sed ĉiam kreskanta, konscia federacio  
mi salutas, per kiu fidele kaj senŝancele  
vi apartenas al Eŭropo. Vi, ornama per kultura rivero,  
per juvelo de pontoj, mia Urbo praa kaj juna,  
kiu distingas per ĉi kolektivo la veran  
disde l' falsa kaj atente pri l' neĝpuraj flamoj de l' Spirito,  
ŝilde kontraŭ la ferocaj ventoj levas  
vian ŝirmantan kaj varman polmon,  
por ke neniam estingiĝu ĉi flagrado,  
orfloro lumanta de via rango.



Mihály Vörösmarty (1800-1855)

**CSONGOR KAJ TÜNDE**  
(Sceno el la teatraĵo)

*La sceno de la feoj.*

FEOJ (*kantas aere*)

Ni ludas leĝere  
dum pasas la horo,  
ni loĝas aere  
sub stela dekoru.

Vespere, se venas ridete la astroj,  
ekbrilas de ili ĉiele la vastoj.

Post astro la bela  
ni ĉiuj apude,  
tra l' pordo ĉiela  
eniras ni lude.

Ho, kiu el la tero alvokas, alvokas?  
Ĉielo ja brilas, la tero allogas.

*( La feoj unu post la alia  
descendas sur la teron).*

UNUA:

Hop! Descendis mi, jen mi.  
Ej! Ĉi herbo estas tikla!

DUA:

Hop! Descendis mi, jen mi.  
Flirtu, flirtu, vento vigla!

TRIA:

Hop! Descendis mi, jen mi.  
Aspergiĝu, roso kribra.

FEOREĜO:

La frapado de virgina koro

estas al mi la lulilo mola.  
Kiu de mi do el la trezoro  
de l' feliĉo estas pruntivola?  
Frapoj de virgina kor' min lulas,  
dormas mi, kaj loge ŝi okulas.

KVINA:  
La parfum' ol flor' pli ĉarmas,  
ĉi parfumo estas mi.

SESA:  
Mi descendis, jen mi estas,  
Ah, sopiro estas mi.

UNUA:  
Ve al mi, langvoras mi,  
vange pinĉas min formiko.

DUA:  
Kulo morda, muŝ' timiga!  
Ve, ĉi lando malamika!

*(SKROFLA venas)*

SEPA:  
Ĉe knabina lipo fraga,  
kiso estas mon' depaga,  
ĉi dogano estas mi.

OKA:  
Min atendu, min atendu,  
brula koro estas mi.

NAŬA:  
Jen mi sinjorid' Plezuro.  
Kion fari tie ĉi?

PLURAJ:  
Ludi, ludi.

ALIAJ:  
Kian ĉarmon?

KELKAJ:  
Rozarbeton, abelsvarmon.  
UNUA:  
La reĝino estos mi.

DUA:  
Eta svarmo estos mi.

PLURAJ:  
Jes ja, ankaŭ ni nin ŝanĝos  
abelsvarmo; reve, zume  
ni debranĉos kaj albranĉos.

TRIA:  
Kaj mi mem, rozuj' floranta ...

FEOREĜO:  
Haltu, haltu, branĉo jena  
estas ja ĉiel-devena,  
el ĉiela trunk' ĝi kreskis  
flori tere, branĉo bena.  
Sub ĝi inter lud' plezura  
ni distriĝu, karesate  
de l' parfumo dolĉa, pura.

FEOREĜO:  
Ha, jen venas! Kia hido!

KVARA:  
Turmentego eĉ la vido!

NAŬA:  
Kap' senkapa, aĵ' absurda,  
ĉio ŝia estas turpa,  
ŝi mem estas belo kurba.

DUA:  
Branĉo, dotu min per flor'.

TRIA:  
Papilio, iru for!

DUA:  
Ah ne! Svarmo estas mi  
kaj soifas ĝis eksces'.

TRIA:  
Kion trinki?

DUA:  
Roson, jes.

TRIA:  
Kio por ĝi la promes'?

DUA:  
Kisoj, kisoj, kvin aŭ ses.

TRIA:  
Ne, ne for!

DUA:  
Ve, morto, ĉes'!

TRIA:  
Jen parfumo laŭ neces'.

DUA:  
Ah, mi sorbis kaj ebrias,  
jam eĉ flugi mi ne scias,  
falas, falis tien ĉi,  
estas foliaj' sub mi,  
lula, mola, ho, kompano  
ĉiu venu! Dolĉa bano!  
Venu do, mielon preni!  
Rozparfumo, roza roso, roza lit',  
kie kara, dolĉa, mola eksvizit'!

*(La trian la ceteraj kisas  
unu post la alia).*

TRIA (plore):  
Lasu min, ve, ve, al mi!  
En la plandoj dornopiko!

UNUA:  
Manpieda, piedmana!  
For de l' monstro hid-rikana!

FEOREĜO:  
Reen, reen tuj! Danĝero!  
Estas ne por ni la tero.  
Ĝi, logata per la pompo,  
estas krudo, morno, trompo.

*(Ili forflugas).*



## **HAR', BUŜ', OKUL'...**

Har', har', har',  
Bela silka har',  
Ĉi knabina har'.  
En la mar' de bukloj nigraj  
Sin banadas ŝultroj cignaj.  
Har', har', har',  
Bela silka har',  
Ĉi knabina har'!

Bus', buŝ, buŝ',  
Bela, roza buŝ',  
Ĉi knabina buŝ'.  
Najtingalo en ĝi trilas,  
Sorĉaj perloj en ĝi brilas.  
Bus', buŝ, buŝ',  
Bela, roza buŝ',  
Ĉi knabina buŝ'!

Brul', brul', brul',  
Ho ravanta brul'  
De l' knabinokul'.  
La ĉielo en ĝi nestas,  
Di' en ĝi la amo estas.  
Brul', brul', brul',  
Ho ravanta brul'  
De l' knabinokul'!



### **SE LA ANIMON...**

(Vinkanto)

Se la animon, vir' vi riskis je l' virin',  
Kaj kun senkora ŝir' ŝi vundas kore vin,  
Kaj brilas false la rigard' per rid' aŭ larmorul',  
Kaj trafas vin sopira ard' aŭ animvunda brul':

Pripensu, jen la vin'  
Eĉ la mondo ne daŭras fin'  
Ĝi krevos kiel la ŝaŭmer'  
Kaj restos vako kaj aer'  
Kaj restos vako kaj aer':

Se la malĝoj' kaj vin' federas en la cerb'  
Heliĝos baldaŭ ja la kruda vivdezert',  
Aŭdace grandan pensu do pririsku vivon mem,  
Sub sort' nenia falas ja la vir' kun decidem'!

Pripensu jen la vin',  
Eĉ mondo ne daŭras fin',  
Sed ĝi dum daŭro kaj dum flu'  
Detruas, kreas ĉiam plu:  
La vin', la vin', la vin'.

## **EL LA JAPANA LITERATURO**

(Anonime)

### **LA KUKULO KAJ LA TRI ŜTATVIROJ**

#### ***Nobunaga:***

Ne kant-inklina?  
Ni murdu ĝin — puniĝu  
kukol' obstina!

#### ***Hidejoŝi:***

Ne kant-inklina?  
Ni ĝin devigu — kantu  
kukol' obstina!

#### ***Iejaŝu:***

Ne kant-inklina?  
Atendu, ĝis ekkantos  
kukol' obstina!

## **LATINE VERKITA POEMO**

Janus Pannonius/Johano Csezmiciei (1434-1472)

### **LI EKSKUZAS SIN, ĈAR LI NE MIKSIĜAS EN BATALOJN**

Ĉefbravuloj militantaj, min, kiu marŝas reĝarmee,  
ne riproĉu, mi vin petas, false pri poltrona timem',  
ĉar se mi neniam sturmis al malamika trup' armite,  
nek al muro fortikaĵa mi surgrimpis dum la sieĝ',  
sed vivriskon de l' aliaj mi, spektanto inerta, miris,  
tion diktis ne la timo, kredu, sed la zorg' pri vi mem.  
Gloron daŭran vi aspiris por vi certe, ho kuraĝuloj,  
do facile sekvas vundoj kaj la famodonanta fal'.  
Sed se tia sorto rabas for la poeton batalantan,  
kiu pri la glor' de via morto heroa kantos do?





## **EL RUSA POEZIO**

Aleksandr Sergejeviĉ Puŝkin (1799-1837)

### **AL GREKINO\***

Grekin', ne ploru — via amat' heroe falis,  
Kiam lin kuglo trafis ĉe la koro.  
Ne ploru — li mem devo kaj leĝo por li faris  
Iri al sangan vojon de l' honoro.  
Kiam momento peza de l' adiaŭo venis,  
Li al vi manetendis, kaj sian filon benis,  
Ke de l' heroaj patroj heredu li la bravon.  
Ĉerktolo lia estis la flago de l' libero.  
Mirtbranĉoj kaŝis lian Aristogeiton-glavon,  
Tiel li sturmis porti al la patrujo savon,  
Elsangis li por glora afero.



### **AL LA DEKABRISTOJ EN SIBERIO\***

En Siberia min' obskura  
Toleru kun fiero, fratoj.  
Ne vanas viaj suferadoj:  
Triumfos la afero pura.

Fratino milda de l' missorto:  
L' Esper' firmigu la animojn,  
Ĝi pelos for la dubojn, timojn  
Kaj ŝanĝos je kuraĝ' kaj forto.

Amika amo kaj konstanto  
Penetras tra la kradoj ĉelaj,  
Ni ne forgesos vin, fidelaj,  
Kaj por vi kantas mia kanto.

Atendas multaj vian savon.  
Se l' ĉenoj falos liberiĝe,  
Amikoj al vi plej feliĉe  
Alportos la malnovan glavon.



## **ARION\***

Ŝipgento bunta al la barko  
Suriris, velon suprentrenis,  
Jam kelkaj buboj kapte prenis  
Remilojn. Ekklininte en arko  
La saĝan kapon, staris mute  
Ĉe l' direktilo la ŝipestro,  
Mi, juna, aŭdaca, kun bardgesto  
Kantis ... Ekhurlis la tempesto.  
Ve, ke mi vidis tiun krute  
Falantan, murdan ondorulon!



## **MIA MONUMENTO\***

Exegi monumentum.

Jam mia monumento — ne homa skulpto — staras,  
Ne kreskos herb' sovaĝa sur voj' al ĝia rando.  
La pinton ĉiel-boran laŭ alto ne rivalas  
Kolon' de caro Aleksandro.

Ne, mi ne mortos tuta. En miaj kant-mesaĝoj  
Efikos mi spirite, se l' korpo dispolviĝos,  
Kaj brilos mia famo, ĝis sur la terpejaĝoj  
Poet' al kanto sin dediĉos.

La foraj regionoj de l' vasta rusa lando,  
La tuta multelingva patrujo pri mi scias,  
Fiera slavo, finno, tunguzo, steploĝanto-  
Kalmuko ame min mencias.

En koro de l' popolo mi vivos sur la tero,  
Ĉar, kio en ĝi nobla, mi tion vekis kante,  
Ĉar mi en mornaj tagoj parolis pri l' libero,  
Falintojn ŝirmis kompatante.

Do, Muzo, nur la voĉon de via di' atentu,  
Nenion aŭdu krome, nek laŭdan, nek insultan,

Al mokoĵ surdu, laŭron, aplaŭdon ne pretendu,  
Ignoru riproĉanton stultan.



### **SOVAĜA PLEZURO\***

Ne kara al mi la plezur' senbrida,  
Sovaĝdiboĉa kaj voluptavida.  
Junbakhantinan ardan gluiĝemon,  
Ebri-frenezon kaj stertoran ĝemon  
Mi ne deziras. Vundas tia amo,  
Kaj flagras for tre baldaŭ ĝia flamo.

Centoble pli valoras vi, malvarma  
Trezoro! Kia ĝoj' turmente-ĉarma,  
Se deziregon mian, kiu pledas  
Petege, vi komprenas, kaj vi cedas  
Al la sieĝo de l' plezuro lante,  
Honteme, ĝin apenaŭ respondante:  
Statuo ĉaste-friska de pudoro.  
Ĝis fine enflamiĝas via koro,  
Kaj nun al mia flagra flamo febre  
Transfrapas via flam', neestingeble.



### **VINTRA VESPERO\***

Surĉiele nigras nuboj,  
Neĝon tordas ŝtorma vent',  
Voĉo hurlas — eble lupoj?  
Veas — ĉu infan-lament'?  
Pajlsegmenton pugno skrapas,  
Tondras sur kaduka mur',  
Aŭ fenestron kvazaŭ frapas  
Mano de landvoj-vagul'.

La mallum' melankolion  
Portas kun amara ted'.

Ej, ne tristu, diru ion,  
Kara anjo, avinjet'.  
Ĉu pro l' vento surde sibla  
Vin subpremis korpa lac',  
Aŭ ŝpinrada zumo vibra  
Lulis vin al dorma pac'?

Pura koro, vartistino,  
Amikino dum knabaĝ',  
Triston for! Ni trinku! En vino  
Venas gaja vivkuraĝ'.  
Kantu pri la birdo blua  
Kun la mar-eltrinka glut',  
Pri l' knabino, kiu en frua  
Horo iris al la put'.

Surĉiele nigras nuboj,  
Neĝon tordas ŝtorma vent',  
Voĉo hurlas — eble lupoj?  
Veas — ĉu infan-lament'?  
Pura koro, vartistino,  
Amikino dum knabaĝ',  
Triston for! Ni trinku! En vino  
Venas gaja vivkuraĝ'.

\* Ĉi tiujn poemojn de Puŝkin aperigis Kalocsay sub elpensita rusa nomo *K. Stelov*, nas-kita en la tria periodo de Literatura Mondo (1947-1949). Ĝia tasko estis "internaciigi" la revuon, ĉar en tiu tempo mankis kunlaborantoj el Sovetio. Por la magistratoj de la tiutempa reĝimo, nomo de rusa aŭtoro estis kvazaŭ garantio pri la lojaleco de la Esperanto-movado al la popola demokratio.

Memkompreneble, ke la "trompon" tenis Kalocsay en plej severe sekreto. Pro la tiamaj cirkonstancoj li estis tre singarda. *K. Stelov* esperantigis ekskluzive poemojn, novelojn de rusaj aŭtoroj, observis kaj konigis artajn, literaturajn eventojn okazintajn en la So-vetio.

*K. Stelov* perfekte plenumis sian taskon, kaj pli ol duonjarcento konservis la inkognite-con. (En: A. Csizsár: SENVUALE. Pri la pseŭdonimoj de K. kalocsay. Budapest: KAL-ĈI Dokumentaro, 1999).

## **EL VJETNAMIO**

Nguyen Thi Ly ( ? )

### **KANTO PRI AN KHANH**

Junuloj de An Khanh!  
Vin mi nun kantas, vin! Sur via tero  
sen brid' rapide kuras la rivero,  
bang-lang-petaloj tie pleje lilas,  
kuraĝo tie pli ol luno brilas,  
ekfloras kiel la bang-langa floro.

An Khanh, ho, mia hejmo,  
ĝis venko nin atendas, granda vojo,  
la lila floro pulvogrize feblas,  
milito laŭtas, kant' apenaŭ eblas,  
rivero ploras, arbobranĉ' funebras,  
knab' kaj knabino vivas disigitaj.

Je l' tag' unua la Detru' frakasis,  
tra niaj kampoj ĝi sur tankoj pasis,  
aviadile frondojn ŝire trafis,  
maŝinpafilo en la domojn pafis.

Inter laŭta bruo de la kugloj  
junuloj de An Khahn  
en fosojn akrajn stangojn lokas,  
ke la banditojn vundu ties piko,  
por ke pereu tie la malamiko,  
patrinon ili, teron, domon ŝirmas,  
alarmo vokas,  
la partizanoj falas, sang' fluegas,  
hordego de malboneguloj blekas,  
kaj volas murdi, murdi per la armoj.  
Sed la Thanh-fratoj ilin spitas,  
junulherooj, ili ja ne cedas,  
sed batalsvarmoj jam militas.  
Triumf' atendas je l' ses batalsvarmoj.

Huy kaj Hué, junuloj de An Khanh,  
kurigis tie tutan divizion.  
La kamp' funebras partizanojn.  
Ja ne timigis ilin aviadilaro,  
nek kampo fariĝinta fumomaro,  
kion la patruj' deziris, ili faris brile...  
Ho knaboj, kie la malnovaj tempoj,  
kiam la bang-lang-flor' ankoraŭ pompis lile.

## **HUNGARAJ KANTOJ**

Aŭrorstelo hele brilas ĉiele,  
mia dolĉa kortrezor' hejmeniras fiere,  
lakaj botoj al li sur la piedoj paradas,  
kaj l' aŭrora stel' sur ili briladas.



Brilu sur la ĉiel', brilu, stelo-miloj,  
vojon al ĉi junul' montru per la briloj.  
Estu gvido de voj' por ĉi juna homo,  
al la amatino, amatina domo.



Fajron oni metas,  
kaj cindrigi lasas.  
Ne ekzistas amo,  
kiu ne forpasas.

Amo, vi, turmento,  
plago de l' destino,  
kial vi ne kreskas  
sur ĉiu branĉofino!?

Metu, kara, fajron,  
blovekscitu flamojn,  
por ke mi varmigi  
povu miajn manojn.



(Fraŭlmokado de Béla Bartók)  
Hej knabinet' floras, oron ŝi valoras,  
ej haj, ej haj, oron ŝi valoras,  
ej haj, ej haj, oron ŝi valoras,  
floras, floras, floras.

Fraŭlo kostas aĉan grenpistaĵon draŝan,

eĉ ne tritik-draŝan, aĉan,

kelkan kvanton eĉ ne tritik-draŝan,  
sed nur aven-draŝan; ruban grenon aĉan.

Sed knabinoj floras, oron ja valoras,  
ej haj, haj, haj, oron ŝi valoras,  
ej haj, haj, haj, oron ŝi valoras.  
Jes, ĉar ili oron ja valoras,  
oron ja valoras, oron ja valoras, ĉar  
la karaj, karaj, karaj, karaj, karaj,  
knabinetoj ... Jes, ĉar ili floras.



(Kuruca soldatkanto)

Haj kurucamik', kara kamarad'!  
Decas al bravul' gaja sintenad'!  
Estu drinko, estu danco, festa festenad'  
Ĝi ne groŝojn, sed talerojn kostos, kamarad'.

Kara ne estas nia sango-flu'  
Du tri groŝoj nur nia taga lu'.  
For la monon, poste fluu nia sango plu  
Por patrujo unu, inter malamikoj du.



Hej, haj, roz', dient',  
rosmareno kaj lekant',  
majoran', jasmeno!  
Plu ne premus min la trist',  
se mi estus ĝardenist'  
en via ĝardeno.



Iras mi, foriras, longavoje, tre for,  
paltan mi surmetos el la polvo de voj'.  
Miaj densaj larmoj sur ĝi la pasament',  
la butonoj sur ĝi mia ĝem' kaj lament'.



Blovu, vent', forblovu dikan polvon de voj',  
dikan polvon de voj' kune kun la malĝoj'.



Ja mi ne kutimas loĝi kaĝon birdan,  
sed ja mi kutimas flugi branĉon verdan,  
flugi branĉon verdan, manĝi pino-sproson,  
manĝi pino-sproson, trinki perlo-rosan.



Kiel funebradas nigra korv' senfino,  
Mi mem funebradas pro la amatino.  
Ho por amatin' mi farus eĉ miraklon,  
Per kuler' elĉerpus tutan maran akvon,  
Sur la amatin' mi perlbukedon plektus.

Ho, inkuj' se estus de la mar' la fundo,  
Ho, se inko estus ĉiu mara ondo,  
Kaj plumingo estus ĉiu herbo, floro:  
Ne sufiĉus al mi skribi pri l' doloro.



Koko krias jam,  
Ekmatenos jam.  
Vi, se Dio volas, al mi apartenos jam.  
Nin ĉenos am',  
Nin katenos am'.  
En la verdo, sub la bluo bird' promenas jam.

Jen, ĝi venos jam,  
Jen, ĝi venos jam.  
Verdpieda, blufugila bird' en plumornam'.  
Min atendu jam,  
Nur min amu jam,  
Mi, se Dio volas, al vi apartenos jam.  
Nin ĉenos am',  
Nin katenos am'.



Mi adiaŭdiras laste vin, amata,  
por naŭ jaroj ligus min la serv' soldata,  
sed prefere stepa vagabond' mi estos,  
ol ke mi servistu al l' imperiestro.



Mian koron iu ŝtelis for,  
kaj mi scias, kiu ŝtelis for.  
Vi min ravas, vi min havas,  
mi en viaj ĉenoj sklavas,  
kara, vi!

Plej aminda, ĉarma ŝtelistin',  
priŝtelinte ne forlasu min!  
Vi min ravas, vi min havas,  
mi en viaj ĉenoj sklavas,  
dolĉa, vi!



Mi ĉevalon ligis al pomarb' ruĝpoma,  
mi min mem alligis al viol' burĝona.  
Ĉe la lunleviĝo ĝin mi liberigos,  
sed min de vi, kara, nur la mort' malligos.



Sur la kampo rosoj brilis sur la flor'  
sur la flor'  
Post mi ploras mia kara kortrezor'  
kortrezor'.  
Ruĝe krevas la floreto el burĝon',  
Sed pli ĉarme ruĝas ŝi dum kisodon'.  
Dolĉa, kara,  
Senkompara,  
Blondharara!



(Vespera kanto)

Ĉe arbaro vespervene,  
jakon uzis mi kusene.  
La du manojn mi kunmetis,  
tiel mian Dion petis:

Donu, Dio, loĝon por mi,  
ke mi povu hejme dormi.  
Tedas longe voj' irenda,  
migra vag' sur tero fremda.  
Donu, Dio sonĝon belan,  
sendu ŝirmon gardanĝelan,  
dolĉan dormon fortodonan,  
donu, Dio, nokton bonan.



Vidu amata, vidu amata, la montegon tie ĉi.  
Dum vi ĝin vidos, dum vi ĝin vidos, ja ne estos via mi.  
Tiun montegon mi forportos eĉ en la poŝtuk-angulo,  
Tamen mi estos, tamen mi estos, via kor-amatulo!

Vidu amata, vidu amata, la fajregon tie ĉi.  
Dum vi ĝin vidos, dum vi ĝin vidos, ja ne estos via mi.  
Tiun fajregon mi estingos eĉ per la larm' de okulo,  
Tamen mi estos, tamen mi estos, via kor-amatulo!



Vidu, mia patrin', kara mia patrin', vi min naskis domaĝe.  
Aŭ min en riveron, tuj min en riveron ĵeti estus pli saĝe.  
Rivera flu' en Danubon frostan portus min,  
Estus mi nenies, estus mi nenies neamata amatin'.

De l' rozujo la roz', de l' rozujo la roz' falis, kuŝas surtere.  
Haj, min mia amat', haj, min mia amat' lasis for malfidele.  
Mi ne ploras, ĉar perfide li min lasis for,  
Sed eĉ en la tombo, sed eĉ sub la tero lin memoras mia kor'.



***Katrinjo Kádár***  
(Popola balado)

Ho patrino, kara panjo,  
Gyula-edza kara panjo,  
edzinigos mi Katrinjon,  
servutulan belan filnjon.

Sed mi tion ne permesas,  
fil' Marteno!  
Edzinigu grandsinjoran  
belan filnjon.

Mi ne volas grandsinjoran  
belan filnjon,  
volas nur Katrinjon Kádár,  
servutulan belan filnjon.

Nu, vin do forportu, kara  
fil' Marteno,  
plu ne filo, senherede  
iru kun malbeno.

"Oj, koĉero mia, oj, koĉer' pli kara  
jungu jam ĉevalojn al timono ĉara".

Kiam li ekiris vojon tre lontan,  
Al Marten' Katrinjo donis tukon manan.  
Kiam ĉi man-tuko ŝanĝos sin kolore,  
sciu, mia vivo ŝanĝis sin samhore.

Iras do Marteno, vale-monte iras,  
jen, ekvidas ŝanĝon sur la tuk' kaj diras:  
"Oj koĉero mia, oj koĉer' pli kara,  
ni turniĝu, ĉar la tuko ĵus ruĝiĝis,  
do Katrinjo Kádár morte malfeliĉis."

Ĉe la vilaĝfino porkpaŝtisto staris:  
"Aŭdu, ho bonulo, kio ĉe vi nova?"  
Nu, ni statas bone, sed vi statas male,  
al Katrinjo via iĝis tre fatale,

ĉar patrino via ŝin ja forportigis,  
en senfunda lago ŝin ja dron-mortigis.

"Ho bonvolu, montru, kie tiu lago,  
Miaj or', ĉevaloj, ĉar' estu la pago."

Ili tiam iris sur la lagan bordon.  
"Ĉu Katrinjo, tie vi 'stas? Diru vorton!"

Al li ŝi respondon el la lago donis,  
kaj li al ŝi saltis, kaj li kun ŝi dronis.

La patrino sendis du subakviĝistojn,  
tiuj ilin trovis en brakumo morta.

Antaŭ la altaro oni unu korpon  
kaj post ĝin sepultis la alian korpon.  
Kapelfloroj kreskis el la polv' de l' paro,  
Ili kunplektiĝis super la altaro.

La patrin' aliris, ĉiujn du deŝiris,  
unu kapelfloro tiam al ŝi diris:

"Damnon al vi, damnon al vi,  
ho patrino Gyula-edza,  
Vi dum viv' intrigis,  
eĉ nun min mortigis."



## **LISTO DE FONTOJ**

### **ORIGINALAJ POEMOJ**

- Admono ..... NB 1963:2, Suplemento.  
Al s-ro J. D. Applebaum ..... TBE 1967, p. 103.  
Al la Eŭkaristia Kongreso ..... Katolika Stelo 1938: 6-7,  
p.1.  
Al la legantoj ..... LM 1922/3.  
Al Marjorie Boulton ..... NLR 1958:6, p. 203-209.  
Al neŭtraluloj ..... IK 1947:13-14, p. 15.  
Balado pri la atombombo ..... LM 1947/9.  
Centjara estus jam la koro ..... LE 1959:11-12, p. 98.  
Ĉu vi sentis? ..... LM 1925/93.  
Demando stranga (1944) ..... LM 1949/41.  
Disciplino ..... LM 1947/117.  
Engels ..... IK 1947:6-7, p. 15.  
Giesswein ..... HE 1924:1, p. 3.  
Inter ruinoj (1944) ..... LM 1949/41.  
Jes ja ..... IK 1947:13-14, p. 19.  
Kalendaro ..... NLR 1956:6, p. 203-209; 7,  
p. 1-7.  
Kara Ludoviko ..... BI 1976:10, p. 4.  
Kongresa saluto - Bern 1947. ... LM 1947/98-99.  
La balado de Franco ..... IK 1948:1-2, p. 13.  
La balado de Greklando ..... IK 1948:1-2, p. 13.  
La interna ideo ..... KVARA RAPSODIO.  
Stockholm 1946, p. 35.  
La kapitan' el Berno ..... Esperanto 1933/147.  
La providenco ..... KC p. 98.  
Larmoj ..... HE 1921:11, p. 1.  
La subtasoj ..... LM 1947/117.  
La venkontoj (Al J. S. Dinwoodie) ..... LM 1949/71.  
Lenin ..... IK 1947:6-7, p. 15.

- Marx..... IK 1947:6-7, p. 15.  
 Neŭtraleco ..... LM 1947/117.  
 Oktobra Odo al la tridekjara Sovjetunio IK 1947:16, p. 7.  
 Prologo antaŭ la teatra vespero HE 1921:9-10, p. 18.  
 Retrovo ..... Informilo (HESL) 1945:2,  
 p. 5.  
 Saluto ..... HE 1969:6, p. 5.  
 Soldatoj marŝas ..... LM 1948/165.  
 Stalin..... IK 1947:6-7, p. 15.  
 Stelo super la Wawel ..... LM 1931/129.  
 Ŝi dormas..... LM 1925/157.  
 Vilaĝirado..... LM 1848/112-113.  
 Waringhien..... Esperantologio, vol. 2.  
 1961: julio, p. 73-74.

### **TRADUKOJ**

- Admono por la respekto de maljunuloj HV 1966:1, p.18.  
 Al dekabrismo en Siberio ..... LM 1949/99.  
 Al Ĝojo ..... Hungara Revuo 1919:apr.-  
 jul. p. 6-7.  
 Al Grekino ..... LM 1949/99.  
 Al vespera stelo ..... LM 1936/133.  
 Ama poemo ..... HV 1961:1, p. 6.  
 Amo ..... HV 1972:2, p. 7.  
 Amrompo ..... HV 1972:2, p. 7.  
 Anseroj..... HV 1973:4, p.16.  
 Antaŭ la Kristobildo de Ypern ... Paco 1970:6 (hung. eld.),  
 p. 19.  
 Aprila Capriccio..... SSt 1958:1, p. 11.  
 Arion ..... LM 1949/99.  
 Budapeŝt: Eŭropo ..... HV 1973:3, p.1.  
 "Ĉe la bela, blua Danubo" ..... LM 1936/120.  
 Danke ..... HV 1975:6, p. 27.

Deziro .....	HV 1965:4, p. 21.
Dum vintra pluv' .....	LM 1923/77.
Du paseroj .....	HdE 1934:48 (805), p. 1.
Ekvilibro .....	HV 1965:4, p. 21.
Elegio.....	HV 1971:2, p. 8.
En bona horo .....	HV 1965:4, p. 21.
En ĉiuj tempoj .....	HV 1975:5, p. 32.
Epitafo.....	HV 1976:1, p. 4.
Flago.....	HV 1966:1, p. 18.
Flamo.....	LE 1958:6-7-8, p. 80.
Fragmentoj .....	NP 1956:2, p.54-56.
Hajde' .....	HE 1921:11, p. 5.
Har', buŝ', okul' .....	EF 1922:12, p. 206.
Hungaroj estu ni!.....	HE 1921:6, p. 1.
Interrilatoj .....	HV 1972:2, p. 6.
Jam tagiĝas .....	HH 1941:1, p. 12.
Japana vesperkanto (Alia) .....	Oomoto 1970:jul-aŭg. p. 109.
Jen mi estas.....	HV 1976:1, p. 4.
Kaj finfine .....	HV 1971:2, p. 8.
Kanto de ĉiu homo .....	HH 1937:4, p. 3-4.
Kanto pri An-Kanh .....	Paco 1969:182 (hung. eld.), p. 4.
Ke mallume ne estu .....	HV 1969:2, p. 11.
Kie vi estas orioĵo? .....	HV 1971:1, p. 12,
Kiu hodiaŭ mortis .....	HV 1966:1, p. 18.
Klara Zách .....	HV 1967:2, p. 8.
La bakisto-lernanto kaj Attila József	HV 1967:1, p. 13.
Laborist-portreto .....	HV 1975:4, p. 16.
La falko .....	HE 1966:7, p. 8.
La ekfloritaj manoj.....	HV 1969:4, p.25.
La gardanĝelo.....	HV 1965:4, p. 21.
La grilo kaj la formiko .....	HV 1966:4, p. 27.
La homo.....	HE 1922:6, p. 4.



- La Internacio ..... Pioniro 1968:8-10, p. 2.
- La koro de soldato ..... HH 1931:1, p. 2-3.
- La kukulo kaj la tri ŝtatviroj..... LE 1959:5-6, p. 51.
- La lasta rideto ..... EF 1922:12, p. 207.
- La monumento defalinta ..... HE 1922:11-12, p. 7.
- La nova dio ..... Bulteno (HEK) 1959:3-5,  
p. 48-50.
- La poeto al sia partio ..... IK 1948:4, p. 7.
- La rabbitaj kisoj..... LM 1933/108.
- La rajdartistino ..... HV 1971:1, p. 12.
- La realaĵo de nenio ..... HV 1965:4, p. 21.
- La romiano..... HV 1971:1, p. 12.
- La ruĝa suno ..... Bulteno (HEK) 1959:3-5,  
p. 53-54.
- La simpleco de la moroj Lao-CeHV 1976:1, p. 4.
- Laslo V..... HV 1963:1, p. 5.
- La zorgoj de la soleca vivo..... HV 1965:4, p. 21.
- Letero pri la morto de Edipo..... HV 1970:2, p. 13.
- Li ekskuzas sin, ĉar li ne miksiĝas en batalojn HV 1962: 3,  
p. 6.
- Li trairis inter la soluloj de l' kafejoHV 1975:4, p. 29.
- Lude, petole gajas la kor' ..... HFM 1962:2, p. 28.
- Luno kaj stelo polusa ..... HV 1969:2, p.11.
- Malbona poeto, kiel kortuŝe ..... HV 1966:1, p. 18.
- Mam'zell Nitouche..... LM 1936/133.
- Merceria..... LE 1959:5-6, p. 53.
- Messiah ..... LM 1936/133.
- Mia monumento ..... LM 1949/103.
- Mia plej bela poemo..... LM 1949/11.
- Mia plezur' kaj mia turmento, Budapest HV 1973:3, p. 1.
- Mi estas polican' ..... La Policisto 1922:5-6, p. 2.
- Migraj ciganoj..... HV 1971:3, p. 20.
- Mi volis fajron..... HV 1975:2, p. 16.
- Montriĝas ..... HV 1966:3, p. 8.

Nimbo .....	HV 1971:1, 12.
Nokto inter montoj.....	HV 1966:4, p. 12.
Nur rimo kaj ritmo .....	HV 1971:2, p. 9.
Paco-ĥoro de maljunuloj .....	Paco 1959 (hung. eld.), p. 5
Paseroj — almozuloj.....	Jes, Sed 1973:4, p. 11-13.
Patrino larmo .....	HE 1921:9-10, p. 16.
Poetoj inter si .....	HV 1966:3, p. 8.
Popolkanto.....	HV 1963:1, p. 6.
Pri la mondo parolu.....	HV 1966:2, p. 3.
Puto de Maria en Nazareto .....	HV 1970:1, p. 11.
Rekrutigo .....	HV 1961:1, p. 6.
Samlingve .....	HFM 1965:3-4, p. 36.
Sceno el "Csongor kaj Tünde" ..	HV 1964:4, p. 4-5.
Sendependo .....	HE 1921:6, p. 4.
Sen ekstazo .....	HV 1973:3, p.16.
Sen titolo.....	HV 1971:3, p. 9.
Soleca cedro.....	HV 1970:1, p. 11.
Soneto 63 .....	KVARA RAPSODIO. Stockholm, 1946, p. 10.
Soneto pri Chillon .....	LM 1949/121.
Sovaĝa plezuro.....	LM 1949/103.
Surflugis la pavo .....	HE 1972:6-7, p. 31.
Taglibro fragmento.....	HV1972:2, p. 6.
Tezo.....	HV 1972:2, p. 6.
Transformiĝinta knabino .....	HV 1966:3, p. 18.
Vintra bildo.....	NP 1968:3-4, p. 158.
Vintra vespero.....	LM 1949/101.
Virinoj.....	HV 1975:6, p.16-17.
Vizaĝo surstrate.....	HV 1973:4, p. 16.
Voĉo de hungaraj malriĉuloj.....	HV 1961:1, p. 6.

## **HUNGARAJ KANTOJ**

- Alvenis jam la hirundo..... KANTOJ (por grupanoj)  
1965. p. 10.
- Aŭrstelo bele brilas ĉiele ..... HV 1968:3, p. 20.
- Brilu sur la ĉiel', brilu steloj milaj HV 1968:3, p. 20.
- Fajron oni metas ..... HV 1969:4, p. 20.
- Fraŭlmokado ..... HFM 1962:2, p. 28.
- Haj kurucamik' ..... GEMOJ p. 5.
- Hej, haj, roz', diant' ..... HV 1968:3, p. 20.
- Iras mi, foriras longavoje, tre for HV 1968:3, p. 20.
- Ja mi ne kutimas loĝi kaĝon birdan HV 1968:3, p. 20.
- Katrinjo Kádár ..... HV 1974:2, p. 9.
- Kiel funebradas nigra korv' senfino HE 1920:3, p. 1.
- Koko krias jam ..... KHS (1933), p. 34-35.
- Mi adiaŭdiras laste, vin amata .. HV 1968:3, p. 20.
- Mian koron iu ŝtelis for ..... HV 1968:3, p. 20.
- Mi ĉevalon ligis al pomarb' ruĝpoma HV 1968:3, p. 20.
- Sur la kampo rosoj brilis..... GEMOJ p. 8.
- Vespera kanto..... Juna Amiko (Provnumero)  
1972, p.11.
- Vidu amata, vidu amata ... ..... KHS p. 25.
- Vidu, mia patrin, kara mia patrin' HE 1972:6-7, p. 31.

## **UZITAJ MALLONGIGOJ**

BI	Budapeŝta Informilo
EF	Esperanta Finnlando
Gemoj	GEMOJ DE LA HUNGARA POPOL-MUZIKO. Budapest 1929.
HdE	Heroldo de Esperanto
HE	Hungara Esperantisto
HEK	Hungarlanda Esperanto- Konsilantaro
HES	Hungarlanda Esperanto-Societo
HESL	Hungarlanda Esperantista Societo Laborista
HFM	Hungara Fervojista Mondo
HH	Hungara Heroldo
HV	Hungara Vivo
IK	Internacia Kulturo
KC	KAJ LA CETER' — NUR LITERATURO. Eseoj. G. Waringhien. Antwerpen / La Laguna 1983.
KHS	KANTAS LA HUNGARA SKOLTO Budapest 1933.
LE	La Espero
LM	Literatura Mondo
NB	Nuntempa Bulgario
NLR	Nica Literatura Revuo, La
NP	Norda Prismo
SSt	Suda Stelo, La
TBE	The British Esperantist